

Bô Yin Râ

LA SEKRETO

KOBER VERLAG BERN

BÔ YIN RÂ
estas la spirita nomo de
J. A. Schneiderfranken (1876 - 1943)

El la Germana originalo
(„Das Geheimnis“, 4a eldono, represo de la unua eldono de 1923)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

© 1928, 1952 kaj 1982
êe Kober Verlag Bern, Svislando

Al ĉiuj serĉantoj en la mondo

KOMENCO

La palpebla, peze kuŝanta lumo de la suda suno estis tiom ebriiginta de heleco la okulojn de la tri migrantoj, ke ili unue staris kvazaŭ blindigitaj, vidante en la malhela ĉambro de la kampara gastejo nenion alian ol densan mallumon.

Sed interne oni jam estis rimarkinta, ke la enirantoj estis vojaĝantoj distingitaj, kaj tiel okazis, ke ili eksentis preskaŭ teruron, kiam subite, el la profundo de la ĉambro, eksonis renkonte al ili en burleska patoso la bruegaj tonkaskadoj de gurdopiano, populara tiulande.

Samtempe aperis, el la malhelo, granda malsvelta vira figuro, kiu etendis ambaŭ manojn por saluti ilin.

Kvankam oni vidis, ke la viro estis parolanta, supozeble dirante vortojn de saluto, kaj ke li ŝajnis ne malmulte fieri pri la bruanta akcepto kiun li preparigis al la vojaĝantoj, tamen ĉiu vorto parolata tiumomente en la sonriĉa lingvo de la lando perdiĝis en la torento da

freneza tintado de piano, frapado de timbalo, kaj rulado de tamburo.

Nur per signoj la gastoj sukcesis, iom post iom, komprenigi al sia grasventra antaŭulo – en kiu ili ekkonis la atenteman gastejestron, tiulande nomatan „*padrone*“ – ke li fine nepre ĉesigu la bruegadon; kaj ne longe post kiam la kompreninto estis malaperinta pezapaŝe en la mallumo, la konfuzaĵo de sonoj subite kaj abrupte finiĝis.

En la surpriza silento oni aŭdis la maljunulon doni ordonojn, al kiuj la klara voĉo de knabo respondis obeeme.

La okuloj de la vojaĝantoj estis pli kaj pli kutimiĝintaj al la malhelo, kaj nun ekvidis la senkulpan kaŭzinton de la tiom kruela bruado: viglan, eble dekunu-aŭ dekdujaran knabon kun nigra, krispa kaphararo; ankoraŭ tute varmegigita, tial ke li estis fervore turninta la inercian radon de la tumulteca maŝino, li klopodis blovi la pecetojn de la manĝo de antaŭaj gastoj for de la verda tuko kovranta la plej proksiman tablon.

Nur nun la tri viroj povis sciigi la gastejestron, kiu riverencadis kun pezeca, sed eleganta digno, ke ili deziras simplan, tiulande kutiman refreŝigaĵon, kaj post ne longa tempo ili sidis, sur primitivaj seĝoj kun pajla plektaĵo, ĉirkaŭ la verda tablotuko makulita per sen-nombraj postsignoj de elverŝitaj vino kaj olivoleo,

havante antaŭ si kanokovritan, longakolan botelon, kies bonega enhavo, inkece malhela Kianta vino, jam plenigis malgrandajn akvoglasojn.

Fromaĝo, olivoj kaj blanka pano, ĉio kune sur tri fajencaj teleroj griziĝintaj pro aĝo, formis la sopiritan manĝon.

Surtabliginte tiujn bongustaĵojn, la gastejestro kaj lia fileto sin retiris diskrete en nekonatan kaŝejon apudan; la gastoj manĝis kaj trinkis kaj fine sentis sin tre stimilitaj daŭrigi la interparoladon, kiun ili estis interrompintaj enirante la gastejon.

Dolĉa aromo de orientaj cigaredoj jam plenigis la malaltan volban ĉambron, kaj delikataj strioj de bluite blanka fumo ludis ĉirkaŭ la longa, bastoŝnurita kolo de la Kianta botelo.

La atmosfero estis do tre favora por certaj revaj konsideroj.

Ili kredis senti, ke tie ĉi estas eble paroli pri la multaj aferoj misteraj, pri kiuj ili antaŭe ne estis atingintaj akordon, pli bone ol ekstere en la senkompate klara suna lumo.

*

„Mi restas je mia aserto“, ekparolis la plej maljuna el la tri viroj, „kaj kvankam mankas al mi mem ĉia tiurilata sperto, ĉar mi neniam travivis ion tian, tamen fame konataj erudiciuloj de preskaŭ ĉiuj kulturaj popoloj miaopinie sufiĉe atestas, ke en tiuj fenomenoj,

efikantaj sur nin modernajn homojn kiel fantomaj scenoj el malnovaj fabeloj, devas esti io vera.

Tiuj sobraj eksperimentistoj esploris tiajn fenomenojn, ofte eĉ per ekstreme sentemaj instrumentoj, inklude fotografan aparataron; estas tute ne eble, ke ili senescepte estis viktimoj de kruda trompo aŭ trompiĝo!“

La plej juna viro, havanta tridek kaj kelkajn jarojn, respondis kun iom da maltrankvileco en sia voĉo:

„Certe vi pravas, sed mi jam diris al vi antaŭe, ke ĉiuj sciencaj atestoj, kiom ajn gravaj ili aperas al vi, estas por mi tute nenecesaj; ĉar okazis iam en mia vivo, ke mi havis la oportunon sperti *mem* ĉion, kion vi rakontis al ni surbaze de la raportoj de vi legitaj; – en viaj raportoj eĉ mankas multego, kiu estus ege pli miriga kaj kiun mi tamen mem travivis!“

*

„Se mi ne konus vin kiel homon starantan kun ambaŭ piedoj firme sur nia amata ridanta tero,“ diris nun la tria viro, kiu, havante firman, kompaktan staturon, aspektis tute kiel honorinda Itala kampara pastro, „mi vere devus supozi, mia juna amiko, ke vi fariĝis predo de tre danĝeraj halucinoj!

Malkaŝe parolante: mi ne komprenas, ke tia homo kia vi, kiu ja estas ĉio alia ol iluziiganta revulo, prenas serioze la fantomajn fenomenojn, pri kiuj jen nia kara maljuna bibliotekisto povas tiom rakonti, kaj

nun eĉ mem asertas, ke tiaj aferoj ne estas fremdaj al li!

Entute oni neniam sukcesas travidi vin!

Jen vi kondutas plene kiel homo de la dudeka jarcento, kiun oni aŭdas juĝi racie pri la plej realaj problemoj – jen oni povus pensi, ke vi estas Hinda ĝangala fakiro, kiu ne konas la mondon, aŭ monaĥo reveninta el mezepoka ĉelo, kvankam ordinare vi ja havas vere nenion komunan kun tiaj fuĝintoj el la mondo! –“

*

Ĉar la blankbarbulo, kiu intertempe estis ekbruliginta Virginian cigaron kaj, suĉinte, eligis densajn nubojn da fumo, nun evidente preferis aŭskulti, la plijunulo reekparolis kaj diris:

„Mi povas kompreni, ke kelkaj aspektoj de mia persono ŝajnas al vi malakordiĝi; sed aliaflanke ankaŭ mi ne povas trovi motivon, pro kiu homo, konanta la vivon tiom kiom vi, mem forprenas de si la povon de klara vidado ĝuste se temas pri *supersensecaj* aferoj, sole ĉar li opinias nekontestebla fakto la aserton, ke tiaj aferoj ekzisti ne povas!

Kial vi ne provas esplori mem tiujn aferojn, aŭ almenaŭ certigi vin per ekzameno, ke aliaj homoj akiris nedubeblajn pruvojn?!

Mi pensas, ke tia antaŭjuĝa skeptikeco tre malbone akordiĝas kun *via* cetera karaktero, konsiderante, ke

vi tiom ofte diris al mi, ke nur la *sperto* estas rigardata de vi kiel sufiĉa bazo de iu ajn ekkono!“ –

*

Kaj la alia respondis al li:

„Kondiĉe ke en tiu ĉi kampo oni vere povas akiri spertojn kiuj estas ĉiutempe kontroleblaj!

Sed jen: por ĉio, kion vi du nomas ‚sperto‘, oni bezonas la plej strangajn preparojn; tamen oni poste ne scias, ĉu oni estis trompata aŭ ne!

Krome, la tutan komplekson de tiaj spertoj mi abomenas el la profundo de mia animo!

Ĉar kio rezultas el ĝi, eĉ en la plej favora okazo?

Supoze, ke vi mem kaj la informintoj de nia estimata amiko fakte *ne* estis trompataj, vi ja koncedos, ke ĉiuj raportitaj fenomenoj estas eksterordinare *trivialaj* kaj *praktike senvaloraj*!

Kion utilas al mi, por ekzemplo, dancanta tablo kiu okaze frape diktas, laŭ la alfabeto, tutajn predikojn?

Mi decide preferas tablون firme starantan, kiel tiun ĉi, kaj ŝajnas al mi, ke estas pli konforme al la esenco de tablo stari firme ol danci!

Se mi volas aŭskulti pian predikon, ĉiu dimanĉo prezentas al mi pli bonan okazon; kaj se la predikanto ne taŭgas, tiam mi almenaŭ scias, kun kiu mi interrilatas!

Mi estas preta koncedi, ke eble ekzistas fortoj, kiuj konscias sin mem kaj, se petitaj, bonvolas dancigi

tablojn aŭ frapadi bigote solenajn revelaciaĵojn, – sed se tio estas vera, mi emfaze malpermesas al tiuj uloj penetri en mian ordan vivorondon, kaj se iam venos al ili la ideo fari tion sen esti vokitaj, tiam mi certe ilin ekmastros!

Pli bone estas ludi ‚blindulludon‘ kun infanoj ol mem alvoki tiun kanajlaron, supoze ke ĝi reale ekzistas!

Kaj kiom valoras ĉiuj tiuj aliaj fenomenoj?

Jen sidas, laŭ la rakontoj, iu mizerulo aŭ duon-histeriulino – kiun vi nomas ‚mediumo‘ – dum duono de nokto, en stato apenaŭ konscia, antaŭ stakoj da papero kaj miregante admiras tion, kion lia aŭ ŝia mano skribas aŭtomate kiel sciigon el la ‚mondo de spiritoj‘, aŭ eĉ kiel laŭdiran ‚dian revelacion‘. –

Rigardate en lumo, la tuta skribaĵo estas ekzemplaro de banalaĵoj, aŭ, en la plej favora okazo, miksaĵo el diversspecaj piaj traktaĵoj kaj duone digestitaj filozofieroj.

Mi devas diri, ke neniu infera turmento, kiun la antikvuloj elpensis, ŝajnas al mi tiom terura kiom la ideo, ke homo, kiu estas travivinta pli aŭ malpli decan vivon kaj fermas la okulojn por ĉiam, tiumaniere povas fariĝi predo de iuj ajn personoj inter la postrestantoj, kiuj deziras havigi al si tiajn mesaĝojn!

Sed preskaŭ blasfema fariĝas la afero, kiam tia aĉaĵo, prezentata kiel dia revelacio, nebuligas la cerbojn!

Vere: ‚dio‘ kiu havas nenion pli bonan por diri kaj bezonas tiujn vaglumajn aperaĵojn por komuniki siajn mesaĝojn, iru al la diablo, kie estas la loko deca por li!

Sed tio, kio evidente imponas al vi plej multe: la fizikaj artifikoj kaj la materiigo de homaj formoj, estas por mi malplej grava, ĉar, estante fizikisto, mi povas kontribui iometon al tiu ĉi temo. Supoze, ke neniuj eraroj estis farataj dum la observado kaj ke viaj ‚mediumoj‘ ne trompis, prezentiĝas al mi tie ĉi, en la plej favora okazo, manifestaĵoj de ankoraŭ ne malkovrita parto de la fizika mondo, sed neniukaze temas pri la ‚regno de la spirito‘!

Ke prudenta homo kun sanaj sensoj prenas tiun teatron de pseŭdospiritoj serioze, mi ne povas kompreni; sed tio tute ne signifas, ke mi neas la observitajn fenomenojn.

Mi protestas nur kontraŭ la *eksplikoj* prezentitaj por tiuj manifestaĵoj, laŭ kiu ili estas pruvoj de la ekzistado de spirita mondo, kaj estas por mi enigmo, ke homo kun iom da kritikkapablo ne suspektas ilian veran naturon!

Mi vere ne plu estas ligita al iu religia dogmo, sed kompare kun la konfuzo de nocioj kaŭzata de la laŭdire ‚pruvebla‘ transejo de via okulta fenomenaro, la piaj historioj, kiuj ĉirkaŭis mian infanecon per poezio kaj ĉiela brilo, ŝajnas al mi plenaj de plej pura saĝo!

Kontraŭ kia miksaĵo el superstiĉoj oni hodiaŭ interŝanĝas la kernecan, pian kredon de la antikvuloj!— —

Se mi ne okupas min pri okultaj fenomenoj, mia juna amiko, mi tion faras ne pro nescio, sed tial ke mi konsideras tiun aĵon *tro stulta*, tial ke mi havas *ion pli bonan* por fari ol esplori la revelaciaĵojn de ‚spiritoj‘ de *tiu speco*!

Mi portas en mi tro altan ideon pri la homa spirito, ol ke mi povus rigardi ĝin kapabla de tia dekadenco, kia estus necesa, se tiuj teorioj estus ĝustaj kaj se en iuj okultaj fenomenoj ni interrilatus kun la spiritoj de terloĝintoj!

Mi ne estas teologo, sekve signifas nenion por mi la formuloj, per kiuj oni supozas povi analizi la Diecon same kiel kemian preparaĵon, sed: *mi kredas senti ‚Dion‘ en mi*, kaj tial ŝajnas al mi plej abomeninda blafemo, ke la voĉoj, kiuj sonetas el tiuj eternaj noktoregionoj de la naturo, estas rigardataj eĉ kiel ‚diaj revelacioj‘, ke oni volas uzi la Biblion kaj la sanktajn librojn de aliaj popoloj kiel ‚pruvon‘ de tio, aŭ eĉ kompari la religian genion, kiu montriĝis en grandaj homoj, kun ‚mediumoj‘ kaj somnambuloj!

Ĉio ĉi estas por mi tro *absurda*; kaj ĉar mi ne vidas rezultoj el ĝi ian spiritan gajnon por la homaro, eĉ se la okultaj fenomenoj estus esplorataj en ĉiu domo – male, mi estas certa, ke ĝi kaŭzus nemezureblan damaĝon – mi opinias ke estus pli prudente ne okupi sin pri tiuj aferoj, tiom pli ke ankoraŭ ekzistas sufiĉo da esplorindaĵoj en la naturo, kaj eĉ por plejinteligentuloj la homa animo ankoraŭ estas „libro sigelita per sep sigeloj“! –

Eble, karaj amikoj, vi nun komprenas min pli bone! –“

*

Dum tiu parolado oni povis rimarki en la vizaĝo de la plijunulo pli kaj pli fortiĝantan esprimon de ĝoja surprizo, sed la plimaljunulo ofte klinis sian kapon pripenseme al la flanko kaj ĉiel montris, ke dum la tuta diskutado li estis serĉanta *kontraŭargumentojn*, por ke lia propra opinio ne estu venkata.

Apenaŭ la lasta vorto estis elparolita, li komencis sian respondon, dirante: ke tiu opinio ja estas komprenebla, kvankam eble diversaj objetoj povas esti prezentataj kontraŭ ĝi, sed ĉio, kio estis menciata, rilatas sole al tio nomata „spiritismo“, dum – tion lia amiko evidente ne scias – la vera, scienca okultisto staras fronte al ĉi tiuj fenomenoj nur kiel *observanto*, kiu, se serioza, provizore ignoras ĉiun hipotezon eble uzatan de aliuloj por ekspliko; diversaj, tre gravaj

scienculoj ja observis ĉe somnambuloj fenomenojn, kiuj tute ne sugestas eĉ al la plej fervora „spiritisto“ la kunagadon de „spiritoj“.

Kaj li daŭrigis sian rezonadon, dirante:

„Mi pretas koncedi, ke vi eble estas plene prava rilate al la ‚spiritoj‘ de mortintaj homoj aŭ al la ‚diaj revelacioj‘, kiujn oni kredas ricevi tiumaniere, sed: ĉu ne estas eble, eĉ plej probable, ke la okultismo estas vokita *evidentigi*, jam en la surtera vivo, la *ekziston de la animo*?

Ekzemple: oni demandis somnambulojn profunde dormantajn kaj eltrovis, ke oni tiel povis penetri en pli kaj pli kaŝajn regionojn de la interno, kaj ke pli kaj pli altaj estaĵoj parolis el la somnambulo, tiel ke oni ekhavas jenan impreson: ju pli la ekstera konscio estas vualata, des pli klare manifestiĝas *io alia*, kio dum la ordinara taga spertado *ne* estas perceptebla.

Laŭ mia opinio, tio do konsistigas kvazaŭ pruvon de la ekzisto de io spirita, kio transdaŭras la surteran vivon!“

*

La plijunulo nun rapidis respondi kaj diris:

„Mi estas en la stranga situacio trovi apogon ĉe vi *ambaŭ* koncerne la aferojn de ni preparolatajn, kaj tamen vidas, ke mi devas raporti pri mi pli klare ol mi faris ĝis nun, por ke ni ne konstante miskomprenu nin reciproke!

Unue mi deziras trakti pli detale la ĵus menciitajn eksperimentojn faritajn kun somnambuloj. Se mi, farante tion, montros certan konon de aferoj, kiujn la plej multaj homoj opinias *nepruveblaj*, *nesperteblaj*, kaj *neeksplikeblaj*, bonvolu provizore akcepti tion, ĝis estonta horo permesos al mi paroli pri la *fonto* de mia kono kaj tiam diri al vi ion, kio devus resti nekonata al vi, se vi ne trovus okazon aŭdi pri ĝi de iu, kiu mem ĝin spertis.

Koncerne la somnambulojn mi devas diri, ke ankaŭ mi estas kompetentulo, kaj mi devas emfaze kontraŭi al la opinio, ke *tie ĉi* oni estas je la *pordo de la mistero de l' Spirito!*

Se oni kredas, ke oni povas renkonti en tio, kio parolas el profunde dormanta somnambulo, la realan *Spiriton*, tio pruvas nur, ke oni *ne eĉ iomete suspek-tas*, kio la *Spirito* efektive *estas*, kaj ke oni havas ankoraŭ neniom da *reala* spirita sperto! –

Mi tute konsentas pri tio antaŭe dirita koncerne la neadekvatecon de okultaj fenomenoj, kaj oni evidente eraris supozante, ke mi amas okupi min – ĉu aktive, ĉu nur observante – pri tiaj manifestaĵoj.

Por homo trapasinta spiritan instruadon tian, kia estis donata al mi, *la enigmoj de l' okultismo ne plu havas ian ajn allogon!* Dum tiu instruado ili tute perdis la aŭreolon de kaŝiteco kaj neeksplikebleco!

Tamen mi atribuas kelkan gravecon al tio, ke oni ekkonu la *faktecon* de la fenomenoj okultaj, nome tial, ke *sen* tiu kono oni riskas esti iam trompata en plej fatala maniero, kaj precipe tie, kie oni plej malmulte tion atendis. –

Estas al mi tre agrable, ke nia interparolado ne-atendite ŝanĝis sian direkton sekve de tio, ke ĵus estis prezentataj konkludoj de sobra rezonado, kiuj preskaŭ plene kongruas kun mia spirita *sperto*, – ili almenaŭ estas senpene *akordigeblaj* kun la rezultoj de mia spertado.

Nun mi povas paroli al vi du kvazaŭ kun levita viziero, kaj apenaŭ devos timi esti miskomprenata.

Kio do koncernas la *somnambulojn*, tra kies buŝoj oni esperas akiri pli precizan informon pri la animo kaj la spiriteco de la homo, la eksperimentoj kun ili faritaj diferencas en nenio esenca de ‚spiritisma‘ seanco, krom se oni rigardas la sciencan eksterajon kiel ion esencan! –

Tie kaj *tie* ĉi la *samaj* nevideblaj estaĵoj *fizikaj* kaj koscion havantaj fortoj faras siajn petolojn, tuj kiam tera homo kreis *oportunon* por tio. –

La somnambulo profunde dormanta estas la por-tempa predo de tiuj mallumaj fortegoj – vere agantaj ‚transe de bono kaj malbono‘ –, tute same kiel la persono nomata ‚mediumo‘ en sia stato de tranco! –

Neniam homo enrigardas en *realajn* mondojn spiritajn, kiam liaj sensoj kaj konscio estas *vualitaj!* –

Ekstazo, tranco kaj somnambulismo estas nenio alia ol statoj de *korpa tumulto*, kaj ju pli la reganta forto de l' homo transiras dum tia tumulto al korpaj kompleksoj kiuj laŭ sia naturo povas havi benoplenan efikon nur se ili estas strikte regataj, des pli profunda fariĝas la somnambula stato, des pli densa fariĝas la muro apartiganta la *mi-konscion* disde la *cerbofunkcioj*, ĝis fine lemuroj de la nevidebla, sed *tute ne* ‚spirita‘ mondo submetas la senmastran korpan organison al sia volo!

Oni tiam aŭdos el la buŝo de la somnambulo aŭ dumtranca parolanto ĉiuokaze *tion*, kio bone taŭgas por vekti la *intereson* de l' eksperimentanto, aŭ por *imponi* al la kredanta komunumo jen per nobla patoso, jen per frazoj trivialaj sed adaptitaj al la reganta kredo, jen eĉ per obsceneco. –

Kio parolas el mizerulo estanta en tia vualita mensostato, tio havas neniun alian strebadon ol atentigi pri *si mem* tiom impresive kiel eble, kaj ofte scias plej ruze elekti *tiun* maskon, kiu havigas al ĝi la plej multan intereson de homoj. –

La *ekstazulo* spertas la saman staton kiel la homoj nomataj ‚mediumoj‘, escepte ke en lia kazo la *mi-konscio* perdas *ne la tutan* kontakton kun la cerbo-

funkcioj, kaj fariĝas al li neperceptebla nur la *ekstera korposento*.

La ‚spiritaj‘ mondoj, kiujn li kredas vidi, estas nenio alia ol produktoj de lia *plastika fantazio*, kiuj fariĝis por li palpeblaj kaj realaj rezulte de la vibrado de furioze konvulsiantaj nervoj! –

Oni tial devas *strikte distingi* inter, unuaflanke, ĉiu tia metodo celanta vekti korpajn, nenormalajn sentojn, kiuj poste estas interpretataj kiel ‚*spirita*‘ travivaĵo, kaj, aliaflanke, la *reala* spirita spertado, kiu ĉiam okazas kun *tute nevualita*, eĉ *pli intensigita* korpokonscio! –

Tio nomata ‚*okultismo*‘ vere ne estas eltrovaĵo de la tempo moderna!

Ĉiuj popoloj kaj tempoj konis okultajn fenomenojn.

Tamen neniu eniris tiun malluman regionon – escepte *sub sekure suverena gvidado* – kiu tie ne estis trompata! –

Plej ofte, tia homo neniam plu povas sperti la realan *spiriton*.

Tio, kio lin firme tenas, *propravole* ne plu ellasas lin, kaj kiam ĝi ellasi lin *devas*, tial ke li iom post iom estis tute elsuĉata kaj jam ne estas uzebla, li ne plu havas la forton por relevi sin.–

Se vi, karaj amikoj, ĝis nun kredis, ke mi fervore aprobas la ‚*okultismon*‘, la esploradon de ĉiuj fenome-

noj menciitaj en nia interparolado, pri kiuj nuntempe ja okupas sin tre famaj erudiciuloj en diversaj landoj, vi profunde eraris!

Sed antaŭ longa tempo mi devis *akiri konon* ankaŭ de *ĉi tiu* sfero de l' homa vivo, ĉar mia guro tian postulis de mi.“

*

„Kio estas tio: ‚mia guro‘?“ demandis la fizikisto interrompante la parolanton, el kies buŝo la al li mem tiom kutima vorto estis elglitinta pro evidenta malatento.

„Mi konfesas“, respondis la plijunulo, „ke mi ne estas sperta en sanskrito, sed tiu, kiun mi nomas ‚guro‘, iam rakontis al mi, ke en lia hejmlando oni donas tiun nomon al la instruantoj de spirita disvolviĝo kaj vekigiĝo.

Guro laŭdire signifas proksimume ‚spirita patro‘ aŭ ‚patreca instruanto‘.

Min li nomis ‚ĉelao‘, kaj kvankam tiu ĉi vorto supozeble signifas ĝenerale nenion alian ol ‚disĉiplo‘, li eksplikis al mi, ke nur malmultaj ricevas tiun honoran titolon, kaj ke oni devas esti disĉiplo de guro *en tute speciala maniero* por esti rigardata plenrajte ankaŭ kiel lia alprenita ‚ĉelao‘.

Li mem estis majstro de la ‚Blanka Loĝio‘ “.

*

„Do framasono, ĉu ne?“ intermetis la maljunulo.

„Tute ne“, responde diris la junulo. „La framasonaro – se oni ne algluiĝas nur al la vorto, sed celas *la aferon mem* – eble havas kelkan kaŭzon por rigardi sin deveninta de la ‚Blanka Loĝio‘, sed la spirita unuiĝo, el kiu originis mia guro, estas *io absolute alia* ol la framasonaro. Cetere, ‚Blanka Loĝio‘ estas nur ekstera nomo de tiu unuiĝo, kies membroj mem nomas sin ‚*lumantoj de la Pralumo*‘.

Neniu povas veni en ilian rondon, kiu ne estis destinita al tio antaŭ sia naskiĝo. Sed tiujn, kiuj estas spirite *plej proksimaj* al ili, ne apartenante al ilia aro, ili nomas ‚alprenitaj ĉelaoj‘. Tiuj estas homoj, kiuj devas trapasi aparte intensan spiritan instruadon, ĉar ili portas en si psikofizikan heredaĵon, kiu surmetas sur ilin devojn, kiuj ne estas metitaj sur aliajn homojn.

Ne postulu de mi, ke mi plue parolu pri tio, ĉar, kiel vi jam aŭdis, jen tia ĉelao estas antaŭ vi. –

Mi pensas, ke tiu sciigo nun klarigos kelkajn aferojn, pro kiuj mia persono portempe ŝajnis strange neordinara al vi! –“

*

Tiu, kiu havis tiom strangajn kaj eksterordinarajn komunikojn por doni al siaj amikoj, nun ĉesis paroli, kaj estiĝis profunda silento. La gastejestro – supozeble opinianta, ke liaj gastoj volas foriri – reaperis el sia kaŝejo, kaj kiam li rimarkis sian eraron, li

ekokupis sin, kun nenecesa aktiveco, je la bareloj kuŝantaj iuj apud aliaj sur bazo el trajoj en la fono de la ĉambro.

Ĉion en la volbaĵo oni nun povis distingi plej klare, ĉar la okuloj estis kutimiĝintaj al la malhelo, kaj la mallarĝa fendeto de lumo, kiun tralasis la porda kurteno, estis sufiĉa por dolorigi ilin, kvankam la suno jam staris malalte sur la ĉielo kaj certe jam de longe ĵetis longajn ombrojn ...

*

„Pri rimarkindaj aferoj oni aŭdas de vi!“ diris tiu de kompakta staturto, kies aĝon oni povis taksu je preskaŭ kvindek jaroj, kaj tiel ĵetis, per sia sonora basa voĉo, la unuan parolon en la silenton.

Daŭrigante li diris:

„Multo je via persono nun fariĝas pli komprenebla por mi, tamen estos bezonata plua eksplikado, antaŭ ol ĉio tio prezentos al mi kompletan bildon!

Jen vi parolas, kun nekredebla certeco, pri multo, kio ĝis nun estis apenaŭ alirebla por mi, sed la plej miriga afero estas, ke vi iel konvinkis min, kvankam vi ne donis al mi pruvojn!

Mi sentas, ke ĉio ĉi *devas* esti tia, kia vi diras, ĉu vi kapablas pruvi tion aŭ ne.

Viaj paroloj portas apartaspecan konvinkan forton en si mem! –

Kaj nur nun ĉio tio komencas fariĝi *interesa* por mi!

Io tia do vere *ekzistas* en la nuna tempo, meze de nia nivelita mondo!? –

Juna amiko, pri tio vi nepre devas rakonti al ni pli multe!

Mi ne pensas, ke iu el ni du aliaj estas destinita por fariĝi ‚ĉelao‘ de ‚guruo‘ tia, kia via instruinto, kaj eble ni du estas iom tro aĝaj por tio; sed antaŭ ol mi foriros de tiu ĉi planedo, kiu ĉiam ŝajnis al mi sufiĉe aminda, mi ŝatus – se tiaj aferoj povas okazi tie ĉi – esti certagrade informita pri ili, ĉar ĉiuj fenomenoj de l’ okultismo, en sia tuteco, ne eĉ unu momenton interesas min tiom, kiom tiu kaŝita ‚*Blanka Loĝio*‘, aŭ kiu ajn estas la nomo de tiu unuiĝo, kaj ankaŭ la fakto, ke jen oni povas renkonti tute normalan Eŭropanon, kiu ŝajnas posedi, tute kaŝe, kapablojn de ekkono, pri kiuj la cetera homaro – almenaŭ nuntempe kaj ĉe ni – suspektas preskaŭ nenion. –“

*

„Ankaŭ mi“, diris la blankbarbulo, „urĝe petas doni al ni pliajn informojn, – precipe ĉar kelkaj indikoj, kiujn mi iufoje renkontis en la tiurilata literaturo, nun ŝajnas al mi, en la lumo de la ĵus aŭditaj eldiroj, senigitaj je sia nur *simbola* karaktero!

Dum la estontaj tagoj de vojaĝado kaj ripozo, sinjoro nia pli juna kolego estos kuna kun ni; do supozeble

prezentiĝos oportuno por inici nin iom pli profunde en la misterojn, al kiuj li ŝuldas sian scion!

Sed nun ŝajnas al mi konsilinde iri hejmen, ĉar kvankam la suna lumo ne plu pezos sur ni tiom brulante, nia vojiro returne al la urbo certe daŭros ne malpli ol unu horon kaj duonon. –

Ĉu ni eble povos aŭdi, dumvoje, iometon kompletigantan la sciigojn de ni jam ricevitaĵn? Mi dezirus demandi vin pri certaj aferoj por mi tre gravaj.“

*

Ĉar la aliaj du viroj aprobis la proponon tuj reiri al la urbo, ili tri pagis siajn manĝaĵon kaj drinkaĵon kaj kune eliris el la malluma gastejo, dum ties mastro senĉese riverencis kaj al siaj paroloj de beno aldonis la deziron de baldaŭa revido.

Nevole ili profunde enspiris, kiam la iom malvarmiĝinta vespera aero blovetis iliajn fruntojn.

La pejzaĝo kuŝis kvazaŭ sub opalkolora nebuleto; pinioj kaj cipresoj forte stampis siajn siluetojn en la pale oran vesperan ĉielon, kaj la proksima maro, treme brilanta kiel la interna flanko de giganta perlkonko, kunfandiĝis en la apenaŭ videbla horizonto kun la fora, laktece blueta aero.

Unue la migrantoj direktis la paŝojn al grupo da eŭkaliptoj, kie kruciĝis du vojoj: la unua, veturvojo, kondukis tra kampoj kaj olivarbaretoj, inter la neniam mankantaj vitogirlandoj inter ulmoj aŭ morusoj, al la

urbo, dum la alia, pli ĝuiga al piedirantoj kaj krome pli mallonga, direktiĝis unue al la maro kaj tiam – etendiĝinte laŭlonge de ties bordo kaj estante jen tegita per ŝtona pavimo antikva, jen sabla kaj kovrita de fuko – atingis la unuajn, de cipresoj superitajn murojn de la parkoj de urbaj vilaoj.

Kvazaŭ interkonsentinte, ili sin turnis dekstren en tiun irvojon, kaj ĉiu el ili, kun kreskanta plezuro, flaris la pli kaj pli percepteblan, acerbe freŝan odoron de l' maro.

Atinginte la marbordon, la migrantoj nevole haltis por momento antaŭ la akva vastaĵo brilanta kiel sateno, ĝuante la ĉiufoje novan spertadon de nemezurebleco. –

Ĝis tiam estis parolitaj nur sporadaj vortoj, inspiritaj de la vespere ŝanĝita aspekto de la ĉirkaŭaĵo, aŭ rilataj al la beleco de la tuta regiono, al la suda majesteco de Itala pejzaĝo.

Sed kiam oni estis ekirinta la vojon sur la marbordo, la blankbarbulo rememoris siajn demandojn pri la strangaj komunikoj de la junulo. La posttagmezaj horoj en la kampara gastejo igis ĉi tiujn sciigojn ŝajni al li preskaŭ pli valoraj ol antaŭ longe malaperinta, sed nun retrovita libro antikva, kvankam li estis ĉiam serĉinta tiajn trezorojn en ĉiuj bibliotekoj al li atingeblaj kaj tute sekrete ankoraŭ opiniis, ke ne

povas ekzisti iu scio trovita de homoj, kiu ne estas enskribita en libro.

Nur hodiaŭ li estis eksentinta vagan dubon pri tio, sed ĝi ankoraŭ ne povis skui lian opinionon.

Eble la libro klariganta ĉion ĉi nur ankoraŭ ne estis atinginta liajn manojn ...

INTERPAROLADO ĈE LA MARBORDO

„Pardonu, estimata kolego,“ diris nun la maljuna viro, turnante sin al la plej juna, „sed pri ĉiuj aferoj, pri kiuj vi parolis al ni hodiaŭ, certe devas ekzisti io simila al literaturo speciala, kiun spite al plej fervora serĉado mi ĝis tiu ĉi horo ankoraŭ ne trovis, ĉu ne?“

Kaj renkontinte tre miran rigardon de l’ junulo respondan al tiu demando, li daŭrigis:

„Mi ne celas diri, ke ĝi estu speciala literaturo *moderna*, ĉar certe ĉio tio fariĝis konata ankaŭ al homoj en *pli fruaj* tempoj, kaj devas ekzisti libroj, kiuj povas doni informon pli detalan, ĉu ne?“

Malgraŭ mia maljuneco mi ankoraŭ nun komencus la studadon de l’ sanskrito – kiun mi bedaŭrinde neglektis pro tiom da aliaj aktivecoj miaj –, se vi, eble atentigite pri tio per aludoj de via Orienta instruinto, povus doni al mi indikojn specifajn! – La librojn mem mi sendube sukcesus havigi al mi.

Ĝis nun ĉio, kio iam okupis la homan spiriton, estis enigata en *librojn*, kaj kvankam mi kredas viajn sciigojn, estus aparte, eĉ netakseble valore por mi, se tio, kion vi diris al ni, povus esti dokumentata per

neatakeblaj malnovaj teksteroj, tiel trovante kvazaŭ aŭtoritatan konfirmon!

Kion ajn oni diras, la aserto de unuopulo ĉiam kvazaŭ pendas en la aero, kaj nur kiam oni scias, kiel envicigi ĝin en la historion, oni povas formi adekvantan juĝon! –“

*

La esprimo de miro sur la vizaĝo de l' plijunulo eble estis eĉ plifortiĝinta dum tiuj paroloj, kaj antaŭ ol la alia akompananto, sur kies lipoj laŭŝajne same ŝvebis repliko, povis ekparoli, li komencis jene, nur malbone subpremante ironian rideton:

„Vi do opinias – se mi ne miskomprenis vin – ke dum tiu ĉi surtera ekzisto oni ne rajtas sperti ion, kion sperti ne estas *permesate* per la opiniesprimo de iu antaŭulo!?!“

La maljunulo lin interrompis:

„Ne, mia juna amiko, ne *tiel* vi devas kompreni, kion mi diris!

Sed vi scias mem, ke ĉiu scienca ekkono vere akiras respekton en la mondo nur, kiam ĝi povas apogi sin sur la aŭtoritato de antaŭuloj elprovitaj!“

*

„Eĉ rilate al tio, kion oni nomas ‚scienco‘,“ replikis la plijunulo, „vi ne povos ĝeneraligi tiun frazon, kiu ja estas certagrade pravigita!

Sed tio, kion mi hodiaŭ diris al vi, tute ne estas la rezulto de ‚scienco‘, nek estas ‚kredo‘, sed io, kio estas *praktike ekzistanta* kaj postulas *praktikan faradon*, se oni volas atingi rezultojn! – –

Vian demandon pri malnova speciala literaturo tiurilata mi bedaŭrinde devas nei!

Kvankam – eĉ ne estante ĉelao alprenita de vera guroo – vi renkontus tre rimarkindajn konfirmojn en ne malmultaj skriboj malnovaj kaj precipe en la sanktaj skriboj de la grandaj religioj, se vi volus vin teni je la instruoj de la ‚Blanka Loĝio‘ kaj vin meti sub ĝia nevidebla gvidado, tamen vi vane traserĉus la mondon por trovi antikvan libron priskribantan tiun ĉi instruon en kohereco!

Nur en la *nuna* tempo oni trovis sin instigita konfidi al la *skribo* la tie ĉi tuŝatan instruon por ĉiuj estontaj tempoj, por tiumaniere doni al la mondo, je la unua fojo, rigardon en la agadon de la ‚Blanka Loĝio‘, pere de *Eŭropano*, kiu mem *apartenas al tiu ĉi unuiĝo* kaj al kiu estis donata la eksplicita tasko proklami la instruon en plej diversa formo.

Tuj kiam via pensmaniero estos sufiĉe preparita por tio, vi ekkonos kaj scios utiligi tiun instruon verkaron. – Tiurilate vere ne ekzistas risko de konfuzo, precipe se vi estos enprenintaj ĉion, kion mi ankoraŭ povos rakonti al vi dum la tempo de nia kunestado! Aparte de tiu ĉi diskonigo fare de la ‚lumantoj‘ *mem*, vi ren-

kontos nur *ruze kaj ŝtele akiritan kaj distorditan* informon pri la majstroj de la ‚Blanka Loĝio‘, fantaziajn senvaloraĵojn, kaj la eldirojn de treege strangaj troentuziasmuloj!–

Ĝuste ĉar tiumaniere estis desegnita totale *karikatura* bildo de tiu respektinda spirita unuiĝo, bildo kiu konfuzas la cerbojn precipe en la *Okcidenta* mondo, gvidas ilin sur malĝustan spuron kaj transdonas ilin al senbrida superstiĉo, la ‚Blanka Loĝio‘ konsideris, ke estis veninta la tempo por kontraŭstari al tiu sen-sencaĵo. Kaj tial, ke ĝi neniam *batalas* kontraŭ io malutila, kvankam kutimante nomi ĝin per ties ĝusta nomo, ĝi agas kontraŭ la eraraj supozoj nur per tio, ke ĝi igas unu el siaj membroj, kiu plenumas la necesajn kondiĉojn, *prezenti* la veron antaŭ ĉies okuloj!“

*

Post kiam la plijunulo estis fininta kaj la blankbarbulo evidente ne intencis kontraŭparoli, la alia, kiu – same kiel la maljunulo – ĝis nun estis aŭskultinta plej atente, prenis la parolon kaj komencis jene:

„Do vivas ankaŭ en Eŭropo membroj de via ‚Blanka Loĝio‘, kaj certe la plej simpla maniero estus iri al unu el ili por ricevi instruadon, ĉu ne?“

„Aparte de tio,“ respondis la plijunulo, „ke neniu membro de la ‚Blanka Loĝio‘ dirus al vi *pli* ol kiom, laŭ lia juĝo, vi tiutempe *povus elteni*, aparte ankaŭ de tio, ke tute ne estas necese, ke vi konu iun majstron

de la „Blanka Loĝio“, por povi starigi vin sub ĝia influo, kaj ke tiu ekstera interkonateco eĉ povus esti pli malhelpa ol helpa al tiu, kiu ankoraŭ ne estas sufiĉe firmiĝinta en si mem – mi parolis pri nur *unu sola* Eŭropano apartenanta al ĝi!

Krom li, kiu estas homo tia, kia ni, kaj preskaŭ timeme evitas kondukti en sia ĉiutaga vivo iel alie ol aliaj homoj de siaj socia tavolo kaj vivorondo, vi nuntempe renkontos *neniun* membron de la „Blanka Loĝio“ ekstere de *Azio* aŭ eble *Norda Afriko* kaj *Arabujo!*“

„Ĉu vi per tio vere celas diri,“ replikis la blankbarbulo, „ke tiu viro vivas en urbo de Eŭropo, meze de la mondo, submetante sin al la reguloj de la konveneco, konformigante sin al niaj vivokutimoj, amante la ĝuilojn de l’ vivo, kiuj mankus al ni aliaj, se ni devus malhavi ilin – koncize dirite: ke li diferencas en sia maniero de vivado neniel de iu de nia speco?! –“

*

„*Precize tion mi volis emfazi per miaj vortoj,*“ respondis la plijunulo, „sed el via intera demando mi aŭdas, ke ankaŭ vi povas imagi la majstrojn de la „Blanka Loĝio“ nur kiel duondiojn, kaj vi probable tre mirus, se vi renkontus unu el il ili, vivantan ie en *Azio*, kaj vidus, kiel li – simile al biblia patriarko, meze inter siaj dekkvar infanoj kaj multaj nepoj, ankoraŭ forta kaj energia – praktikas sian artecan

metion, vivante en alta prospero, kiun li akiris per sia arta kapablo kaj la lerta vendado de siaj produktoj. –

Same kiel mi jam diris al vi hodiaŭ, ke la *vera* spertado de la Spirito ne mallumigas, sed *akrigas* la eksteran, korpan konscion, mi nun devas diri al vi ankaŭ, ke homo de plej alta spirita kono, kono kiu surtere nur sub certaj kondiĉoj estas *ebla*, tute ne fariĝas senutila por la ekstera vivo, sed, male, scias utiligi des pli intense la talentojn, kiujn li ricevis de la naturo por tiu ĉi vivo!

Estus ‚spiriteco‘ mizera, kiu postulus de la homo, al kiu ĝi doniĝas, ke li rezignu la etike ne eksplicite malaprobindajn agrablaĵojn de la surtera vivo, nur por ne endanĝerigi tiun spiritecon! –

Ĉio, kio estas kvazaŭ negoce akirebla per tiaj *fordonado* kaj *oferado* de teraj agrablaĵoj, havas absolute nenion komunan kun la vera *Spirito*!

Estas efektive karakterizaĵo de tiuj vekitaj kaj ekvivintaj en la Spirito, ke ili ne diferencas de siaj samtempuloj kaj samlandanoj per ia kuriozeco de konduto kaj vivmaniero, ke ili vivas kiel ĉiu alia honesta homo kaj restas for de ĉiuj ideoj pri la plibonigo de l' mondo, bone sciante, ke ekzistas sur la tero neniu formo de la vivo de l' homo, kiu povus malhelpi lin esti spirite vekata, sed ke tiu veko ja povas esti malhelpata de la tro granda zorgo pri la formoj de

homa socia vivo, eĉ se tiu zorgo fontas el motivoj plej noblaj! –“

*

„Ĉio tio“, intermetis nun la fizikisto, „sonas ekzakte tiel, kiel mi atendus, se mi antaŭe estus eksciinta ion pri la ekzisto de tiuj realaj spiritaj homoj!

Se io je la nuntempaj konventetoj, kiuj pretendas gvidi siajn anojn al la spirito, mallogis, eĉ naŭzis min, tio estis la nedirebla timo de iliaj membroj antaŭ ĉiu fortoplana esprimado de pozitiva vivosento!

Mi tute ne kapablas akcepti la ideon de ‚spirito‘, kiu faras siajn anojn senkuraĝaj timemuloj, kiuj apenaŭ aŭdacas enbuŝigi mordajon sen la zorgo, ke ĝi povos malutili ilian spiritan disvolviĝon, kaj kiuj suspektas en ĉiu homa agado insidojn de l’ diablo!

Sed mi devas diri, ke via ‚Blanka Loĝio‘ iom post iom fariĝas al mi simpatia!

Ne estas tiom strange al mi, ke homoj eble povas esti konscie interligitaj per speco de eterovibroj aŭ io simila, kaj kvankam mi ankoraŭ ne spertis tion kiel partumanto, mi ne estas sufiĉe malvastaspirita por simple kontesti tiun eblecon, precipe ĉar ĝi estas konfirmata al mi de homo, kiu – kiel mi bone scias – ne estas babilulo, sed posedas sufiĉan kapablon de memkritiko por ne lasi trompi sin per ia ĉarlatanaĵo!

Sed se mi supozas la eblecon de tiu spirita interligiteco, hipotezante ian substraton de oscilado – tie ĉi

mi spontanee pensas pri la Hercaj ondoj –, tiam mi povas bone imagi ankaŭ tian konekton al speco de spiritahoma surtera centralo, kaj se tia konekto fakte estas farebla, ĝi certe estas al mi plej bonvena, se ĝi efikas plivastigon de ekkono similan al tiu, kiun mi hodiaŭ perceptas je vi. –

Afable permesu nun al mi demandi vin rekte kaj malkaŝe: *kiel vi mem trovis* tiun konekton, kaj ĉu iu de nia speco povas trovi ĝin en la sama maniero, indiferente ĉu oni estas, kiel vi, taŭga por esti ‚ĉelao‘ aŭ ne?

Se mi ne eraras, vi ja diris laŭsence, ke ĉiu honesta homo povas konektiĝi en la cirkvitojn de tiuj spiritalaj majstroj, ĉu ne?

Tio donas al la afero *signifon praktikan*, kaj tial mi dezirus ekscii almenaŭ la *kondiĉojn* postulatajn por efektiviĝi ion tian.“

„Ankaŭ mi faras tiun peton“, aldonis la blankbarbulo, kiu, starante antaŭ la vesperkrepuska ĉielo jam brilanta kupreco, povis mem esti facile rigardata kiel maljuna Orientano, kvankam liaj prauloj estis vivintaj en Bretonujo.

*

„Volonte, estimataj amikoj, mi plenumos vian deziron,“ diris la plej juna el la tri, „sed mi dubas, ke mi ankoraŭ tiuĉivespere povos aldoni ion esencan, ĉar se mi volas vere konigi al vi ĉion, kion vi devas scii kiel

bazon por formi vian propran juĝon, ni devos dediĉi pliajn horojn al tiu temo. Cetere, eble estos bone, se mi uzos notojn el tiama taglibro, kiuj estas por mi tiom valoraj – mi preskaŭ dirus: tiom sanktaj –, ke ili akompanas min dum ĉiuj miaj vojaĝoj.

Mi ĝojas el la tuta koro, ke via intereso pri tiuj aferoj vekigis kaj ke mi nun povas paroli al vi tute malkaŝe ankaŭ en tiu ĉi rilato, ĉar estis ĉiam embarase por mi, ke malgraŭ la koreco de niaj interrilatoj, kiuj ja estas la bazo de nia komuna vojaĝo, mi ĉiam havis ion por kaŝi al vi. –

Sed vi certe komprenos, ke oni parolas pri tiuj aferoj ne *pli* ol estas nepre necese, tiom longe, kiom oni devas supozi, ke ĉiu tia eldiro povas igi la aŭskultantojn timi, ke oni ne plu estas de plene sana mensol!“

*

Post tiuj paroloj oni konsentis, ke oni elektos, se eble ĉiutage, kelkajn kvietajn horojn por aŭskulti – unuiginte sub la libera ĉielo, en la klareco de la suda suno – ĉion, kion la ĉelao havos por diri pri siaj ekkonoj.

Dum la parolado oni jam estis atinginta altajn parkomurojn, kiuj etendiĝis ambaŭflanke de la vojo, kelkloke interrompitaj de pli alta portalo kun arkaj ornamlinioj, kadranta arte forĝitan, jam de longe rustintan feran kradon, tra kiu oni vidis la filigranajn

siluetojn de sveltaj oleandrobranĉoj, la profunde malhelan foliaron de laŭroj, kaj kelkfoje fontanon ankoraŭ plaŭdantan en la vespera kvieto.

Tiam ili eniris mallarĝan, preskaŭ senfinan strateton, kiu estis kvazaŭ kunpremita de altaj kastelecaj domomuroj, tiel ke oni vidis supre, tra la mallarĝa linieca ŝakto, nur strion da ĉielo, kiu estis dishakite kadrita de tegmentaj elstaraĵoj kaj sur kiu ekbrilis la unuaj steloj.

La kvieto, tra kiu oni estis paŝinta, nun estis pli kaj pli truata de laŭtaj vokoj, veturilknarado kaj fragmentoj de gaja parolado venantaj el lumigitaj volboj; iu filo de l' sudo, kontenta pri sia taglaboro, kantetis en falseto la aktuale popularan melodion; ĉiam pli multaj pasantoj traŝovis sin tra la mallarĝejo, ĝis oni preskaŭ subite troviĝis sur la dignoplene eleganta foirejo, plena de homoj, de suda urbo malgranda sed riĉa je loĝantoj.

La superabundaj trezoroj de la fruktovendistoj kvazaŭ fontis el la interno de la vendohaloj; jen vidiĝis hele lumigita barbirejo preskaŭ tapetita per brilaj speguloj, jen, apude, elmontraĵoj kun koloraj silkrubandoj, aliaj kun apetite stakigitaj kolbasoj, plej diversaj specoj de fromaĝo kaj tuta arsenalo da longkolaj Kianto-boteloj; jen estis apoteko, kies enirejo estis flankata de du ekscese altaj, mallarĝaj montrofenestroj, el kiuj lumis po unu giganta vitrobalono, la unua

plena de ruĝa, la alia de verda likvaĵo; kaj fine ne mankis la neevitebla kinejo, kies intense koloraj afiŝoj, lumigitaj kun nekredebla malŝparemo, krude malornamis delikatan Renesancan portalon.

Tie kaj tie inter tiuj brilaĵoj oni vidis kafejon, kies tabloj kaj seĝoj ekstere okupis spacon etendiĝantan preskaŭ ĝis la mezo de la placo. Ĉi ties centron formis speco de obelisko, elstaranta el amaso da ondece barokaj formoj meze de plaŭdantaj akvoartaĵoj. Sur ĝia pinto leviĝis, apenaŭ videble en la supra mallumo, Madono staranta sur lunduono kaj ĉirkaŭita de metala aŭreolo.

Nur unu el la mallarĝaj flankoj de la placo restis en malhelo, kaj tie ĉi staris potenca konstruaĵo kun malaltaj gabloj, el kies pordo eliĝis ruĝa ardo kaj kandela lumo, nur iam kaj iam kovritaj de la siluetoj de en-kaj elirantoj.

Apude, svelta kampanilo celis alten al la klara, jam steloplana ĉielo, kaj ĝiaj sonoriloj en la liberaj, altaj rondarkoj de ĝia plej supra etaĝo estis ankoraŭ bone videblaj antaŭ la foriĝanta vespera heleco.

Tie ĉi du el la amikoj adiaŭis la trian, ĉar ili ne ĉiuj loĝis en la sama albergo kaj, krome, oni tiuvespere ne intencis rezisti al la agrabla laciĝo por eble kunesti pli longe.

LA MONAĤEJO „SANTO SPIRITO“

Laŭ interkonsento farita antaŭtate, la tri amikoj forlasis la urbon en la matena heleco por viziti monaĥejon ne tre malproksiman, kiu elstaris el la monteta regiono kiel simbolo, turece situante sur alta, izolita konusa roko, tiel ke ĝi impresis pli kiel spitanta kastelo ol kiel ejo de preĝo kaj paco.

Oni estis dirinta al ili, ke tie supre prezentiĝas grandioza panoramo de la tuta montetaro prisemita per pitoreske aranĝitaj vilaĝoj kaj vilaĝetoj, kaj de la maro borderita per vasta landa entranĉo.

Sed la ascendo, sur malnova pilgrimada vojo pie sanktigita per la stacioj de la Pasiono de l' Savanto, estis priskribita al ili kiel iom peniga kaj plejparte senombra. Tial ili celis atingi la monaĥejon – kie oni povis ricevi ankaŭ refreŝigaĵon por la korpo – se eble antaŭ la tempo de la plej alta pozicio de l' suno.

Ili intencis ripozi tiam, dum la plej varmaj horoj de la tago, sub la libera ĉielo kaj, se eble, daŭrigi la hieraŭ komencitan interparoladon tiom esperigan, ekironte returne al la urbo nur en la malfrua posttagmezo.

Ili havis kelkon da manĝoprovizoj por la vojo – tiom, kiom iliaj poŝoj povis enteni –, ne forgesinte sukoplenajn fruktojn de la lando.

La tri viroj – la plej juna en la mezo – migris vigle kaj grandpaŝe, unue sur preskaŭ rektalinia, polva ŝoseo, sur kiu la suna varmo, malgraŭ la frua horo, jam fariĝis sufiĉe sentebla.

La tritiko sur la apudaj kampoj estis alte kreskinta kaj jam havis verdajn spikojn, kaj ĉiu mallarĝa kampo estis kvazaŭ enkadrigita de pendantaj vitoj, grim pintaj sur malaltaj ulmoj kaj iufoje sur morusarboj, tiel ke ofte ŝajnis, ke la tuta arbo estas vinberujo, ĉar ĝia propra foliaro estis preskaŭ tute malaperinta sub la folioj de la vito.

Intere estis kampoj de artiŝokoj kaj de aliaj specoj de legomo, jen ankaŭ sovaĝa arbedaro laŭlonge de mallarĝaj akvofosoj, alte superita de junaj, sveltaj poploj, kies trunka foliaro estis forigita, tiel ke iliaj kronoj leviĝis kiel altatigaj faskoj al la arĝente blanka, silke brilanta ĉielo.

Post plua vojodistanco, etendiĝis dekstre, en la direkto al la maro, vastaj, riĉaj herbejoj, kelkloke traplektitaj per malaltaj kriplaj salikoj, kaj en la malproksimo vidiĝis kelkaj fiŝistokabanoj duone ruiniĝintaj.

Sed el la turkisa supraĵo de l' maro eklumis, tie kaj tie, okra aŭ oranĝa pinta velo, kiu, kvazaŭ tute ne moviĝante, ŝajnis fiksita al sia loko.

*

Evidente la tri migrantoj ankoraŭ ne estis tre parolemaj; pleje senvorte, ili lasis siajn rigardojn vagadi.

Nur iufoje ili interŝanĝis kelkajn parolojn, kiam iu objekto estis ekscitinta ies intereson, aŭ kiam oni esprimis sian miron, ke en tiu frua horo la radioj de l' suno jam estas tiom intense sentebraj.

Post unu horo, aŭ iom pli, oni estis atinginta surkolonatan statuon de sanktulo, apud kiu disbranĉiĝis la vojo nun irenda por proksimigi sin al la ankoraŭ tre fora rokonuso, kies ombroflanko, vualita de lakteca nebuleto, nun aspektigis ĝin leviĝanta el la dolĉe onda montetaro kiel barbara kuliso.

La migrantoj nun estis eskapintaj almenaŭ el la tro laciga monotoneco de la polva ŝoseo, kaj post ne longe la modere ascendanta kaj multoble serpentanta vojo kondukis tra grupoj da altaj arbedoj kaj arboj, siringoarbetaĵoj kaj kaŝtanujaroj, kies almenaŭ ioman ombron ili sentis tre agrabla.

Tiel pli kaj pli proksimiĝinte al la piedo de l' konusa rokmonto, la tri viroj decidis fari, antaŭ la vera, fina ascendo, mallongan ripozon apud ŝtonkaptita fonto eliganta nur malmultan akvon.

Tie ĉi oni jam estis sube de krute leviĝanta roka muro, el kiu supozeble tertremo estis ĵetinta kelkajn blokojn malsupren; tiuj, surkreskitaj de mola musko, nun prezentis plej dezirindan sidejon en la densa ombro de l' monto, sub potencaj juglandarboj kaj kaŝtanoj.

Ĉirkaŭe, la ŝtoneca tero estis dense superŝutita per sennombraj jam ŝrumpe sekiĝintaj kaŝtanoj kaj ties dornaj ŝeloj; kuŝante inter tiuj, grincis sub la piedoj la distretitaj krustetoj de nuksoj, kio montris, ke tiu ĉi ombra loko estis jam ofte servinta kiel ripozejo al ne malmultaj pilgrimoprocesioj, antaŭ ol ili ekiris la senpekigan krutan vojon, preter la Kalvariaj stacioj, supren al la monaĥejo sur la altaĵo.

Kvankam la akvo estis fluetanta nur malabunde el la ŝtona tubo de la fonto, ĝi ŝajnis al la tri viroj tre delikata refreŝigaĵo, kaj ĉiu ree kaj ree atendis pacience, ĝis lia trinkvazo estis pleniĝinta, por tiam eltrinki ĝin per unu tiro.

Dum gaja interparolado tia, kia estiĝas ĉiam en tiuspeca okazo, ne mallonga tempo estis pasinta; oni estis sufiĉe refreŝiginta sin per la kunportitaĵo kaj la akvo de la rokofonto, kaj nun trovis konsilinde ree ekiri por ascendi la vojon de pentofaruloj.

*

Kiam homoj, kiuj vere havas ion por diri al si reciproke, estas kune irintaj en silento dum longa

tempo, ili, denove trovinte la parolon, ne baldaŭ ĝin reperdos!

La samo aplikiĝis al la tri profanaj pilgrimoj, kiuj nun, ne malproksime de ilia ripozejo, ekvidis antaŭ si, apud kapeleto de la Dolorplena Patrino de la Krucumito, la malkomfortan ŝtuparon elĉizitan en la roko, parte eluzitan de multaj piedoj, sur kiu la vojo nun kondukis laŭlonge de la alia flanko de la rokonuso, en la brula sunlumo kaj sen la plej eta perspektivo je ombrodonaj arboj, alten en sennombraj serpentumoj.

*

„Mi vere imagis al mi, ke tiu ĉi vojo de Kalvariaj Stacioj estas iomete pli bona“, diris la blankbarbulo, kvankam ĝis nun li estis montrinta, ke malgraŭ sia aĝo li kapablis senpene konkuri eĉ kun la plej juna el la tri viroj.

„Nu, espereble tiu ĉi peniga ŝtupara irado ne daŭros eterne“, diris la alia, kaj la plejjunulo ridante aldonis:

„Mi timas, ke tie ĉi ni estas vidantaj eĉ la plej allogan parton de la ascendo, kaj ke tie alte, kie la dezirata refreŝigo ŝajnas jam baldaŭ atingota, la honorindaj Patroj de la monaĥejo estas rezervintaj al ni la plej malfacilan parton por la fino!“

Sed la blankbarbulo, same ridante, respondis:

„Min vi ne timigas per pesimistaj eldiroj, kaj mi ankoraŭ neniom alkalkulas min al senutilaĵo! Mi certe

atingos la supron, eĉ se estos necese grimpi kiel en muro Dolomita! Ne vane mi faris, ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj, la de longe kutimajn, plej malfacilajn montogrimpadojn, dum kiuj kelkafoje la suno same estis tro bonintenca, kaj mi tamen sukcesis!

Sed ĉu nia kara ampleksakorpa amiko ne perdos la emon tie ĉi, estas alia afero!“

Rezulte de la stimulanta migrado la maljunulo estis kvazaŭ reakirinta junecan freŝon; kaj se li ne havus sian eksterajon, laŭ kiu oni devis taksi lian aĝon je certe pli ol sesdek jaroj, oni povus hodiaŭ kredi lin multe pli juna.

Nun efektive plaĉis al li ludi la rolon de pliaĝulo koketanta kun si pri sia juneca forto kaj persisteco; la aliaj du sentis tion, sed gardis sin detruiri lian ĝojon.

„Jes, jes,“ responde diris la pro lia korpulenteco ĵus moketita kunulo, „malgraŭ siaj jaroj nia amiko eble ja estas la plej juna el ni!

Jen li sisteme traserĉas ĉiujn bibliotekojn kaj poste dum semajnoj studas siajn libraĉojn, tamen li havas sufiĉan tempon por aktivi kiel alpisto, tiom ke ekzistas preskaŭ neniuj montogrimpada itinero, kiun li ne trapasis iam en sia vivo, kaj ke li jam tranoktis en ĉiuj Alpaj kabanoj!

Iu niaspeca certe ne povas konkuri kun li!“

Sed nun la maljunulo rifuzis akcepti tion, dirante, ke tiom malfavora por ili la komparo ne estas, kvan-

kam li iom fieras pri tio, ke spite al siaj sesdek tri jaroj li ankoraŭ havas sufiĉe kontentigajn kapablojn.

Per tia ŝerca interparolado – kiu verdire estis mal-multe konforma al la bildo de la sankta virino lamentanta pri sia torturita morta filo, bildo iom senarte skulptita el ligno kaj surpentrita, kiun oni vidis en la kapeleto – oni estis kvazaŭ kuraĝiginta sin reciproke kaj nun jam estis ascendinta ne malgrandan parton de la ŝtupara vojo.

*

Dekkvarfoje la bildoj de horora torturado de homo fare de homoj estis ripetiĝontaj, la unuan de kiuj – ellaboritan tiom senarte kiom la prezento de la ‚Mater dolorosa‘, kiu kvazaŭ gardis la enirejon de tiu Kalvaria vojo – la ascendantoj nun ekrigardis, starigitan en elhakita kavaĵo de la flanka rokmuro.

Sur tiu unua bildo oni vidis junan viron, tremigatan de doloro, sed kun nobla reĝa teniĝo; la supra parto de lia korpo estis nuda, sanganta el sennombraj vundoj de skurĝo, kaj lia kapo portis densan kronon pintadornan.

Sovaĝaj uloj, kun inferaj vizaĝoj kaj gestoj, laŭŝajne tiras lin antaŭ juĝiston, kiu, en indiferenta, inerta kvieto, lavas siajn manojn en pelvo tenata antaŭ li de stultvizaĝa knabo.

Nevole la tri viroj haltadis kaj ilia parolado ĉesis...

*

Ĉu pro la timiga impresio farita de tiu ĉi bildo – estanta meze de abunde riĉa naturo, ĉirkaŭzumata de abeloj kaj ĉirkaŭflirtata de papilioj, senhonte elmetita al la superhela lumo de l’ suda suno –, ĉu pro la ĉiam renovigita suferigo de ilia sentado antaŭ ĉiu nova bildo, ĉu pro la peniga suprenirado sub la pli kaj pli brulanta suno: la tri amikoj nun ascendis silente la ŝajne senfinan ŝtuparon, kelkloke apenaŭ ekkoneblan rezulte de milobla uzo, ĝis ili estis travivintaj la lastan bildon, montrantan kiel oni mallevas la kompatindan torturiton en tombon.

Fine ili nun alvenis al la altaĵo de la monaĥejo, kie ronda porripoza sidejo, elĉizita en la roko, ricevis la lacigitojn.

Antaŭe, ili estis skuata vidintaj, ĉe unu el la lastaj de tiuj terurantaj bildoj, la dekomence turmentitan homon alnajlitan je manoj kaj piedoj al du traboj krucitaj; tie ĉi, sur la supro, nun prezentiĝis al la ripozantoj la bildo sama, sed *arte perfekta*, kreita de iu kiu sciis krei kaj trafluita de profunda ardo de suferado, kiun prezenti kapablas neniu, kiu ne mem estas iam suferinta, – suferinta pro tiuj, kiuj turmentis lin, kaj kiu tamen povis ilin pardoni ...

Jen oni vidis la figuron de senbarba viro rekte staranta sub la tortura krucumilo, formitan per sama *arto*, viro, kiu – aparte de sia bukla hararo – ŝajnis simili al la plej juna el la tri amikoj, kaj la skulptaĵon

de virino tordanta la manojn en profunda funebro, kiu supozeble estis identa kun la Patrino dolorplena gardanta, malsupre, la enirejon de la Kalvaria vojo, por ke neniŭ eniru, kiu ne povas kompreni la misteron de tiu sufero ...

Longe la amikoj sidis tie ĉi, ne pensante pri la reŝeigo laŭdire atendanta ilin sur la altaĵo, ignorante la brulajn sunradiojn, kaj ne dezirante vidi la faman panoramon, kiun oni povis ĝui de la teraso transe de la proksima monaĥejo. – –

*

Nu, estus tre granda eraro supozi, ke la tri viroj hodiaŭ estas vidintaj tiajn bildojn de homa krueleco unuafoje, kaj ke la historio de tiu turmentito estas fremda al ili.

La afero tute ne estis tia.

Kontraŭe, la maljunulo estis ido de tre pia, kristana familio, kaj unu el liaj fratoj estis leviĝinta al alta rango en la sacerdotaro, al kiu li estis promesinta sin en sia frua juneco.

La alia, kiu tiom similis al digna abato, iam estus havinta ĉian ŝancon fariĝi tia altrangulo, se suferigaj duboj ne estus instiginta lin elekti alian studofakon.

La tria kaj plej juna ne estis ano de la Roma Eklezio, sed malgraŭ sia tiutempe juna aĝo estis havinta la oficon de pastro – antaŭ ol li eksidis denove sur studenta benko piede de la katedroj por akiri la scion

necesan por sia nuna profesio – kaj sciinta paroladi kortuŝe al aŭskultanta komunumo pri la turmenta vojo, kiun estis irinta tiu homo, kiel kies laŭdira servanto li estis starinta sur la ambono, dum lia preĝejo estis plena de homoj, ankaŭ de tiaj, kiaj, antaŭ ol renkonti lian parolon, estis vidintaj preĝejpordon jam de longe nur de ekstere ...

*

„Kion ajn oni opinias pri tiu honorinda pia kredmaniero,“ diris la blankbarbulo, rompante la silenton kvazaŭ tavoloce pezantan, „tia prezentado de la suferoj de laŭkrede dia homo por vekigi kompaton kaj sekve la decidon vivi pli puran vivon, ja havas iom da antikva grandeco!“

„Tio certe ne estas kontestebla,“ aldonis la ‚abato‘, ankoraŭ forviŝante la ŝviton de sia frunto, „sed mi ne kredas, ke multaj el tiuj venantaj ĉi-supren sentas iom de tiu grandeco!“

Mi eble tro bone konas tiun specon de kredado ...

Jen oni rapide kaj mekanike preĝas formulon preskribitan antaŭ ĉiu el tiuj bildoj, eble provante boradi en si – obtuze konsciante pri sia kulpo – por eltrovi, ĉu oni povas estigi en si ian specon de teruro kaj kompatato antaŭ la ekde sia infaneco konataj kruelaĵoj kontraŭ senkulpulo, kaj tiam iras tute trankvile, kun la kontentiga sento esti farinta la siaĵon kaj eĉ akirinta

„ĉielan meriton“, al la sekvanta bildo, ĝis oni estas trapasinta la tutan vicon. –

Krome, tiu intenca emfazado de teruraĵoj estas kontraŭ mia naturo!

Mi tute ne estas certa, ĉu tio estas la ĝusta metodo malaperigi malicajn instinktojn en la homo!

La malico kaj fieco jen figuritaj – per malgracia arto, sed kun evidenta plezuro – en la vizaĝoj kaj gestoj de la sbiroj tuŝas la sentemon multe pli forte ol la suferanta digno de l’ turmentato, ne nur tial ke la pentrintoj tie estis pli en sia elemento; cetere, la tuta afero ja estas rigardata kiel *unufoja* okazintaĵo, kaj oni eĉ ne songe memoras, ke en la sekva tempo estis farataj *multe pli teruraj* kruelegaĵoj *en la nomo* ĝuste de tiu turmentito! – – –

Eĉ en la „jaro de la savo“ *mil naŭcent unu*, jen „sacerdoto“, nomanta sin laŭ la nomo de l’ krucumito, skribas en siaj *„Institucioj de la Eklezia Juro“* la homamajn vortojn:

„La sekularaj aŭtoritatoj devas, laŭ ordono kaj komisiono de la eklezio, ekzekuti la herezulon kaj ne plu povas forigi de la mortpuno la personon transdonitan de la eklezio al la sekulara brako.

Tiu puno trafas ne nur tiujn, kiuj forlasis la kredon kiel plenkreskuloj, sed ankaŭ tiujn, kiuj estas baptitaj kaj ensuĉis la herezon kun la

patrina lakto kaj, kiam plenkreskaj, obstine persistas en ĝi.

Tiu puno trafas, ĉie kie ĝi estas enkondukita, ĉiujn refalintajn herezulojn, eĉ se ili volas konvertiĝi, kaj ĉiujn kiuj, admonite, obstinas. ‘ – –

Mi devas diri, ke tre necesa ŝajnus al mi ‚savanto‘, kiu savus de *lia pensado* homon, en kies cerbo povis formiĝi tiom abomenaj pensoj! –

Li vere ne apartenas al la akompanantaro de tiu figurita kiel turmentito en tiuj bildoj; sed tie inter la helpantoj de l’ ekzekutisto, prezentitaj kun tiom volupta ĝojo pri kruelo, estus lia adekvata loko!“

*

„Vi prenas tiajn eldirojn tro serioze,“ diris la maljunulo. „Mia opinio, la respondeco pri tiuj eldiroj de Roma flamiĝemulo, kiujn mi bone konas, povas esti surmetata nek sur la *kompanion* fonditan de la sankta Ignaco de Lojola, al kiu apartenas mia frato kaj inter kies membroj estas kelkaj eruditaj amikoj miaj, kiuj bone scias, ke mi iras mian *propran* religian vojon, nek sur *la eklezion mem!*

Nu, tiu sinjoro ne povas eligi sin el sia tre subjektiva malvasteco!“

*

„Oho! – Li ne povas eligi sin!?“ respondis la fizikisto. „Sed la Roma eklezio ja havas la supersufiĉe

konatan institucion nomatan ‚Kongregacio pri la Indekso‘!

Kial la eklezio ne metas ankaŭ librojn, kiuj propagandas tiajn *barbaraĵojn* en la nomo de tiu, kiu kreis la fundamenton, sur kiu ĝi starigis sian fieran konstruaĵon, sur la ‚*indekson*‘, tiel almenaŭ *formale* malaprobante ilin?!

Laŭ mia scio, ĝi tion *ne* faris!“

„Sed la papa eklezio“, kontraŭdiris la maljunulo, „ja estas tute tolerema en sia hodiaŭa praktiko; male, ĝuste al la kompanio, kies membro tiu sacerdoto estas, oni faras la riproĉon, ke ĝi tro indulgas la homan malforton!“

„Jes, kie tio konvenas al ĝi,“ replikis la alia, „kaj la nuntempa ‚pli tolerema praktiko‘ estas nur *virto de neceso*! Oni povas diri ankaŭ, ke ĝuste tiu tolerema praktiko estas *ege subjektiva* kaj ŝajnas neniom bazita sur tio, kion oni cerbume pretigis al si dum jarcentoj kiel eklezian *jurisdikcion*. Bedaŭrinde oni eĉ hodiaŭ kredas trovi apogon en tiu jurisdikcio – aplikante ĝin, tion mi koncedas, pli rezerviĝeme – kvankam estas bezonataj krudaj, vere *dubindaj* sofismoj por meti ĉion ĉi en ŝajnan akordon, eĉ nur *inter sciantoj*, kun la *instruo de l’ Nazaretano*!–

*

„Vi ĵus parolis pri la *instruo de l' Nazaretano*“, intermetis nun la plej juna el la tri viroj, „kiel pri afero, pri kiu oni facile povas havigi al si informon!

Al tio mi devas kontraŭdiri, ke surtere ekzistas malmultaj aferoj, kiujn oni, ne konante ilin, priparolas kun la sama naiva certeco, kiel la instruon de l' Nazaretano! –

La atestoj literaturaj pri tiu instruo – nomataj evangelioj – dekomence estis raportoj ne rektaj sed *peritaj*. Antaŭ ol ili venis al ni, ili estis ŝanĝitaj en la plej senskrupula maniero fare de la plej diversaj prilaborantoj, ĉar ĉiu provis certigi konfirmon de sia *propra* limigita opinio per la aŭtoritato de l' alta majstro. – Ĉiu el la fruaj kopiistoj legis el la priinstruaj raportoj, kiuj cetere estis nur fragmentaj, *sole tion*, kion li mem kapablis *mense kapti*, kaj kun la plej trankvila konscienco kredis sin rajtigita *ŝanĝi tion al li ne kompreneblan*, ĝis fine ekestis la *lasta* formo de kopioj, kiuj estas por *ni* la *plej fruaj* ankoraŭ atingeblaj tekstoj, sur kiuj ĉiu nia scio ekstera pri la instruo de l' majstro de Nazareto estas bazita.– –

Sed kiu kredas, ke, krom tiuj dokumentoj *literaturaj* de tiom duba kredindeco, iu *tradicio buŝa* povis konserviĝi, tiu montras tre malmultan konon de la homoj kaj de la historio...

Ĉiutaga sperto sufiĉas por instrui al ĉiu juĝisto, ke eĉ la plej kredindaj atestantoj de facile kaptebla

okazaĵo donas raportojn plej diferencajn, kvankam ĉiu el ili kredas diri la tutan veron. –

Sed se oni rigardas iom pli zorgeme la historion de la homaro, vere nur iometo da kritikkapablo estas necesa por vidi, kiel vortoj kaj eventoj povas ŝanĝiĝi dum malmultaj jardekoj por kontentigi iujn dezirojn de potenculoj aŭ la bezonon de la amaso. –

Tial mi tie ĉi eldiras tute malkaŝe, bone konsciante la gravecon de miaj vortoj: – *ke neniu homo sur tiu ĉi tero scias, aŭ povas ekscii, ion certan pri la persono kaj instruo de Jehoŝua de Nazareto tiom longe kiom al li aŭ ŝi ne fariĝis alirebla la instruoj de la ‚lumantoj de la Pralumo‘, ĉar la viro staranta en la centro de la antikvaj raportoj apartenis al tiu unuiĝo spirita de unuiĝintoj kun Dio, kaj kion li instruis, tion li instruis kiel la ‚Patro‘ estis ordoninta al li, – la ‚Patro‘ de tiuj lumantoj, kiun ĉiu el liaj ‚filoj‘ konas kaj pri kiu ĉiu el ili povas diri:*

‚Mi kaj la Patro estas unu!‘

‚Kiu vidas min, tiu vidas ankaŭ la Patron!‘ – – –

Ĉiu el la multaj kredkomunumoj hodiaŭ nomantaj sin laŭ la *nomo* de tiu alta majstro, tiu ‚Sanktoleito‘ aŭ *Kristo*, ja posedas, en la formo de iaj *fragmentoj*, iajn *partojn* de lia instruo kaj provas adapti ilin al sia komprenkapablo tiom bone kiom eble, sed per tiu adaptado plej ofte la plejvaloraĵo perdiĝas. – –

Iuj forigas ĉion, kio leviĝas super ilian propran racionalisman pensmanieron, kaj nekonscie ŝanĝas la instruon de l' majstro en eminentan homan *etikon*, dum la aliaj provas atingi per *devigo*, ke restu konservita tio, kion ili mem interpretas nun erare.

La eklezio de Romo malsanas je *fiereco pri sia praularo*, simile al nobela familio, por kiu la nombro de antaŭuloj fariĝis pli grava ol la propra nobeleco, – dum la branĉoj de ĝi *malligiĝintaj* forgesas, ke por prosperado estas bezonata *,grundo'*, kaj tial ili ne plendu, se ili iom post iom perdas sian vivoforton! –

Kiu *vere volas* fariĝi disĉiplo de l' majstro de la evangelioj, tiu ne kredu, ke li dependas de tiuj homaj institucioj, eĉ se li povas trovi, en iu aŭ alia el ili, multon kiu estas al li konforma kaj parolas al lia animo!

Tamen: ankaŭ ne per *malligiĝo* disde tiuj komunumoj li pliproksimiĝas al la majstro, sed nur per *pliprofundigo de sia propra ekkono*, kiu povas esti eklumigata en ĉiu kredoformo!

Ni do ne plendu pri la malsaĝeco de aliuloj, sed *serĉu mem la saĝon!* –“

*

Nun ĉesis portempe la plej juna el la tri viroj, kaj al liaj paroloj, emocie eldiritaj kaj emociantaj, sekvis profunda, preskaŭ senspira silento.

Estis, kvazaŭ la krucumito, sub kies artisme farita bildo la tri nun estis starantaj – nekonscie levinte sin dum la parolado –, benante etendus siajn traboritajn manojn super ilin, kaj kvazaŭ la viro kaj la virino, kiujn oni vidis sub la kruco dronintaj en doloro, volus ĉerpi konsolon el la vortoj de l' entuziasmiĝinto ...

Oni estis restinta tie ĉi multe pli longe ol estis intencite, kaj la tri amikoj nun paŝis – kun sento de sankta eksciteco, elirinta de l' parolinto kaj komuniĝinta al la du aliaj – tra la floranta ĝardeno plej zorge vartata de la monaĥoj, al la proksima abatejo.

Antaŭ la superabunde orname skulptita baroka portalo ili haltis.

Al la peza tirilo el forĝita fero obeis sonorilo, kies malaltan tonon oni aŭdis el la interno de la monaĥejo, kaj tuj poste estis malfermata malgranda pordo en la potenca ligna skulptita pordego ĉirkaŭita de la ŝtona portalo.

Korpulenta frato Franciskano ridetante salutis la alvenintojn kaj post ilia eniro tuj fermis la enlasejon, kiu, kiel pordo en pordo, tute ne ĝenis la arkitekturan dispozicion de l' tuto, eĉ ne kiam malfermita.

La amikoj troviĝis en alta, ne tre luma halo, dum la frato pordisto iris antaŭ ili kaj tiam gvidis ilin laŭ kelkaj ŝtupoj, kiujn atenti li zorgeme rekomendis al ili, en malgrandan volban ĉambron, kiu estis provizita per sufiĉaj tabloj, benkoj kaj seĝoj kaj kies kalkitaj

muroj havis neniun alian ornamon ol grandan nigran, lignan krucifikson.

Ĉi tie li, kiu evidente devis zorgi pri la korpa refortigo de vizitantoj, petis la tri virojn atendi, kaj baldaŭ revenis portante grandegan pelvon da vaporanta minestrone, tiu plej bongusta Itala legomsupo, kiun li metis antaŭ ilin.

El mura ŝranko li prenis telerojn, kulerojn kaj glasojn, remalaperis kaj revenis kun longakola botelo ĉirkaŭplektita per basto, kun stana telero, sur kiu kuŝis stangoforma blanka pano, kaj kun pelveto plena de raspita fromaĝo, kiun laŭ tiulanda kutimo oni ŝutetas sur la supon.

Tiel provizinte la gastojn, li deziris al ili apetiton kaj forlasis la ĉambron.

La minestrone gustis delikate, pano kaj vino estis bonvena aldonajo, kaj ĉar oni estis ne malmulte malsatiĝinta antaŭ ol eniri tien ĉi, la frato kuirejestro estis vidonta je la malplenigita pelvo, ke la prezentajo devis esti trovinta plenan aprobon.

Oni ĵus estis kontentigite ĝuinta la lastan mordajon, kiam la servanta frato reaperis kaj, vidinte la malplenan servicon, ŝerce diris, ke la gastoj nun supozeble ree estas kapablaj elteni ioman fortostreĉon kaj tial li volonte montros al ili la malnovajn arkadojn en la korto kaj la internon de la monaĥeja preĝejo.

Pagon por la manĝo li ridetante rifuzis, dirante, ke oni povos kompensi tion per ajna pia dono por la monaĥejo post la fino de lia gvidado.

*

Tiu gastameco de la monaĥoj estas io tre bela, kaj estas bedaŭrinde, ke inter la gastoj estas tro multaj, kiuj tre volonte donon *akceptas*, sen doni ion el la siaĵo *rekompence*, tiel finfine devigonte la monaĥojon, kie ĝis nun ekzistis tiu konfidanta preteco por afabla gastigado, ĉesigi tiun ĉi bonan malnovan kutimon.

*

Kiam ili eliris el la gastoĉambreto, la „abato“, kiel la fizikisto ofte estis ŝerce nomata de liaj amikoj, diris kun gaja kontenteco: „Tion mi nomas praktika kristanismo!

Jen oni ne demandas, ĉu la gasto estas pagano, judo aŭ kristano, kaj laŭ kiu *maniero* li deziras esti tio, aŭ ĉu li havas *monon* kun si aŭ ne; kaj oni konfidas al tute fremdaj homoj, ke ili estas sufiĉe prudentaj por reciproki donon per dono!

Estas ja mizere, ke la „piuloj“ en la ekstera mondo ĉiam timas, ke ili pekas, se ili donas al iu, kiu ne estas ĵurligita al ilia kredkonfeso, eĉ nur afablan rigardon!

Jen ekzemplo de eklezia praktiko *praa*, kiu eble ja estas imitinda!“

*

Sed ne estis tempo sufiĉa por paroli detale pri la dezirinda stato, kiu povus estiĝi sur la tero rezulte de tolerema konduto inter la homoj, kvankam ĉiu el la du aliaj volis diri, ke la parolinto estas prava; ĉar sendube estas vere, ke la homoj bone scias vivi en paco tiom longe, kiom ne venas al ili en la kapon senhonte malaltigi siajn plej internajn konvinkojn al komercaĵo: en tiu foiro ĉiu volas, ke *lia* aĉetaĵo estu taksata plej alte, kaj tuj fariĝas kolera, furioza kaj malica, se aliulo diras, ke *li* faris la *pli bonan* elekton kaj *lia* ŝpinaĵo transvivos ĉiujn aliajn. –

*

La tri viroj, kaj la antaŭiranta servanta frato, post kelkaj paŝoj alvenis je vasta niĉo, kie prezentiĝis la Pentekosta miraklo en same senarta formo kiel la priturmentaj bildoj antaŭe viditaj, skulptita el ligno kaj multkoloro surpentrita.

Meze inter la dudek disĉiploj de l' sanktoleito tronis ne plu la *proklaminto* de la „bona mesaĝo“, sed *lia patrino*.

La *virino* estis preninta la lokon de l' viro.

„*L'Eterne Virina* tiras nin supren“, rimarkis la plej-junulo kvazaŭ parenteze, tamen kun profunda seriozeco.

La gvidanta frato opiniis, ke la bildo estas granda artaĵo, precipe tial ke ĝi ja havas tiom intiman rilaton al la nomo de la monaĥejo, ĉar la langoj de fajro, jen

super ĉies kapo, ja simbolas la Parakleton, la „*sanktan spiriton*“ . –

Kontenta pri la videbla plaĉo, kiun la vizitantoj liaopinie trovis en la por li tiom ‚nature‘ formita skulptaĵo, li kondukis ilin en la refektorion, la manĝejon de la monaĥoj.

Etoso de solena distingiteco plenigis tiun ĉambregon.

Sur la muroj estis ne malbonaj, bibliaj freskoj de malfrua Itala arto, kaj ĉirkaŭe, antaŭ la intense bruna ligna murpanelaĵo, staris longaj tolkovritaj tabloj, sur kiuj oni jam vidis – antaŭ ĉiu el la primitivaj taburetoj – po unu pelveton kaj panon destinitajn por la vespermanĝo de la monaĥoj.

Je la mallarĝa flanko de la ĉambrego modere lumigita de tri mallarĝaj, malgrandaj rondarkaj fenestroj, oni vidis – sub preskaŭ laŭnature granda bildo de l’ krucumito, kiu, pentrita sur ligno, montris la ‚viron de doloroj‘ pendumitan sur nigraj krucitaj traboj, kaj, super lia kapo, tri arĝentajn kronojn, el kiuj la unua havis kvin, la dua kvar, kaj la plej alta tri pintojn – la tablon de l’ monaĥejestro, malantaŭ kiu leviĝis, anstataŭ tabureto, alta tronfotelo.

Sed kontraŭe, tie kie la tri fenestroj trarompis la muron de la alia mallarĝa flanko, staris, en angulo, malgranda ambono kun pupitro, kaj la frato eksplikis al la tri ion, kion ili jam sciis: ke tie oficas la voĉ-

leganto dum la manĝado, por ke dum la tempo de necesa korpa refortigo ne manku la sankta spirito.

La tutan ĉambregon plenigis forta, sed ne malagrabaodoro de kuiritaj legumenoj, kiu ŝajnis elflui el la muroj, el la taburetoj kaj eĉ el la ambono kaj strange kontrastis kun la aromo de incenso perceptebla en la altaj, longaj koridoroj kondukantaj al la manĝejo.

Kiel ĉiam okazas, kiam oni eniras ĉambrojn, kiuj tiutempe ne servas sian destinton, tiel okazis ankaŭ nun: oni ĝojis pri sia eliro el la refektorio kaj volonte lasis sin gvidi renkonte al pli kaj pli sentebla freŝa aero de ĝardeno.

Post anguleca vojo labirinta, oni atingis la faman arkadaron de la monaĥejo, formitan de frua pieco per alta arto.

Tie ĉi estis granda kvarangulo superabunde kovrita de rozoj, kaj eĉ ĉirkaŭ la delikataj kolonetoj sur la balustradoj, apartigantaj la larĝan koridoron disde la ĝardena grundo, volviĝis dornaj rozobranĉoj ĝis sub la volbo.

La korto vere estis beatiga paradizo, kaj la piaj fratoj certe estis enviindaj pro tio, ke ili ĉiutage povis ĝui la favoron preĝi tie sian brevieron!

Kiom dolĉe devis esti, en ĉi tiu malvarmeta promenejo ĉirkaŭ rozujaro, levi sian koron al la „*Rosa mystica*“!

Kiom proksima oni sentis sin tie ĉi al la beatuloj, kiuj antaŭ la trono de la Ŝafido sonigas sian „*Laudamus te*“* eterne.

Sed verdire ne decas al profanoj, tro longe kunsenti en sia imago la beatecan feliĉon de piaj monaĥoj, kaj oni devis do forlasi tiun lokon rezervitan al silenta enprofundiĝo kaj sankta interparolo, por esti kondukata de la ĉiam bonkore ridetanta gvidanto en la monaĥejan preĝejon.

Tie ĉi estis plej rimarkinde, ke la preĝejo kvazaŭ staris sur *pli frua* preĝejo, en kiu – nun estanta la *kripto*, t. e. la subtera ĉambro, de la hodiaŭa – ankoraŭ staris la antikva *pagana oferaltaro* – nun purigita de ĉio malbona kaj konsekrita de la episkopo –, sur kiu en antaŭkristana tempo la paganaj sacerdotoj estis oferintaj al dio nomata de ili „*Viviganto*“, sed kiun oni estis jam antaŭ longe ekkoninta, lume de la revelacio, kiel malican „diablon“ kaj elpelinta el lia templo.

„*Santo Spirito*“ nomiĝis nun tiu ĉi preĝejo kaj laŭ ĝi la monaĥejo, kie en praa tempo staris sanktejo, al kiu en la tuta regiono neniu aŭdacis levi la okulojn krom de malproksime, ĉar eĉ la roko, sur kiu ĝi estis konstruita, estis rigardata kiel sankta, ŝajnante esti levita el la monteta tereno nur per dia vorto. – –

* Latina frazo signifanta: „Ni laŭdas Vin“. (Rim. de la tradukinto)

„*Veni creator spiritus*“ – Venu, Kreanto *Spirito!* – citis la plej juna el la tri. „Kiom longe ankoraŭ vi volas igi nin atendi?!“

Kaj la servanta frato ridetante kapjesis, aŭdinte al li tiom bone konatajn vortojn, kiuj devis sugesti al li, ke la parolinto estas vere pia filo de la sankta eklezio ...

Ankaŭ inter profanoj, li pensis, laŭ la aranĝo de Dio iufoje estas animoj piaj, kaj kvankam por ili estas tre malfacile atingi savon, tamen tiu bona kono de sanktaj vortoj montras, ke la parolinto estas ne tute perdita. –

Li gvidis la tri virojn, laŭ kruta ŝtuparo elĉizita en la roko, returne al la supra parto de la preĝejo, kies konstruo estis komencita, supozeble ankaŭ finita, en la unua tempo de la kristanismo kaj kiu tiam, en tempoj de milito, ree kaj ree estis detruita. Ĉiam denove rekonstruita en la stilo de la koncerna tempo, ĝi fine konserviĝis en tiu riĉa baroko, kiun oni tiom ofte renkontas en Italaj regionoj: la stilo de plej petola sankteco.

Tie ĉi li atendis, ke ili miregu pri la diversaj altar-pentraĵoj; sed evidente tiuj vizitantoj ne estis spertaj pri arto, ĉar ili trovis nur malmulton vekantan ilian admiron.

La Franciskana frato eĉ iom malĝojis!

Nur bildon de la pentanta Magdalena, kiu prezentiĝis kiel ino preskaŭ pekige natura, bildon – laŭdire

pentritan de disĉiplo de l' granda Ticiano – kiun oni jam de longe volonte vendus al la antikvaĵistoj de Florenco, se ili estus pretaj pagi la prezon postulatan de la monaĥejestro, nur tiun bildon ili ne ĉesis rigardi – eĉ ne la junulo, kiu ja antaŭe sciis tiom sanktajn vortojn! La frato ĉagreniĝis kaj kelkmomente ne plu kapablis rideti tiom afable, kiom li kutimis vidalvide al tiaj distingitaj vizitantoj de l' monaĥejo.

Kiom da malagrablajoj, li pensis, tiuj profanaj homoj kaŭzas, kaj kredeble la diablo ĉiam iel tenas ilin je la kolo!

Bone estas al tiu, kiu tie ĉi trovis rifuĝon kiel li mem, ne plu konfuzita de la avidoj de l' mondo kaj eskapinta el ĉia aroga malhumileco!

Nevole la kompatinda frato manageste krucosignis sin ...

Sed tiam li revigliĝis, kiel estis lia devo kaj ĉar tio ankaŭ akirigas ĉielan meriton, silente kaj rapide preĝis mallongan preĝon por la fremduloj – kiuj, kvankam ili parolis la melodian lingvon de lia lando, eble tamen povis esti „herezuloj“ –, tusetis kaj nun montris al ili, senĉese eksplikante, la tombojn de alte nobelaj protektintoj de la preĝejo en riĉe ornamita flanko kapelo, kaj li perdis sian lastan iluzion, kiam eĉ tiu vidindaĵo ne aparte impresis ilin.

Gvidante la fremdulojn tra la longajn koridorojn al la elirejo, li pensis pri la multaj danĝeroj, kontraŭ kiuj la Eternulo estas gardinta lin.

Ne danĝeroj por la *korpo*, ĉar tiujn li *neniam* multe atentis, eĉ ne tiam, kiam li donis al la frato de sia Rozeta pikon de ponardo, je kies sekvoj tiu fine mortis. —

Nu, kial do li estis embuskinta ilin?!

Feliĉe Rozeta antaŭe estis malfideliĝinta al li kun alia viro, kiel li poste eksciis, kaj tial la alia estis suspektata — kio verdire estis justa „puno“ —; en la mallumo de tiu nokto la kolera atakanto, veninte por venĝi la honoron de sia fratino, ne povis ekkoni tiun, kiun li mem volis mortigi ...

Nun Rozeta jam de longe estas brava edzino havanta duonan dekduon da infanoj, kaj tre ĉaste mallevas siajn okulojn, kiam, veninte supren al la monaĥejo je specialaj festotagoj, ŝi iufoje renkontas lin, fraton Izidoro. —

Jes, estas *malfacile* vivi en la mondo kaj tamen fariĝi beata! — *Tre malfacile!*

Eternan dankon al la sankta Virgulino pro tio, ke tiutempe, kiam post la entombigo de l' frato de Rozeta li estis fervorege preĝinta, ŝi trovis bone doni al li la penson, ke kiel pentanta frato tie ĉi supre en la monaĥejo li ja povos ricevi pardonon pri sia peko! —

Ankaŭ la *suspektito* poste estis deklarata *senkulpa* pro manko de pruvo.— —

Enprofundiĝinte en tiajn pensojn, li estis reveninta kun siaj fremduloj al la sama pordo, kiu ebligis lasi eniri kaj eliri unuopajn vizitantojn de l' monaĥejo sen malfermi la potencan pordegon.

Tie ĉi li rememoris sian devon, donis sian plej afablan rideton, akceptis — dankante en la nomo de Dio — la gastajn donojn, kiujn li ne rigardis, kaj fermis post la tri vizitintoj la pordon kun sento ne malsimila al tiu, kiun devus havi sankta Petro, se li estus kondukinta kelkajn diablojn tra la ĉielaj tronhaloj kaj nun ĝojus pri ilia foriro ...

La ofico de frato pordisto vere ne estas facila!

Daŭre tiel interrilati kun profanoj, kvankam oni jam antaŭ longe ĵurpromese ligis sin al la ĉielo — tio ja estas malmilda, akra pentofaro!— —

Danko al Dio! Almenaŭ hodiaŭ gastoj ne plu estas atendotaj!

*

La tri viroj nun ĉirkaŭpaŝis, okaze farante rimarkojn pri la viditaĵoj, la vastajn konstruaĵojn de la monaĥejo, por fine atingi la eksteran terason, pri kiu ili estis aŭdinta, ke tie oni povas ĝui grandiozan vidaĵon.

Reale: prezentiĝis nun al iliaj okuloj panoramo, al kiu apenaŭ iu ajn alia estis komparebla, eĉ en Italaj regionoj.

De sur plej kruta rokaltaĵo oni ekvidis vaste etendiĝantan montetan terenon, vilaĝojn, domaretojn, unuopajn farmdomojn, kiuj troviĝis ĉirkaŭitaj de malhela, griza verdo, kiel hela brodaĵo en malhela veluro.

Kelkloke la malhela verdo estis interrompita de helaj, arĝente grizaj areoj: olivarbaretoj alfleksiĝantaj al monteta deklivo.

El ĉiu vilaĝo elstaris alta kampanilo, kaj, simile al blankaj kruroj de araneo, palpe etendiĝis la vojoj, ŝoseoj kaj irejoj, ĉiuj kondukantaj de la ebenaĵo supren al iu placeto, kurbaj aŭ angulecaj, en la malhelan landon.

En la direkto al la alia flanko, la tereno ebeniĝis kaj kuŝis antaŭ la rigardo kiel etendita mapo.

En la malproksimo oni vidis ion ruĝete flavan, meze de la kampoj, herbejoj kaj ĝardenoj, kiun oni unuavide povus preni por ŝtonminejo, se formoj regule angulaj ne malkaŝus la efikon de homa agado.

Tio ruĝete flava, paligita de delikata opala vualaĵo plidensigita de fumo el kuirejoj, estis la vasta urbo kun siaj duavide bone ekkoneblaj palacoj kaj gracilaj turoj, ĉiu akcentita de la ĉirkaŭa malluma maso de parkoj, el kiuj ekbrilis helaj makuloj: la vilaoj en la

eksteraj urbopartoj, ofte superitaj de nigraj cipresopintoj aŭ larĝaj piniokronoj.

Kun alta horizonto ĉirkaŭis tiun tutan bildon la vaste videbla maro, etendiĝanta grize verdeta, mem ĉirkaŭata de la turkisa ĉiela vastaĵo kiel de senlime fora, lumanta muro, sur kiu pale violaj, striformaj nuboj provis fari delikatan orlon.

En la *altaĵo* de la ĉiela muro la pala lazuro plifortigis, pli kaj pli klare montrante, ke tiu muro estis nur maldensa vualo antaŭ la senlima kosma nokto, kiun la lumo de la tera suno scias kaŝi al la okulo, kaj alte supre, en la zenito, tiu vualo fine ŝajnis tiom nesubstanca, ke oni kredis vidi tra ĝi la nigran mallumon de la universa spaco.

Neniu sono atingis la orelon.

Sole la *okulo* ricevis impresojn, tiel ke oni povis facile subfali al la trompiĝo, ke tie ĉi oni staras antaŭ grandioza *bildo*, kaj ne kiel plej eta portanto de konscio meze de apenaŭ menciinda cirkla parto de la surfaco de unu el la plej malgrandaj planedoj, kiu senĉese rapidegas laŭ sia orbito ĉirkaŭ la malproksima vivodona patrineca astro. — —

La tri viroj sentis la inklinon resti tie ĉi tre longe en silento. Ŝajnis, ke oni estis senvorte interkonsentinta, prefere ne plenumi sian originan intencon daŭrigi tiuĉiloke la interparoladon de la hieraŭa tago, precipe

ĉar nun estis la horo por iri returne, se oni volis atingi la urbon antaŭ noktiĝo.

Oni do tuj ekmarŝis, kaj preskaŭ miris, kiom baldaŭ oni ree troviĝis je la malsupra, matena ripozejo.

Kvankam dum la plua vojo oni okaze diris kelkajn vortojn, ŝajnis, ke neniu el la tri sentis sin instigita deziri pli detalan kaj daŭran interparolon.

Oni povus opinii, ke, simile al la malabunda fonto apud la matena ripozejo, la pensoj volas kolektiĝi kiel la akvo en trinkvazo antaŭ ol prezenti sin por esti ĝuataj. –

Dum la silento oni nevole duobligis la rapidecon de l' paŝo, rezulte de kio oni revenis en la urbon multe pli frue ol oni antaŭe supozus.

Malgraŭ la tiuĉitaga longa marŝado, la migrintoj sentis sin multe tro freŝaj, ol ke iu el ili povus ekdeziri pasigi sola la reston – pli ĝuste la vesperon – de la tago.

Ili do interkonsentis preni la vespermanĝon kune, tiucele elektante gastejon, kiu estis fama pro siaj kuir-rejo kaj kelo. Krom tiuj avantaĝoj ĝi havis, kvankam situanta meze de la urbo, pergolon kiu limis vastan ĝardenon, tiel ke oni povis esperi ĝui, en la libera aero, unu el la delikataj noktoj de la sudo.

Tie, ili opiniis, eble prezentiĝos okazo plenumi kviete kaj agrable en la vespera malvarmeto la inten-

con, posttagmeze prokrastitan, daŭrigi la interparoladon.

SUDA NOKTO

„*Trattoria del duomo*“ nomiĝis la gastejeto, en kiu la amikoj nun troviĝis.

Oni unue trapasis mallarĝan, longan manĝejon kun blankigitaj muroj, sur kiuj kelkaj presitaj oleobildoj patriotaj de malalta kvalito efektis kiel groteskaj makuloj.

Nur malmultaj gastoj sidis ĉe la blanke kovritaj tabloj, prenante sian vespermanĝon, en lumo multe tro akra por la dimensioj de la sobra ĉambro.

Oni do sentis sin, irinte eksteren tra malantaŭa por-do, tiom blindigita – malgraŭ kelkaj elektraĵoj lampoj primitive pendigitaj sur la branĉaro de la pergolo – ke oni vidis ĉirkaŭ la sporadaj malfortaj lumrondoj nur absolutan mallumon.

Sed post nur minutoj la okulo estis reakirinta sian vidpovon, perditan kaŭze de tiu barbara blindigo, kaj klare ekvidis la konturojn de la ĝardena foliaro, malantaŭ kiuj leviĝis la tegmento de la precipa preĝejo kaj, apude, la kampanilo, flankita de grupoj da profunde nigraj cipresoj, supozeble radikantaj ene de la ĝardeno.

Sur la alia flanko, multangulaj domokornicoj finis la bildon, kiu estis kvazaŭ kadrita de la malforte lumigitaj vitofolioj de la laŭbo. El la plej profunda fono radiis hela noktoĉielo jam trabilata de la leviĝanta, sed tie ĉi ankoraŭ ne videbla luno, ĉielo, el kiu la densa stelaro sendis sian lumon malsupren al unu el siaj plej etaj fratoj – al la malgranda planedo Tero.

Post la intensa varmo sentita dumtage, oni estis danka pro la modera vespera malvarmeto, kiu faris la sidadon en libera aero vere ĝuega refreŝigo.

Rapide indikinte siajn dezirojn al la ĝentila kelnero, tuj sekvinta ilin de la enirejo, ili post tre mallonga tempo estis jam prenantaj plej apetitan manĝeton, kaj esprimis ĉian laŭdon pri la eminente bona *‘barolo’*, Piemonta ruĝa vino, kiu, estante nek acerba nek dolĉa, sed plena de tipe aparta gusto, ŝajnis ne tute maltaŭga por malligi la langojn.

Kiam buterece mola *‘stracchino’* – tiu milda, ege bongusta fromaĝo Lombarda, kiu, sur la hela pano de la lando, povas esti altranga delikataĵo – estis fininta la manĝon, la plej maljuna el la tri, al kutimiĝinta persisti tenace en tio de li planita, trovis konsilinda ellogi nun la interparoladon prokrastitan de la dumtagaj pasaĵoj, ĉar li ja atendis aŭdi ne malmulton, kaj se tiuĉivespere oni ree evitus paroli pri ĉi tiuj aferoj, li certe ne havus kvieton.

Do li komencis:

„Ĉu vi ne pensas, juna amiko, ke ĉi tie kaj nun estus la ĝusta loko kaj bona horo por sciigi nin pri ĉio, kion vi promesis rakonti al ni hodiaŭ, sed ĝis nun retenis?

Mi opinias, ke estus malfacile trovi ĉirkaŭaĵon de pli adekvata etoso, kaj super ni la eternaj steloj kva-zaŭ postulas, ke oni parolu tie ĉi pri temoj profundaj kaj ke vi malkaŝu al ni – kiom vi trovos bona – tion misteran, kion vi eble renkontis!“

La ‚abato‘, kiu antaŭavespere dum la migrado laŭ la marbordo estis iniciatinta tiun demandon, ĝoje konsentis, kaj la plej juna el la tri, al kiu direktiĝis la peto, nun montriĝis tute preta plenumi ĝin, sed atentigis ilin, ke oni apenaŭ povos restadi tie ĉi tiom longe, kiom estus necese por aŭskulti ĉion, kion li havas por komuniki.

*

Li komencis per tio, ke li koncize priskribis sian gepatran familion, en kiu profunda kristana pieco laŭ la doktrino reformita estis kvazaŭ hereda, kaj honore rememoris precipe sian patrinon, kiu estis sciinta veki en la animo de sia infano la sopiron al diaj aferoj tiel, ke pli malfrue, akirinte la abiturientecon, li estis tute certa pri la elekto de sia profesio: ĉar nur kiel pastro meze de kredanta paroĥanaro li tiutempe kredis trovi la feliĉon de sia vivo. –

Li plue rakontis pri la unua gaje feliĉa tempo en la ofico, akirita post la fino de studado, ĉe la eklezio de sia konfesio, en malgranda, sed spirite treege vigla urbo, kaj pri la multaj ĝojoj, kiujn la animzorgado estis doninta al li.

Sed tiam ekaperis en li, preskaŭ subite, la unuaj gravaj duboj, ĉu tiuj antikvaj raportoj, redaktitaj de sennombraj reviziantoj preskaŭ ĝis nereconebleco kaj nomataj la *evangelio*, vere povas ankoraŭ esti rigardataj kiel „vorto de Dio“. Dum multaj monatoj, en kiuj la juna predikisto ofte pasigis tutajn noktojn studante bibliokritikajn verkojn, tiuj duboj fortiĝis iom post iom ĝis la plena certeco, ke ekde nun lia profesio lin devigos drapiri homajn opinion kaj statuton per nemeritata dia aŭtoritato. Li ekkonis ankaŭ, ke eĉ tiuj viroj, kiuj pasintatempe faris la vorton de l' evangelio la sola bazo de la kredo, multoble eraris, tial ke ankaŭ ili konis la antikvajn raportojn nur en tiu formo, kiu estis donita al ili en la komenca periodo de la kristanismo por tiumaniere apogi ĉiuspecajn doktrinopiniojn.

Moderna teksta kritiko estis pruvinta kun plena certeco, ke kelkaj amataj vortoj de l' Sinjoro estis postaj enŝovaĵoj, kaj sub la sondilo de l' esploristo la abundo da mirakloj estis fariĝinta pia legendo.

Mordetanta anima turmento plenigis la koron de l' juna ekleziulo, kiam li fine estis ekkoninta, ke li ne

plu kapablas proklami la kredon de siaj prapatroj kun konvinko.

En tiu stato de anima mizero li malkovris sian koron al sia eklezia superulo, kiu, kun amoplena kompreno, provis ĉion por igi lin tamen resti en sia ofico, sed neniel sukcesis trankviligi liajn skrupulojn, kiuj jam estis decidigintaj la junan pastron rezigni sian profesion antaŭe tiom ĝoje aspiritan.

Nekredeble malfacile estis komuniki tiun decidon al liaj grandaĝaj gepatroj, sed kontraŭ atendo ili bone komprenis lin, tiel ke lia patro ebligis al li komenci novan studadon surbaze de lia talento por matematiko; antaŭ ne longe, post la fino de l' studado, li aligis sin al granda industria entrepreno, en kies vigla atmosfero li estis trovonta sian kampon de aktiveco.

Antaŭ la komenco de lia nova profesia laboro, lia patro – la patrino estis rabita de la morto baldaŭ post lia reekstudado – plenumis longe karesitan deziron lian, disponigante al li la rimedojn por vojaĝo en la Orienton, tiel ke li povis dum jarduono rigardi feliĉaokule la miraklojn de pli sudaj latitudoj; krome, lia nova agosfero ne estis malfermota al li pli frue.

Sed *nun* li pasigis sian unuan, sufiĉe longan *ferio-tempon*, kaj estis tute nature, ke li sekvis sian alsudan sopiron, kiu kondukis lin en Italion, kune kun la du pli maljunaj amikoj eruditaj, kun kiuj li estis ekriatinta en la loko de sia nova agado.

Ion el tio, kion li rakontis, ili jam sciis, alio estis nova por ili, sed li kredis tiun biografieton necesa, por ke oni povu envicigi tion sekvontan.

Respondinte kelkajn demandojn de la pli maljunaj amikoj, li plue diris:

„En tiu ĉi skizo de mia vivo mi intence ankoraŭ ne menciis tion, kion vi ja volas aŭdi de mi antaŭ ĉio alia, ĉar nur nun mi povas priskribi al vi en interligiteco, kiel eniris mian vivon kaj plue efikis tio, al kio mi hodiaŭ ŝuldas la tutan certecon de mia animo kaj kio atingis min, kiam mi estis en stato de vera anima dezertiĝo, kiu lasis al mi nenion alian ol la mizeran kredon je ‚realo‘ kiun oni povas mezuri, pesi, prikalkuli kaj fine palpi per la manoj.

Do aŭskultu nun!

*

Estis en tiu granda urbo, kie mi, anime tute elĉerpita kaj dubanta pri ĉiu ebleco de spirita ekkono, ree ekkomencis studadi kaj devis streĉi mian tutan energion por plenumi en tiu animstato ĉiujn postulojn de mia studado kaj por ne esti hontigata de la tiom multe pli junaj kunstudentoj.

Mi estis trovinta ĉambron iom proksime de la politekniko, kaj ĉar mi unue apenaŭ povis elporti esti inter homoj, mi postprelege ĉiam klopodis atingi tiun mian rifuĝejon tiom rapide kiom eble, kaj la famaj vidindaĵoj de la urbo por mi preskaŭ ne ekzistis.

Dum longa tempo doninte min al tiu memelektita kaptiteco kaj fartinte en ĝi ne tro malbone, mi tamen eksentis en iu varma, bela somera tago la inklinon iri al granda parko ne tro malproksima. Ekde tiu unua trarompo de mia soleco mi iris tien preskaŭ ĉiu-vespere, kaj baldaŭ mi konis la tutan reton de interplektitaj vojoj, kiuj kondukis laŭlonge de akvofluaĵoj, preter lagoj, trans pontojn kaj pontetojn, fine el la vartata parkpejzaĝo eksteren en la liberan naturon, en veran sovaĝejon arbaran kaj herbejan, kie oni estis certa renkonti neniun vivan estaĵon krom, kelkfoje, fuĝanta kapreolo krucanta la vojon, aŭ fazano fortimigita el arbeto kaj, inverse, ofte ektimiganta la solecan migranton per sia subite bruanta ekflugo.

Sed iun vesperon mi rimarkis, ke tiuĉifoje *ne mi sola* estis serĉinta tiun solejon.

Alta, malhela figuro – kiom mi povis vidi, blankbarba maljunulo – ŝajnis je modera distanco sekvi miajn paŝojn, kien ajn mi direktis min, kaj kvankam mi certe estis libera de ĉia timo antaŭ li, tiu kvazaŭ spiona sekvado estis al mi neniom bonvena.

Tial, post rapida decido, mi subite turnis min, iris renkonte al li, atingis lin, kaj je mia senlima mirego li min salutis uzante mian nomon.

Ne malmulte konfuzite, mi reciprokis la saluton kaj samtempe esprimis mian surprizon, ĉar tiu staranta antaŭ mi estis al mi tute fremda, kaj mi ne memoris

esti iam renkontinta ĉi tiun bonkorecan kaj belan grandaĝulan vizaĝon de forte sunbrunigita haŭtkoloro kaj kun penetremaj malhelaj okuloj, kiuj en la krepusko ŝajnis preskaŭ lumi.

Io sentigis min eĉ hontigita pro tio, ke antaŭe la senĉesa sekvado fare de la maljunulo estis estinta al mi tiom malsimpatia kaj ke, per pensoj ne tre amoplenaj, mi estis dezirinta lin al ĉiuj diabloj.

Sed mian demandon miran sekvis la respondo:

„Mi kredas al vi, ke vi neniam antaŭe vidis min, sed kiel evidentiĝas nun al vi, mi tamen konas vin, kaj se vi bezonas pli da pruvoj, vi ilin ricevos!“

*

Mi eksentis la maljunulon stranga, iom timiga ...

Sed li tuj reprenis la parolon kaj diris:

„Kiel mi vidis, vi ĵus estis reironta al la urbo; ĉu vi permesas, ke mi akompanu vin?“

Mi havas ion por diri al vi kaj petas vian pardonon, se mi maltrankviligis vin per mia persista sekvado!“

*

La tono de tiu voĉo, kaj la tuta maniero, en kiu estis prezentita la peto pri pardono, estis tiom senarmigaj, ke la inklino, pormomente ekbaŭmonta en mi, bruske fini la interparolon tuj dissolviĝis kaj mi akceptis la proponon, kvazaŭ tio estus la plej natura reago.

Sed kion do tiu stranga maljuna viro povus havi por diri al mi??

Ĉiaj supozoj zumis en mia kapo, ekzemple, ke li eble estas konatulo de mia patro, aŭ al mi nekonata aŭskultinto de miaj iamaj predikoj multe frekventataj, ĉar en la urbo, kie mi nun estis, mi konis apenaŭ iun homon krom miaj kunstudentoj kaj profesoroj, kaj mi sciis nenion pri eventualaj rilatoj de mia familio, kiuj povus konduki ĉi tien.

Tiam mi ekkonsciis, ke mi mem estis alparolita per mia nomo, sed ke la fremdulo ne estis prezentinta sin al mi. Tial mi petis lin indiki al mi sian nomon.

Strange tuŝis min la respondo, kiun mi ricevis!

La fremdulo diris:

„Se vi bezonas nomon, nomu min kiel ajn vi volas, sed pardonu, ke mi indikos al vi mian nomon nur tiam, kiam vi estos aŭdinta de mi, kiu – mi estas! –“

*

Mi tiutempe inklinus supozi strangan splenon aŭ kapricon de maljuneco, se tiuj paroloj ne estus atingintaj min kun tiom aparte signifoplena esprimo, ke mi anstataŭe sentis specon de *solena respekto*, kvankam mi tute ne povis klarigi al mi, *kio* do povis esti la kaŭzo de tiu sento.

Tial mi paŝis silente apud mia mistera akompananto, ĝis li mem rekomencis paroli kaj diris jenon:

„Vi estis pastro de piakreda paroĥo, antaŭ ol veni tien ĉi por reekstudadi, sed vi agis bone forlasi la profesion jam atingitan, ĉar mi povos pruvi al vi, ke,

malgraŭ ĉiuj teologiaj ekzamenoj sukcese trapasitaj, vi sciis vere malmulte pri tio, kion estis via devo instrui al aliuloj, kaj ke la mirakloj de l' animo estas por vi, eĉ hodiaŭ, libro sigelita per sep sigeloj!‘

*

Do li konas min ja nur laŭekstere, el la tempo de mia predikanteco, mi pensis, kaj mi ne estis tro ĝoja pri tiu rekta, tuja ekveno al temo, por kiu miaopinie mi ne estis doninta al li iun legitiman kaŭzon.

Sed antaŭ ol mi povis respondi eĉ unu vorton, li daŭrigis:

„Prefere detenu vin de ĉiuj pensokombinaĵoj, kiujn vi eble pretigas al vi, vidante ke mi bone konas vian sorton!

Alie vi devos ankoraŭ tiuĉivespere konvinkiĝi, ke ĉiuj viaj supozoj estis eraraj kaj ke vere „ekzistas en ĉiel’ kaj sur la tero pli da aferoj, ol en la lernejoj instruas filozofoj“ – almenaŭ se tiuj ĉi estas viaj Okcidentaj instruistoj! –‘

*

Nur nun mi rimarkis la fremdlandan akĉenton en la parolo de l' fremdulo kaj, ligante ĝin kun lia kontraste emfaza mencio de „Okcidenta“ scio, mi nevole ĵetis flankan rigardon al lia malhela haŭtkoloro.

Ŝajnis, ke li tuj estis perceptinta tiun rigardon, kaŭzitan de nur neklara, fulmeca sento, ĉar li diris:

,Vi fakte ne devas alkalkuli min al la homoj de via lando!

Mi estas tute fremda tie ĉi, kaj estas veninta ĉi tien nur tial, ke mi devas plenumi *komision*, kiu koncernas – *vin*. –

Mi venas de la sunleviĝejo kaj devas tien returni tiom baldaŭ kiom eble.

Nur *devo* instigis min al tiu ĉi – alie por mi malmulte ĝojiga – vojaĝo en Eŭropon. –‘

*

Nun mia mirego fariĝis senlima, kaj ne necesus la antaŭa admono por nebligis al mi ĉian pluan supozadon.

Kian komision – pro la ĉielo! – povus Orientano havi por plenumi koncerne min?!

Tio ja estis preskaŭ plena frenezo!

Sed ankaŭ nun ne restis al mi tempo por plua pensado, ĉar la mistera akompananto reprenis la parolon, dirante:

,Vi ankoraŭ ne povas scii ion pri la aferoj, kiujn mi komunikos al vi.

Moderigu vian miregon kaj aŭskultu min trankvile!‘

Kaj tiam li diris al mi, ke li estas membro de spirita unuiĝo, kiu havas kvazaŭ sian precipan sidejon meze de Azio, sed scias ŝpini siajn nevideblajn fadenojn tra

la tuta mondo kaj povas atingi ĉiun homon, kiu serĉas *Dion* el la plej profunda ardo de l' koro. –

Li aldonis, ke tie oni jam de longe scias pri mi spiritavoje, kaj ke, danke al speco de psikofizika talento donacita de la naturo, mi estas destinita eniri en tute aparte proksiman rilaton al lia unuiĝo.

Tiam li efektive rakontis al mi la historion de mia propra vivo kaj igis min ekkoni, ke li devas scii pri mi preskaŭ pli multe ol mi mem, kvankam koncerne eksterajn detalojn li evidente estis necerta, sed kun des pli granda certeco li malkaŝis detalojn *animajn*, kiujn mi mem estis apenaŭ konsciinta.

Mi eksentis froston en la dorso kaj plej volonte fuĝus por unue reekregi miajn proprajn pensojn ...

Jen mi aŭdis pri aferoj tiom fremdaj al mi, ke mi apenaŭ povis mense kapti ilin, kaj samtempe mia interno, kiun mi estis kredinta kaŝita antaŭ ĉiuj homoj, estis montrata al mi en tia nekomprenebla klareco, en kia mi mem ankoraŭ ne estis vidinta ĝin.

Kaj ĉio ĉi estis dirata al mi en tiom bonkora kaj trankvila maniero, kvazaŭ ĝi estus la instruo de multjare konata instruanto kaj kvazaŭ temus pri la plej evidentaj kaj naturaj aferoj.

Mi preskaŭ ne plu sciis, ĉu mi songas aŭ maldormas...

*

Sed al la maljunulo ne kaŝiĝis mia anima eksciteco, kaj kvazaŭ por trankviligi min li diris:

„Bonvolu ne kredi min ĉioscianta, kiam mi eltiras el via interna vivo tion aŭ tion ĉi kaj provas ĝin heligi!

Kvankam mi eble scias kelkon, kiu estas malkaŝa ne al ĉiuj homoj, tamen mia ekkono restas tre limigita.

Sed kiam unu el ni ricevas tian *komision*, kiam mi ricevis pri vi, oni malligas al li portempe certajn ligilojn de la kapablo de perceptado, kaj sekve nun estas eble por mi, scii pli multe pri vi ol mi povus aliatempe. — —

Ĉio ĉi ne estas mirakla!

Kio ŝajnas stranga al vi tiurilate, tio havas tute naturan bazon, same kiel la leĝoj de mekaniko, kiujn vi klopodas esplori dum via nuna studado!

Bonvolu vidi en mi nur homon, kiu penas instrui vin pri aferoj *spiritaj*, tute same kiel la instruistoj de via universitato klarigas al vi pure *fizikajn* leĝojn!

Ambaŭkaze homo nur transdonas la scion, kiun li mem estas akirinta, por ke akiru ĝin iu, kiu ĝin deziras...‘

*

Kiel glatiganta oleo sur ŝtormperturbatan maron, tiel metis sin, dum lia parolado, klare percepteblaj mildaj radioj sur la ekscititajn sentojn en mia interno.

Surprize, mi tuj povis orienti min en la por mi tiom nova ideorondo, – mi demandis, ree demandis, kaj ricevis al ĉiu demando respondon, kiu pli kaj pli firmigis min en tiu idearo. –

Ardaj, preskaŭ supernaturaj adoro kaj amo al tiu mistera maljuna viro ekfluis el mia interno, tiel ke mi apenaŭ povis retenigi min doni al tiuj sentoj la plej klaran esprimon ... Mi plej volonte kiskus al li ambaŭ manojn pro dankemo, ĉar mi jam sentis, ke li alportos al mi plenan liberigon el la inferno de mia interna disfenditeco, – ke *li sola* alporti ĝin *povos*. –

*

Dume ni estis alproksimiĝintaj al la urbo kaj al la elirejo de la parko.

Mi havis nur unu sopiran deziron: ke la maljuna viro restu ĉe mi.

Sed kiam ni estis enirintaj la helecon de la unuaj stratoj, li subite haltis kaj diris:

„Por hodiaŭ sufiĉas!

Pripensu en via koro, kion vi aŭdis hodiaŭ, kaj venu morgaŭ al tiu malgranda templo je la enirejo de la parko, se vi deziras ekscii de mi pli multe!

Mi atendos vin je la sama horo, en kiu vi kutimas promeni tie ĉi!“

Per tio li adiaŭis, kaj direktis la paŝojn al flanka strato.

Estis necese apliki mian tutan memregadon por ne sekvi lin sekrete, sed io neeksplikebla min retenis.

*

Mi ne scias, kiel mi tiuvespere atingis mian loĝejon.—

Miaj okuloj estis kvazaŭ blindaj pri ĉio, kio renkontis min survoje.

Alveninte dome, mi fermis la pordon kaj falis laŭlonge sur mian ripozdivanon, nekapabla eĉ ekbruligi la lampon.

Post kiam mi estis fikse rigardinta en la mallumon dum kelka tempo, lasante preterpasi antaŭ mi ĉion hodiaŭ travivitan, estis al mi, kvazaŭ mia patrino, tiam antaŭ nelonge mortinta, subite starus apud mi kaj alkondukus al mi per sia mano la misteran maljunulon.

Kiam ambaŭ staris tute proksime de mia kuŝejo, ŝi petis, ke li benu min.

Li levis la manojn super mia kapo, kaj dum por momento la aperaĵo estis tiom klara, ke mi kredis povi ĝin tuŝi, en la sekvanta momento ĝi estis tute malaperinta, tiel ke mi salte ekstaris kaj ĉirkaŭrigardis por vidi, kien la du figuroj estis irintaj.

Sed plu nenio estis perceptebla; do mi palpe serĉis la lampon sur mia skribtablo por ekbruligi ĝin.

Kvankam nun la milda, varma lumo jam de longe penetris la kloŝon el lakta vitro kaj heligis la ĉam-

breton, mi ankoraŭ provis elvoki la aperaĵon per propra volostreĉo – sed mi ne sukcesis ...

Fine mi rezignis pluan provadon, kaj tial ke, rezulte de ĉio travivita, mi sentis min plene laca, mi decidis enlitiĝi pli frue ol kutime, estingis la lumon kaj falis en profundan, tute sensonĝan dormon.

*

Vekiĝinte tre frue en la sekvanta tago, mi unue devis iom post iom klarigi al mi, ke la antaŭavespera travivaĵo vere ne estis iu songo.

Mi poste trovis min pli kaj pli en vere solena animstato, kaj la fakto, ke mi tiutage dediĉis min al mia studado kun aparta fervoro, estis atribuebla certe nur al mia deziro, ke la horoj pasu pli rapide, ĉar mi sopiris al la alveno de l' vespero, kiam mi espereble revidos la maljunulon. –

Finfine trovinte lin en la renkontejo interkonsentita, mi pro ĝojo apenaŭ sciis regi min tiom, ke mi povis iri renkonte al li almenaŭ laŭ konvena formo antaŭ la tieaj promenantoj.

Apenaŭ ni estis enirintaj post kelkaj paŝoj en unu el la malpli uzataj vojoj, mi ekscitite rakontis al li mian strangan kaj tiutempe al mi tiom misteran travivaĵon, kiu estis okazinta post mia reveno hejmen.

Li aŭskultis tre trankvile, ne ŝajnis tre impresita kaj diris nur jenon:

,Vi *bilde* ekkonis certan spiritan interligitecon, ĉar la antaŭkondiĉojn kiuj ebligas, ke vi fariĝu mia disĉiplo, vi efektive ŝuldas al via *patrino*, en kies praularo la fizikaj korpoĉeloj grade ŝanĝiĝis tiumaniere, ke vi povas fariĝi kapabla por la *praktika ekkonado*, al kiu mi devas konduki vin.

Sed ĝenerale *gardu* vin kontraŭ bildoj formiĝantaj sen viaj volo kaj faro el fortoj kiuj estas ene de vi kaj kiujn vi unue devas lerni plene *regi*, antaŭ ol vi povas esti certa, ke vi ne fariĝos viktimo de krudaj trompoj!

Estu nun kontenta, ke almenaŭ tiu ĉi bildo, eliĝinta el vi mem, *ne* trompis vin! —‘

*

Tiu ekspliko kompreneble efikis sur min kiel malvarma akvoŝprucaĵo. — —

Ĝuste ĉar neniam antaŭe tiaj aperoj estis venintaj al mi, mi estis sentinta min forte tentata atribui grandan signifon al la afero; mi eĉ ne povis liberigi min de la penso, ke mia nova konato devas esti *kaŭzinta* la vizi-
on, influinte min tiel, ke mi kapabliĝis fari la unuan, mallongan rigardon en unu el la spirantaj regionoj, pri kiuj li parolis al mi.

Mi ne havis multan tempon por fordoni min al mia elreviĝo, ĉar mia akompananto plue diris:

,Se mi estus volinta vidi vin transdonita al tiaj fantasmagorioj, mi ne estus bezoninta fari la longan

vojaĝon tien ĉi, kaj ne estus estinta necese viziti vin per mia fizika korpo.

Da ‚viziuloj‘ de *tiu* speco ekzistas pli ol sufiĉo, kaj ne malmultaj el ili eĉ kredas esti en komunikiĝo kun ni lumantoj de l’ Pralumo.

Sed vi devas scii, ke – kvankam ni povas agi ankaŭ aliamaniere, se temas nur pri *preparado* – estas por ni liganta leĝo, ke al tiuj, kiuj fariĝu niaj apartaj *disĉiploj*, ni *tiam* venu ankaŭ en nia *fizike* perceptebla korpo, kiu estas ne alia ol tiu de aliaj homoj, dum al tiuj, kiuj *ne* estas destinitaj por tiu ĉi vojo, ni *neniam* sendas videblan signon, sed ni gvidas ilin nur per *spiritaj fluoj*, kondiĉe ke ili mem preparas sin por tiu gvidado! –

Post kiam mi estos reveninta en mian surteran hejmlandon, vi ankaŭ vidos min kiel figuron, kiu – diference de tiu ĉi korpo kaj tiuj ĉi vestoj – estas plektita ne el *tera materio*; sed vi vidos min tia nur, kiam vi estos *plene venkinta* la fortojn, kiuj liveras viziojn similajn al tiu lastvespera.

Se estus estinta *necese*, kaj se ni estus trovintaj vin *kapabla trankvile akcepti* ion tian, mi eble ne plu estus fremdulo por vi kaj vi konus min en mia spirita figuro jam *ekde via infaneco*; sed *eĉ tiuokaze* mi *nun* devus veni al vi *en mia ekstera, tera korpo*, tial ke vi estas elektita eniri en *regulan, spiritan disĉiplan rilaton* kun mi.–

Sed pro tio, ke vi ne estas *dejunece* kutimiĝinta al realaj *spiritaj* formoj, mi nun devas protekti vin *kontraŭ vi mem*, ĉar vi nun devas unue lerni distingi ion vere *spiritan* disde *trompaj bildoj*.

Se vi do, en la estonteco, eble aŭdos pri ,aperaĵoj‘, kiuj subite eniĝas en la vivon de plenkreskulo kaj volas kredigi lin, ke la aperinto estas ,guruo‘ volonta instrui lin kiel ,disĉiplon‘, dum la trompato ankoraŭ ne estas inicita al la unuaj misteroj pri la uzo de siaj spiritaj fortoj, tiam *avertu*, se ankoraŭ povas esti averte, sed ne lasu vin trompi, eĉ se oni raportas al vi pri plej pompaj paroladoj de tia ŝajna ,guruo‘ laŭkrede vidita en spirita formo, aŭ eĉ pri realiĝintaj profetaĵoj laŭdire eldiritaj de li, aŭ similaj aferoj! –

Hodiaŭ vi ankoraŭ ne eĉ scietas, kiom la mondo estas plena ne nur de la *dramigita maskerado de la plastike bildanta fantazio de l' homo*, sed ankaŭ de dua, *alia* speco de ŝajne ,superteraj‘ aperaĵoj, kiuj originas el la plej noktovualitaj regionoj de la *fizika* fenomenaj mondo, kvankam ili ĉiam provas legitimi sin al la koncerna persono kiel ,*spiritajn*‘ estaĵojn rangantajn *almenaŭ* sur *homa* spiritoŝtupo! –

Eĉ kiam iu ludas kun sia hundo kaj dresas ĝin, instruante al ĝi lertaĵojn, li faras ion pli bonan ol kiam li aŭskultas la plej patosajn revelaciojn de tiaj laŭsupozaj ,*spiritoj*‘ aŭ lasas montri al si ilian ofte mirigan manipuladon de la normala laŭleĝeco de la fizika

okazado, manipulado, kiun oni devus nomi krima kaj malmorala, se ties kaŭzintoj havus eĉ la plej etan konscion pri sia respondeco, farante tian manifestacion!

Ne de *ekstere* kaj per plivastiĝo de la percepta sfero de viaj sensoj *fizikaj* malfermiĝos al vi la spiritaj mondoj!

En via *plej interna interno* vi estos transformata per *spirita transmeto de fortoj*, ĝis vi estos – kondiĉe ke via *fizika* organismo tion permesas – kapabla, ĉe *konsciantaj teraj sensoj*, levi vin – kiel diris unu el la plej grandaj saĝuloj de via kredo – al la sepa ĉielo!

Ĉu vi atingos same altan celon kiel tiu saĝulo, ankaŭ mi ne scias; sed kiel ajn via heredita fizika fortaro respondos al la postulata transformado, vi certe havos enrigardojn en mondon de l' spirito, pri kiu vi suspektis nenion eĉ en viaj plej aŭdacaj revoj aŭ en plej profunda religia enprofundiĝo! –‘

*

Dum tiuj paroloj mi sentis, kvazaŭ en mia interno malfermiĝus sekreta ĉambro, en kiu mi estus trovonta neordinare valoregan trezoron, – sed samtempe jen estis io, kio per fortega rezisto premis sin kontraŭ la pordo kaj absolute ne volis toleri, ke tiu estu malfermata eĉ nur fendon. – –

Eble tiu rezisto estus estinta malpli granda, se ĝi ne estus forte subtenita de ĉiaj objektoj *teologiaj!* –

Jes, mi ankoraŭ tute ne estis libera de antaŭaj ideoj kaj ankoraŭ ne povis malligi min de la metodo instruita al mi por kapabligi min defendi mian tiaman kredopinion kontraŭ la atakoj de nekredantoj...

Tial mi serĉis, laŭ la maniero de ŝakludanto, la respondan movon pereige venkan, por eble tamen meti lin en „maton“; sed kvankam mi diligente trafosis mian cerbon, neniu tia movo prezentiĝis al mi.

Fine mi kroĉis min al la mencio – ŝajninta al mi iom miriga – de la viro, kiun mi kutimis rigardi kiel precipan kolonon de l’ kristanismo kaj kies apostolaj leteroj estis liverintaj al mi pli ol kelkaj tekstoj por miaj predikoj.

Tio antaŭe aŭdita estis soninta al mi tre malmulte „kristane“, kaj tial mi parole esprimis mian miron, ke jen estis subite menciata kunfondinto de l’ kristanismo kvazaŭ kiel „disĉiplo“ de la mistera unuiĝo, al kiu aparteni mia akompananto asertis.

Ŝajnis al mi preskaŭ krima arogo, serioze konsideri dum eĉ nur unu sekundo la penson, ke tiu plej granda apostolo de l’ kristanismo povus ŝuldi sian iluminiĝon al influo simila al tiu, al kiu mi nun estis lasonta min, kaj li tial devus esti rigardata kiel kvazaŭ pli frua kundisĉiplo mia. –

Mi tute ne retenis miajn sentojn, kaj parolante iĝis tiom fervora, kvazaŭ mi ankoraŭ estus en eklezia

ofico kaj devus venki kontraŭulon de mia tiama kredo, kiu ja estis fariĝinta tiom malfirma kaj kaduka.

*

Mia akompananto trankvile aŭskultis min kaj silentis dum longa tempo post kiam mi estis fininta, tiel ke mi jam kredis povi esti certa pri mia venko.

Sed tiam li komencis:

„Malproksima estu de mi la intenco eltiri el via koro la tiom ardan respekton al tiu saĝulo de via kredo!

Sed mi dankas vin, ke vi ĵus multe faciligis mian taskon, ĉar vi mem enmanigis al mi finon de la fadeno, kies stranga interkonfuzita volvaĵo devas esti tute malimplikita, antaŭ ol mi povas transmeti al vi forton de ekkono, kiun vi povos ricevi kiam vi estos kompreninta, ke nur troa homa fervoro nodis la re-tomaŝojn, en kiuj vi ĵus ree kaptiĝis!

Mi ne scias, ĉu mi admiru vian profundan konon de la verkoj de la de vi respektato, aŭ ĉu mi miru, ke vi malgraŭ tiu kono ne kapablas ekvidi, kion tiuj verkoj, spite al la ornamado per pli malfruaj aldonaĵoj, ja ankoraŭ rivelas kun sufiĉa klareco?!

Kial vi volas, streĉante vian tutan dialektikon, tiom malproksimigi tiun grandan homon – kiu tamen, en siaj antaŭjuĝoj, estas ankoraŭ ligita al sia kred-opinio, sia tempo kaj sia popolo – disde la sama *tero*, kiu tiam donis al li *lian* koloron, same kiel ĝi hodiaŭ donas al vi *vian*?! –

Legu atentaspirite kaj sen antaŭjuĝo, kion li skribis en siaj epistoloj, kiom ĝi ankoraŭ videbliĝas el sub la ekkoneblaj rezultoj de posta prilaborado, kaj vi klare vidos, ke tio okazinta al li estas tre simila al via travivaĵo! – –

Sed lian „Damaskan“ travivaĵon vi devos interpreti en senco iom *pli simpla*, ol kiom ŝajnis esti bone al la postaj prilaborantoj, kiuj kredis devi enmeti dramecan okazaĵon! –

Vi jam scias, ke en ĉiuj legendoj pri grandaj homoj la ‚voĉoj el la ĉielo‘ kaj aliaj bruecaj intervenoj el la nuboj apartenis al la scenejo kiun oni rigardis necesa, kaj sekve vi eble ankaŭ tie ĉi, post iom da konsiderado, ekkonos la saman teknikon! –

Sed se vi forigas la tutan aron de tiuj arte faritaj lumefektoj, tiam restos viro, kiu agadis ardafervore por sia kred-opinio, ĝis iutage li aŭdis pri – kiel estas dirite – „justa“ viro en la urbo Damasko, al kiu li survoĵigis sin, ĉar, fine tre premite de duboj, li estis kvazaŭ blindiĝinta kaj ne plu trovis elirejon. –

Ĉe tiu viro li longe restadis, kaj li trovis ĉe li tion, kion ankaŭ mi estas komisiita doni al *vi* ...

Ricevinte ĝin, li venis al tiuj, kiuj nur laŭ *ekstera* rajto nomis sin disĉiploj de unu el ni, kaj nun lia vivo fariĝas vere malfacila, ĉar kion li ekkonis „*laŭ la spirito*“, tion volis tiuj, ligitaj en tro tera malvasteco, interpreti *siamaniere laŭ la intelekto*. –

Li tre klare distingis inter: unue, „*Dio*“, kiun en la aŭtentikaj lokoj de siaj epistoloj li nomas „*Dio, nia Savanto*“; due, la Sanktoleito de Dio: *Jesuo*, pri kiu li volis, ke tiu estu ekkonata „*ne plu laŭ la karno*“; kaj trie, la „*Patro*“ de la alta majstro Jehoŝua, pri kiu li bone sciis, ke tiu ne povis esti simple rigardata kiel egala al „*Dio*“. Sed poste oni falsis liajn vortojn, kiam ili ŝajnis ne plu konformaj al la konstruaĵo de instruoj, kiun oni estis stariginta laŭ sia *propra* regulo sur la fundamento de la instruo de l' Nazaretano, uzante diversspecajn ruinerojn de antikvaj temploj. –

Li mem jam avertis kontraŭ tiuj posteuloj: – „Ĉar venos tempo, kiam oni ne toleros la sanan instruon; sed havante jukantajn orelojn, amasigos al si instruantojn, laŭ siaj deziroj; kaj ili deturnos de la vero sian orelon, kaj turnos sin flanken al fabeloj.“

Sed mi ne estas veninta tien ĉi por montri al vi la memkontraŭdiraĵojn en viaj sanktaj skriboj, kiuj estis tiom forte misformataj, tuj post ilia estiĝo, fare de sennombraj cerbumantaj kopiistoj, skriboj, el kiuj hodiaŭ ĉiu povas interprete eligi, kion eligi li trovas bone ...

Mi deziras nur malfermi viajn okulojn al la spuro de *vero*, kiu *malgraŭ ĉio* restas *trovebla* en tiuj skriboj, ofte *kontraŭ* la volo de tiuj fruaj falsintoj, el kiuj ĉiu supozeble kredis esti farinta sian laboron tiom funde, ke liaj korektoj restigas plu neniom de la

originalo al li nekomprenebla sed sanktigita per la nomoj de la aŭtoroj. –

Liberigu vin de la maniero de interpretado, kiun oni instruis al vi, kaj legu la hodiaŭan tekston *senantaŭjuĝe*, ĉiam memorante, ke multaj diligentaj fingroj klopodis konfuzi la fadenojn, kaj mi estas certa, ke vi sukcesos restarigi la *originan* tekston tiugrade, ke ĉiuj memkontraŭdiraĵoj dissolviĝos, kvankam restos la signoj de tiutempa malvasteco de rigardo ankaŭ de la *veraj* aŭtoroj! –‘

*

La interparolado daŭris, kaj dum la sama vespero mi ricevis instruajn klarigojn, kiujn mi – tute enprofundiĝinta en raciismo kaŭze de teksta kritiko pure *historia* – jam de longe ne plu estis serĉinta, kaj multe malpli atendinta. – –

Vere: oni *estis posedanta* ,la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo‘, sed oni ne plu sciis *malfermi* la pordon, kaj – por ne devi tion konfesi – *malhelpis* ĉiujn, kiuj *mem* volis prove uzi la ŝlosilojn je la pordo! –

En la plej profunda anima skuiteco mi tiuvespere foriris de la nova instruanto, kaj certe dum duono de la nokto mi sidis super bibliaj tekstoj por penetri, laŭ la maniero de li konsilita al mi, pli kaj pli profunde en ilian *originan* spiriton.

*

Sekvis nun, vesperon post vespero, tuta vico da instruadoj, kiujn, akompanante la strangan maljunulon, mi ricevis de li.

Kiel mi estis sciiĝinta, li loĝis sub banala Eŭropana familia nomo en unu el la plej bonaj hoteloj de la urbo; sed dum li neniam estis invitinta min al si, mi trovis lin videble volonte preta veni al mi en mian ĉambron, kaj tie ĉi okazis la perfektigo de tio, kies bazo estis metita per la instruadoj dum niaj promenoj en la libera naturo.

Mi formale fariĝis lia ĉelao, kaj li trovis min taŭga por vekoj en mi kapablojn, kiuj – eĉ en tia intima rilato inter disĉiplo kaj lia spirita instruanto – ordinare devas esti rifuzata al ĉelao, ĉar nur *ekstreme* malofte la necesaj psikofizikaj antaŭkondiĉoj estas troveblaj en homo de la Okcidenta mondo ...

Danke al tiuj kapabloj en mi vekitaj, mi ĝuas la altan feliĉon povi ankoraŭ hodiaŭ ĉiutempe eniri *en konscian spiritan komunikiĝon* kun mia guro, kvankam li vivas interne de Azio, milojn da mejloj apartigita de mi, – feliĉo, kiu alie doniĝas nur al tiuj maloftaj homoj, kiuj *mem* estas naskitaj por unuiĝo kun la rondo de tiuj lumantoj, sed al kiuj mi neniom apartenas nek iam aparteni povos, ĉar oni devas propravole kaj nedisigeble esti doninta sin, en sia spirita naturo, al tiu spirita unuiĝo *jarmilojn antaŭ sia nas-*

kiĝo kiel homo de la tero, por tiam surtere esti aldodata al ilia rondo. – –

Jen koncize tio esenca, kion mi povas diri al vi responde al la demando: kiel mi mem konatiĝis kun la aferoj, pri kiuj vi trovas min sperta.

Sed mi kredas, ke estas tempo fini nian interparoladon por hodiaŭ! Oni jam aŭdas plu neniu sonon el interne de la domo, kaj la sudlandanoj kutimas dediĉi la nokthorojn al la dormo.“

*

La luno jam antaŭ longe estis leviĝinta super la silueto de la preĝejo, tiam dum mallonga tempo restis kaŝita malantaŭ la sonorilturo, kaj nun staris – jam multe pli malgranda, lumante per glacie malvarma, blanka lumo – alte super la grupo da cipresoj, kies nigrecon ĝiaj radioj heligis per milda blueta brileto kovranta la tutan ĝardenon kiel delikata nebulo.

En la heleco de la luna lumo la sennombraj steloj estis perdintaj preskaŭ sian tutan brilon, sed ŝajnis, ke rezulte de tio ili fariĝis eĉ pli malproksimaj kaj misteraj.

Nur post kiam la parolanto estis fininta, oni vere ekrimarkis la profundan silenton, kiu vekis la konscion pri la malfrua horo, en kiu oni ankoraŭ sidis kune, dum la laŭta vespera vivo de la suda urbo jam de longe kuŝis kvazaŭ entombigita.

Tial la amikoj tuj ekforiris, kaj kiam la kelnero, akompaninte ilin ĝis la pordo, estingis la lumon malantaŭ ili, ŝajnis ankaŭ al li, ke certe jam estas tempo, ke la fremduloj finfine ja decidis iri hejmen.

Kvazaŭ volante gardi sekreton, la ombroj de la altaj domomuroj plenigis la mallumajn stratetojn; nur de tempo al tempo stria lunradio, superhela kaj akra, distranĉis la tenebron.

La paŝoj de la triopo iranta hejmen sonis tro laŭte kaj estigis eĥojn.

Oni diris preskaŭ neniun vorton, sentante, ke tio, kion oni tiuĉivespere estas aŭdinta, unue devas esti asimilata, kaj ke nur alia horo, post tradormita nokto, povos redoni la emon paroli. — —

ROKA INSULO

Post tiu vespero en la gasteja ĝardeno la amikoj estis ofte trovintaj okazon interparoladi, kaj ĉiam pli intima fariĝis al la du pli aĝaj la spirita mondo de ilia pli juna kunulo.

La vojaĝa itinero, kiun ili povis libere elekti al si, kondukis ilin pli kaj pli suden, kaj ne malmultajn belaĵojn ili estis renkontintaj.

Fine ili tamen sopiris eligi sin el la bruoj de la urboj kaj ilia superabundo da verkoj de alta arto; ili do interkonsentis pasigi, sur roka insulo leviĝanta el la maro kvazaŭ gardisto antaŭ la vasta golfo de unu el la plej bruaj urboj de la sudo, kelkajn tagojn de *trankvilo*.

*

Laŭ stranga koincido okazis, ke oni ŝajnis akcepti la malgrandan ŝipon de la vojaĝantoj per pafoj de saluto.

Oni celebris la feston de l' sanktulo de la insulo, kaj kvankam la vera ceremonio estis solenota nur la sekvantan tagon, tamen la festa ĝojo estis senlima, kaj dum la tuta nokto antaŭ la alta tago de l' sanktulo oni

povis facile kredi esti en fortikigita urbo ege minacata de malamiko: tiom tondris senĉese la ĝojopafoj.

Estis apenaŭ eble dormi dum tiu nokto, kaj la tri fremduloj jam suspektis, ke ankaŭ ĉi tie ili ne trovos la trankvilon de ili serĉatan.

Sed kiam sekvantatage la granda benoprocesio de l' sanktulo – evento kiu denove prezentis al ties adorantoj bonvenan oportunon por esprimi sian piecon tiom bruege – fine estis preterpasinta, dum kantado de la malnovaj kantoj kaj sub pluvo da rozflorfolioj ĵetataj al la arĝenta bildo, okazis, ke la tri amikoj povis, mirante kaj pli frue ol atendinte, ekĝui la plej delikatan kvieton.

*

Transe de la malgranda urbo kronanta la montoselon de la insulo, ili nun paŝadis en blindiga lumo tra inter olivujoj kaj citronujoĝardenoj, vitejoj, kaj floriĉaj deklivoj, enspirante la odoron de l' sudo kaj ebriigite de l' abundo da koloro prezentiĝanta al iliaj okuloj.

La olivarboj ĉie staris en plena florado, dum la citronoj plej lukse maturaj estis tiom grandaj, kiom la vojaĝantoj ĝis nun ne estis vidintaj.

Estis preskaŭ nekompreneble, de kie la grundo prenis la forton por estigi la abundon da rozoj kaj la pezan ŝarĝon da glicinoj, kiu ĉi tie grimpe kovris ĉiujn murojn!

Tiel oni iom post iom proksimigis sin al la pli kruta deklivo, kiu, en multkolora sovaĝeco superŝutita per floroj, inter altaj rokoj, malleviĝis al la maro, kiu grade fandiĝis en plej luma kobalta bluo kun la brilanta malproksimaĵo, dum la marbordajn rokmurojn tuŝis hele smeraldaj golfetoj.

Sed kie la mara sablo estis kreinta malprofundaĵon, tie reliefiĝis miraklaj lagoj, similaj al rondrandaj facetoj de likvaj turkisoj.

En tiu sorĉeca mondo oni estis ekpaŝinta sur mallarĝa pado, kondukanta tra rulŝtonaro malsupren al la marbordo, sed jam je la duona alto de l' deklivo oni nun atingis la celitan ripozejon: – tiun antikvan *groton de Mitrao*, en kiu antaŭ jarmiloj la *suno* estis honorata kiel dio; en kiu ĉirkaŭ la printempa ekvinokso sanktaj *misteroj* konsekris la inicatojn, kiuj, en sep gradoj kaj, irante de purigo al purigo, obeante pli kaj pli malfacilan ordonon, tie ĉi unuigis sin al sia Dio, kies bildo estis por ili la luma vivodonanto: la taga astro radianta sur la teron.

Sur „*alta monto*“ loĝis, laŭ ilia instruo, ankaŭ sur tiu ĉi *tero* la lumo, kiu jen en mistera roka groto sin revelaciis al la koroj kaj sciis atingi ĉiun, kiu havis la kuraĝon trapasi elprovadon kaj estis kapabla sentante trovi en sia animo la signifon de la simboloj, kiujn saĝaj sacerdotoj montris al liaj okuloj. – – –

*

La tri amikoj eniris en tiun malvarmetan sanktejon, kaj, bone sciante, kiom multe pli proksima al Dio troviĝis la „paganismo“ tiutempe praktikata tie ĉi, ol tiu aŭ alia posta kulto, pri kiu ties anoj kredis – en vante aroganta tromemfido –, ke ĝi estas la *sola* „agrabla“ al la unu, vera Dio, ili volonte malfermis siajn animojn al la sekreto kvazaŭ elfluanta ĉi tie el la rokmuroj, montrantaj nur apenaŭ videblajn postsignojn de la riĉaj ornamoj, per kiuj la arto de sciantoj estis garninta ilin. –

Longtempe oni estis ĉi tie doninta sin al siaj sentoj, kiam la plej maljuna el la amikoj rompis la silenton, dirante:

„Ja estas strange, ke tiuj homoj, al kiuj Dio sin malkaŝis en la *lumo*, elektis grotojn *en la rokaĵo de la tero* por celebri la *misterojn*, el kiuj ili estis ricevontaj ekkonon de lumo, kaj ke ili ne anstataŭe praktikis siajn liturgiojn ekstere en la abundo de l’ suna lumo!“

Sed dum oni nevole – kvazaŭ estus malpermesite paroli profanan vorton ĉi tie en la loko, kie en fora pasinteco estis aŭdataj nur plej sanktaj vortoj de ekono kaj sekretaj himnoj – reiris al la elirejo, por elekti al si sidejon sub ombra arbetaĵo, la plejjunulo el la tri prenis la parolon kaj diris:

„El la *tero* ni originas laŭkorpe, kaj en la sino de la tero ni devas unuatempe ŝirmi nin – ĉu nur en sentado, ĉu ankaŭ en ekstera farado, kiel tiuj inicatoj

trovis ĝusta –, antaŭ ol ni povas esti ,*denove naskataj*‘ ...

Ne senkaŭze la misteroj de la antikvuloj – des pli, ju pli sanktaj ili ŝajnis al tiuj ĉi – estis celebrataj preskaŭ ĉiam en *kriptoj kaj rokogrotoj*, kaj eĉ la *temploj*, kies arbaro da kolonoj ŝajnas al nuntempaj homoj nekomprenebla, estis ankoraŭ sentataj *simbole* kiel *internaj spacoj de la tero*. – – –

En la interno de la tero ĉiu konstruaĵo estas ankrata, kaj ju pli alte ĝi leviĝu, des pli profunden devas etendiĝi ĝiaj fundamentoj! –

Tiel ankaŭ ni devas – se la templo, kiu estas *ni mem*, etendiĝu kun sia kupolo en la regiono de l’ pura Spirito – enigi la fundamentan ŝtonon *en la internon de la tero*, por ke ĝi tie kuŝu ankrita, kaj tiam meti konstruŝtonon sur konstruŝtono laŭ plano, kiu riveliĝas en ni mem.

Se ni volas agi *alie*, aŭdacante konstrui sur la *supraĵo* de la tero, ni tro similas al la sakrilegiuloj en la legendo pri la *templo de Babelo*‘, kiu disfalis en si mem, tial ke la konstruantaj fortoj ne plu povis kompreni sin reciproke ...

Oni povus kredi, ke estas eble konstrui ĉiel-atingan temploturon ankaŭ sur la *supraĵa bazo de ekstera ekono*, bazo, kiun donas al ni teraj supozado kaj opinio; sed kiu konstruas en tiu malsaĝa maniero, de tiu *la veraj majstroj de la spirita arto de konstruo* tenas

sin *malproksimaj*, kaj li povas uzi nur *terajn fortojn de malalta speco*, kiuj longtempe servas al li kiel ŝajne kapablaj kaj lertaj konstruistoj; sed kiam la plej alta alto regebla per ilia forto estas atingita, tiam *,ilia lingvo estas konfuzata‘*, tiel ke ili devas *detru*i, kion ili antaŭe kreis ...

*

En *kaverno de paŝtistoj* estis naskata, laŭ antikva legendo, tiu, kiun oni nomas *,Liberiganto‘*! –

Laŭ la sama fonto, el *roka tombo* li releviĝis! – –

Ignoru do tiurilate kaj portempe ĉion *,historian‘*, kaj kontem plu nur la profundan *simbolan enhavon* de tiuj vortoj, kiu – bone komprenite – faras la legendon *vazo de la plej sublimesa veraĵo!* – –

Kiu ne *ankriĝas en plej profunda tero* kiel la alta majstro de ni priparolata, tiu certe ne estos *,akceptata en la ĉielon‘* kiel li! – – –

*

Nia propra korpo finfine estas por la spirito la *kaverno de liberiĝo*, estas la *,tero‘*, en kies plej internajn profundojn ni devas unue malascendi, por meti en ili la bazon, kiu povos subteni nian spiritan templokonstruaĵon. –

Sed la plej multaj homoj volas konstrui sian spiritan templon provante – eĉ pli malsaĝe ol la legendaj konstruintoj de la turo de Babelo – volbi unue la *kupolon*,

kaj estas forte konsternitaj, kiam ilia verko neeviteble
tuj disfalas en si mem. –

Ili komencas en la *kapo* kaj volbas aŭdacajn pen-
soarkojn, antaŭ ol firme ankri *en la plejinterno de l’
korpo, sentante per ĉiuj fibroj*, tion, kio povus *apogi*
kaj *subteni* la kupolon! – – – – –

*

La *koro* estas la centro de l’ korpa vivo, kaj kiam ĝi
ĉesas bati, la vivo de tiu ĉi korpo estas finiĝinta.

Sed temas tute ne nur pri *poezia bildo*, se al la koro
estas atribuata – en ĉiuj popoloj kaj tempoj – la plej
granda signifo ankaŭ rilate al *animaj* sentado kaj
spertado! – –

Certe, neniu anatomo povos iam trovi la *animon* en
la koro de l’ korpo; – sed *ĉiuj niaj korpaj organoj*
respondas al korelativaj animaj-spiritaj organoj, kaj
kiam oni parolas pri la *‘koro’* en spirita signifo, la pa-
rolo estas nur pri la koro de l’ *spirita* organismo, kies
sentoj tamen – dum la tera vivo – ĉiam interrilatas
kun la korpa koro: tiel ke la koro de l’ korpo formas
kvazaŭ la *resonancan tabulon*, per kies plifortiga
efiko ĉiu anima-spirita travivaĵo eniru en la konscion
de ni homoj kun tiom granda klareco kiom eble. – – –

La *besto* ja havas la samajn *korpoorganojn*, sed
mankas al ĝi la *spirita* organismo, kiu respondus al
tiuj organoj, kaj tio, kion oni kutime nomas *‘animo’*
de l’ besto, estas nenio alia ol *la tuta komplekso de*

ĝiaj pli subtilaj fluidecaj korpofortoj, kiujn oni, estante ligita de nescio, plej ofte ankaŭ ĉe la homo kredas alkaluleblaj al la ,animo‘ ...

La korpo egala al tiu de la besto iam fariĝis memserĉita *rifuĝejo* de la *spirita homo* falinta el sia spirita prastato, kaj tiu sama bestokorpo, en kiu li nun trovas sin, tuj kiam estas veninta ,lia tempo‘, fariĝas al li ankaŭ ,*kaverno de liberiĝo*‘, ĉar la spirito eĉ dum sia ,falo‘ tute ne perdis la *kreoforton*: tiel ke ĝi sciis *konformigi sin mem al la formoj de la bestokorpo*, sole tiumaniere fariĝante liberigebla surtere, ĉar *nur tiumaniere ĝi fariĝas perceptebla al la konscio de la homobesto*. — — —

*

Kiu sentante ekkonis tiun nedireble profundan misteron en ĝia nemezurebla graveco, al tiu lia tera korpo certe ne plu ŝajnos malhelpo kaj ĝena balasto dum lia strebado al konsciĝo en la pura spirito

,Kion ajn vi ligos sur la tero, estos ligita en la ĉielo,‘ — en la regno de l’ pura spirito — ,kaj kion ajn vi malligos sur la tero, estos malligita en la ĉielo.‘ —

Ne ekzistas vera liberiĝo por la tera homo krom en la korpo kaj korpe sentebla per la vivanta substanco spirito samforma kiel lia korpo! — — —

Nur kiam li, *en sia tuta memsentado ampleksanta lian tutan korpon*, sentante ekkonscias sian samforman *spiritan vivon*, li estas ,*enirinta en la spiriton*‘,

kaj *nur tiam* li povas permesi al sia pensado, sen timo de trompiĝo, volbe konstrui la altan kupolon, kiu vaste videble kronu la templon de l' spirito.

Antaŭe ĉio, kion li konstruas, estas – en la plej bona okazo – nur interesa *fasado*, kiun la unua ŝtorma vento renversas; kaj kiam li devas *redoni* ĉi tiun teran korpon al la tero, li ne scios, kie sin ŝirmi, ĉar tio, kion li konstruis, estis perceptebla *nur por teraj okuloj* kaj, kune kun la tera korpo, malaperas el lia homa konscio, kiu, ankoraŭ ne unuiĝinta kun lia spiriteco, ekde nun perceptos ĉirkaŭ si nur *ŝajnajn formojn*. –

Tial la alta majstro vere povis diri:

„Laboru, dum estas tago, ĉar venas la nokto, kiam neniu povas labori.“ – – –

Sed tiu ĉi ‚nokto‘ estas nenio alia ol tio, ke oni ne kapablas, sen la resonanco de l' korpo, aŭdi la voĉon de la propra eterna spirito tiel, kiel estus eble ĉi tie sur la tero, ĉar tiu ‚templo‘ konstruota similas, alia-metaphore, al *simfonio*, kiu bezonas ne nur la *komponiston* kaj lian *orkestron*, sed ankaŭ la *aŭskultanton* kapablan enpreni ĝin! – –“

*

Li finis paroli, kaj la tri viroj rigardis, dum longa tempo kaj en silento profunda, sur la vastan maron, kie krozis velbarko ornamita per flagrubandoj kaj

supozeble alportanta de la proksima landbordo gastojn, kiuj serĉis vesperan festoĝojon.

Kiel protektantaj gvatoturoj leviĝis el la maro, proksime de la bordo, grandmasaj rokaĵoj, kiuj, nun trempitaj en flavete ruĝeta lumo, montris ke la suna disko – kiu dum la restado ĉi tie de la tri amikoj jam estis malaperinta for de la okuloj malantaŭ kruta, alta muro en la okcidento – nun estis baldaŭ forlasonta, laŭ sia malsupren inklinita irejo, la ĝis nun prilumatan flankon de la tero.

Sed ankoraŭ neniu deziris reiri, kaj la ‚abato‘, nun stimilita al respondo, komencis dirante:

„En la lumo de tio antaŭe de vi dirita, ĉio ĉi certe estas por ni komprenebla, kaj mi devas konfesi, ke tiu al vi konfidita alta instruo, kiun vi ĵus al ni malkaŝis, *skuis* min!

La insulanoj volis, per sia senfina ĝojpafado, celebri siamaniere nur la tagon de ilia sanktulo; sed nun mi preskaŭ havas la impreson, ke ili nekonscie salutis la tagon, kiu estis senvualigonta al ni, kunigitaj en tiu ĉi loko de antikvaj misteroj, la profundan spiritan agadon, en kiu la enigmo de l’ homa ekzisto montriĝas alkondukita al tiom mirakla solvo...

Nur unu demando ankoraŭ restas al mi, kvankam mi bone scias, ke ĝi eble estas malsaĝa; sed kiom ajn feliĉigita kaj levita mia ‚koro‘ sentas sin je ĉio kion vi

diris, ĝi tamen pro tiu demando ne povas sin doni al ĝojo.

Eble ankoraŭ tromulto en mi estas tiom ligita al la tero, ke mi ne *deziras* tiri la konkludon, kvankam tiri ĝin mi *povas*. –“

„Se mi ne eraras,“ interrompis lin la plimaljunulo, „ni estas en tute egala situacio!

Ankaŭ mi ne trovas solvon, se mi devas diri al mi, ke *nur en la tera korpo* venas liberiĝo al la spirito, dum tiom multaj amo-ligiloj kunigas min kun forpasintoj, kiujn mi apenaŭ povas kalkuli al tiuj, kiuj trovis liberiĝon jam dum sia surtera vivo. –“

„Jen tio, kion ankaŭ mi pensas“, intermetis la ‚abato‘. „Ŝajnas al mi, ke je tiu ĉi punkto klara konkludo estas postulata; sed restas en mi io, kion mi ne povas senti ‚malbona‘ kaj kio tamen malpermesas al mi veni al tiu konkludo!

Terura restas por mi la penso, ke ĉiuj, kiujn mi konis ĉi tie surtere kaj kiuj kredis sian beatecon atingebla sur *aliaj* vojoj, estas nur viktimoj de neniigo!–“

*

Sed la plej juna el la amikoj ridetis kaj diris:

„Pardonu al mi: tie ĉi vi tro rapide sentis vin devigata veni al opinio, kiu tute ne estas postulita!

Tre malproksime estis de mi, diskonigi instruon, laŭ kiu estas perditaj ĉiuj, kiuj ne sukcesis dum sia terkorpa vivo unuigi sin kun sia spirita, eterna konscio.

Mi diras nur, ke tie ĉi sur la tero oni devas utiligi ankaŭ la *korpon teran* por atingi tiun celon, ke ĝin atingi oni tute ne *povas* sen la resonanco donata de la tera korpo *dum* oni vivas *sur la tero*, kaj plue: ke la eterna *spirita homo* en ni sciis *adapti* sin al la tera korpo tiel, ke de tiu ĉi interrilato, kreita de l' spirito, rezultis eblo de liberiĝo, kiun utiligi ni *povas* nur dum ni ankoraŭ vivas *en tiu ĉi tera korpo*, al kiu nia eterna spirito ligis sin per sia ‚falo‘ en la konscion de la besta korpo. – –

Tio neniel sekvigas la absurdan supozon, ke *post* la malligiĝo disde la tera korpo ekzistas absolute *neniu* eblo de liberiĝo!

Sed: dum, ankoraŭ ligitaj al la tera korpo, ni *povas aktive* kunagi en tiu liberigado kaj la fortoj de tiu ĉi korpo prezentas al ni tre efikan *helpon* por tio, se ni scias ilin uzi, – ni estas, *post* la malligiĝo, devigataj resti en tute *pasiva* teniĝo, kaj kio dum la terkorpora vivo estas atingebla en malmultaj jardekoj, tio povos tiam daŭri – laŭ la tera tempokoncepto – *jarmilojn*, eĉ *eonojn!* – – –“

*

„Tio ja sonas diference,“ diris la fizikisto, „kaj mi eĉ *povas*, laŭ diversaj teraj analogioj al mi konataj, klarigi al mi tiun fortointensigan funkcion de la tera korpo.

Krome mi nun tre bone komprenas, ke homoj ekkonsciintaj tiajn interligitaĵojn ne konis pli altan taskon ol tiun: montri al siaj kunhomoj la vojojn, sur kiuj ili povas trovi, *jam dum sia surtera vivo*, la celon de unuiĝo kun Dio. –

Kio pasintece ofte ŝajnis al mi bizara gnostika ludo, tio nun montriĝas en lumo, kiu devas resti *tute nealirebla* al la kutima diskursiva pensado, kaj mi ekkonas, iomete hontante pri mi kaj aliuloj, kiom *facilanime* – havante nenian realan ekkonon spiritan kaj katenite de la aroganteco de supraĵe lernitaj frazoj – oni sentas sin vokita juĝi ion, kion juĝi oni *tute ne kapablas...*

Kiom nedireble malsaĝaj ŝajnas al mi, post tiu ekkono, la superinteligentuloj, kiuj, en sia groteska tromemfido, kredas esti definitive traktinta eternan misteron, kiam ili nur dissekcis laŭ sia *propra* mallarĝa regulo la instruojn de veraj sciantoj, por povi ordige meti la rezultintajn pecaĉojn en sian mizeran nocio-skatolaron!

Trudiĝas al mi tiurilate la bildo de kaĝo de simioj, en kiun ŝercemulo ĵetis spegulon: la drolaj bestoj fine ne sciis fari ion alian ol furioze ĝin dismordi, vane provinte malkovri dorsflanke ĝian sekreton kaj ĉiam denove montrinte la dentojn pro tio, ke rigardis ilin el ĝi nur ilia *propra* grimaco. – –

Oni do devas *mem* jam esti *kapabla* senti en si reflektion, kiom ajn malfortan, de l' *eterna spirita lumo*, se oni volas kompreni, ke la altaj instruoj *de la homoj spirite vekigintaj* ne povas esti enpremataj en la ŝablonon de malvastrigarda avidenco je prestiĝo!

Estas vere plezurige vidi, ke kelkaj malgravuloj sur la kampo de spekulativa ekkono intelekta ŝajnas tute serioze kredi, ke la *homoj spirite sciantaj per mem-transformiĝo*, pri kiuj ni nun aŭdis de vi, scias absolute nenion pri la diversaj ebloj de trompiĝo, kiuj povas erarigi serĉanton de ekkono, dum – kiel mi pli kaj pli vidas – la malabunda scio pri animaj interligitaĵoj, pri kiu eksperimentistoj delogitaj de ŝajno estas hodiaŭ tiom fieraj, estis rigardata de tiuj en la spirito lumantoj *jam antaŭ jarmiloj* nur kiel *plej banala sciaĵo*, super kiu ilia ekkono spirita estis *leviginta* je Siriusa distanco ...

Tiuj droluloj vivas en *kulisa mondo*, kiun ili konstruis al si mem, kaj ilia vanteco igas ilin vidi ĉion nur *en la Bengala fajro de iliaj falsaj konkludoj*: ili kredas esti foriginta la *sunon*, ĉar iliaj dekutimigitaj okuloj suferas *blindigon* fare de ties lumo. — — —

*

Sufiĉe longe ankaŭ mi lasis min gvidi de tiaj blindaj kondukantoj de blinduloj kaj ĝojis pri ilia ‚saĝeco‘, kvankam finfine ĝi montris al mi tre klare sian *malvastecon*, sed tiutempe mi ankoraŭ kredis —

same kiel multaj aliaj en simila situacio –, ke la homo ne povas akiri tute plenan spiritan ekkonon...

Vi, kara amiko, montris al mi dum tiu ĉi vojaĝo, ke mi eraris!

Mi dankas al vi!

Sed mi deziras diri al vi ankaŭ, ke nenio plu retenos min iri la apenaŭ ekiritan vojon al la *lumo de la eterneco ĝis la fino*, ĝis mi – se miaj surteraj tagoj tion permesas – atingos, dum mia ekzisto sur tiu ĉi planedo, la altan celon, kiun, kiel mi sentas nun, mi tie ĉi atingi povas!

Plej malmulte konfuzos min estontece la sensubstancaj frazoj de tiuj, kiuj, ĝojante pri sia ŝajna saĝo, scias nur fosi en vantaj vortoj kaj opinias tiun malsaĝaĵon la vojo al ekkono! –“

*

La plej juna el la tri viroj estis levinta sin kaj nun rigardis enpensiĝinte sur la vesperan maron, kvazaŭ li ne bone atentus la lastajn parolojn: li videble volis *ignori* almenaŭ la *dankon* de l' amiko.

La blankbarbulo nun parolis tiele:

„Gravaj aferoj hodiaŭ okupis nin tie ĉi, kaj nia tempo de ripozo sur tiu ĉi belega insulo evidente staras sub favoraj steloj!

Mi mem havas preskaŭ nenion por aldoni al la eldiroj ĵus aŭditaj, escepte ke mi kredas havi multe pli gravan kaŭzon por deziri al mi, ke mi ne devu foriri

de tiu ĉi tero antaŭ ol doniĝis ankaŭ al mi la celo, kiu nur nun, en mia tiom maljuna aĝo, staras antaŭ mi.

Sed mi ne povas kredi, ke providenca okazigo nun prezentas al mi tiun celon kiel ion atingeblan, se ne estus al mi destinite ankoraŭ kreski renkonte al ĝi. –

Se mi pli frue estus aŭdinta pri ĉio ĉi en la sama maniero kiel okazis dum tiuj ĉi tagoj de vojaĝo, – kiu scias, ĉu mi estus estinta matura por sekvi la alvokon?!

*

Mi devas konfesi, ke en pli fruaj jaroj mi sentis min tre bone, havante mondrigardon, kiun mi mem estis elpensinta al mi kaj kies fono estis ankoraŭ la granda fina linio de la eklezia eskatologio: la doktrino – akceptita de mi en frua juneco kun tiom da kredo – pri la ‚finaj aferoj‘ tia, kia ĝi vere imprese estis renkontinta min, fervoran konfesanton de la kredo instruita al mi per edukado, en la ekzercoj de l’ sankta Ignaco de Lojola, kiujn mi praktikis sub la gvidado de ties klerikaj filoj preskaŭ ĉiujare.

Hodiaŭ neniom bedaŭrante tiun edukadon, mi eble nur nun estas plene kapabla juĝi, kiom da beno ĝi enportis en mian vivon, *malgraŭ* siaj eraraj premisoj, ĉar ĝi konigis al mi *metodaron de pensado* kaj *kapablon bridi la sentadon*, kiuj rezultigis tian *voloformadon*, kian mi sincere dezirus al iu aŭ alia konanta nur

la malluman flankon de la agado de tiuj zelotoj de la Roma eklezio. –

Kvankam poste mi lernis rigardi multon *aliamaniere* ol kiel ĝi estis montrita al mi, tamen konserviĝis al mi la *severa spirita disciplino*, kiu malebligis, ke mi donu min al tro emociaj religiaj revaĵoj, same kiel ĝi igis min ĉiam rapide travidi la falsajn konkludojn de vanta spekulativa pensado, eĉ kiam ili plej alloge reklamis sin kiel ‚nerefuteblajn‘.

Sed, verdire, en la fundo de mia animo estis *rezignacio*...

Mi troviĝis en situacio karakterizita per la vorto ‚*ignorabimus*‘^{*}: mi kontentigis min akcepti, ke pri multaj aferoj ni povos neniam ion scii, kaj mi opiniis konsilinda, laŭ la eldiro de l’ poeto, ‚*trankvile adoration neesplorable*‘ ...

Ĝojante, ke mi tiel povis teni min en certagrada interna ekvilibro, mi probable ne estus estinta aŭskultanto atenta, se oni tiutempe estus parolinta al mi pri aferoj similaj al tiuj, al kiuj ni jam dediĉis ne malmultajn horojn. –

Nur dum la lastaj jaroj, kiam pli kaj pli alproksimiĝis al mi la penso pri mia forpaso de la tero, okazis ŝanĝo en mi, kaj mi ofte sentis min instigata malrigli perforte pordon, post kiu ŝajnis al mi kaŝita la sekreto de la finaj aferoj. – –

* Latina vorto signifanta ‚ni ne(niam) scios‘. (Rim. de la tradukinto)

Tial, ke mi ne sukcesis akiri sperton *propran*, mi fine provis formi al mi juĝon baze de la sperto de aliuloj, kaj tiel okazis, ke mi okupis min dum sufiĉe longa tempo pri la studoj, kies mencio al vi estis la kaŭzo por ĉiuj komunikoj, kiujn ni de vi, juna amiko, ekde tiam ricevis.

Ankaŭ tiukoncerne mi tute ne bedaŭras esti dediĉinta tiom da valora tempo al la trastudado de la raportoj, kies science neriproĉeblaj aŭtoroj estis por mi garantiantoj almenaŭ de tio, ke ili ne estis viktimoj de iu ruza trompo.

Sed nun mi vidas, ke mi tamen estis sur malĝusta spuro, kaj ke la enigmoj de nia eterna spiriteco *neniam* fariĝos solveblaj per eksperimentado kun somnambuloj kaj mediumoj.

*

Ankaŭ mi nun estas trovinta la komencon de la ĝusta vojo!

Ĉu mi povos ĝin iri ĝis la celo ankoraŭ dum mia surtera vivo, tion scii restu rezervite al pli altaj potencoj! – –

Intertempe mi dankas al la mistera gvidanta forto, kiu donis al ni dum tiu ĉi vojaĝo la okazon percepti en ni mem – kvankam ankoraŭ kvazaŭ el granda distanco – la unuajn radiojn de *eterna lumo*.

Mi sentas, ke tiu, kies tasko estis tiri iomete flanken la vualon, kiu kaŝis al ni tiom, rifuzas akcepti nian dankon, sed tio ne povas malhelpi min tamen danki al li en mia koro, kaj se li mem nomas sin nur ‚disĉiplo‘, li rekomendu nin al la gardado fare de tiuj, kiujn li mem honoras kiel *Majstrojn!* – – –“

*

Kaj la plijunulo respondis kaj diris:

„Danki devas nur *mi*, pro tio, ke mi fariĝis instrumento en la mano de alta gvidanta forto, kiu proksimigis vin al mi kaj kreis oportunojn doni el la malmulto, kiun mi mem doni *povas!*

Sed *mi* jam ne estas bezonata, se vi estas pretaj, plue – kaj nun konscie – konfidi vin al la sama alta forto gvidanta, pri kiu vi scias, ke ankaŭ mi ŝuldas al ĝi mian konadon.

„Petu, kaj vi ricevos!

Serĉu, kaj vi trovos!

Frapu, kaj al vi estos malfermite!‘

Kiu diris tion al siaj samtempuloj, tiu ankoraŭ *hodiaŭ ne estas malproksima de la tero*, kaj la malmultaj, pri kiuj mi parolis al vi, nomante ilin ‚*lumantoj de la Pralumo*‘, konas lin kiel sian fraton en lia spirita formo, en kiu li ĉiam restas ĉe la homoj de la tero – *en la spirita vivosfero de la tero* – ĝis la lasta de la spiritaj homoj, kiuj devas transdoni sin tie ĉi al

la homa besto sekve de sia ‚falo‘ el alta lumado, estos forlasinta la teran korpon ...

Kiu scias ‚voki‘ lin *per ago kaj vivo*, al tiu li estas *proksima*, kiel aliaj fratoj liaj, kiuj en *sama* maniero restas ĉe la tero, kvankam ili jam antaŭ longe forlasis la teran korpon!

*

Ne estas necese scii *pri la ekzistado* de tiuj altaj spiritaj helpantoj por ricevi ilian helpon, kaj ne estas necese, ke oni konfesu *per vortoj* tiun, kiun ili nomas la ‚Granda Amanto‘ kaj en kiu granda parto de la homaro vidas sian savanton. –

Ricevis tiun altan helpon sennombraj homoj, kiuj *nek konis la nomon de tiu altulo, nek sciis pri liaj spiritaj fratoj*, ĉar kio *sole* estas postulata tie ĉi, tio estas ‚kredo‘, kiu sin atestas per *agado kaj ne estas ligita ekskluzive al iu ajn konfeso de religia opinio!*

*

Certe, tiu certa scio estas kondamnata de ĉiuj, kiuj deziras konservi la eraran supozon, ke la savo estas atingebla nur per ligiteco al la kredoformuloj de *ili* elpensitaj, sed la eterna *spirito*, al kiu ili kredas servi, estas eĉ pli malproksima al ilia ‚kondamno‘ ol al ilia ‚beno‘, pri kiu ili supozas, ke sole ili rajtas donaci ĝin en ties nomo! –

Sed eĉ tiu ligiteco *ne malhelpas*, ke ankaŭ la ligoj tamen povas sperti *la saman altan helpon*, kaj vere

restas *tute sensignife*, kiun ili kredas devi adori kiel sian helpanton! –

La kredanta insula popolo hodiaŭ preĝas al sia sanktulo; sed kiu ajn li estis dum sia surtera vivo – ĉu liaj vivo kaj agoj meritis adoron aŭ ne –, peto efikiĝinta per *agado* kaj *vivo* tamen atingos la *verajn altajn helpantojn spiritajn*, ne aliamaniere, ol kiam la ŝejko de la dezerto levas sian koron al Alaho, aŭ la pia hinduo al iu dio el sia panteono, ŝajnanta tiom stranga al ni Okcidentanoj. – –

Jes, eĉ la sovaĝulo en sia fetiĉa templo povas ricevi la saman helpon, se li per sia tuta agado plenumas la kondiĉojn tiom, kiom li, kun *sia* kapablo de ekkono, ilin plenumi povas. – – –

*

Tio estas – en la *plej strikta, reala* senco – la *,bona mesaĝo‘*, kiun la *Majstro de Nazareto* donis al la homaro; sed ankoraŭ hodiaŭ oni tre malofte renkontos homon, kiu ĝin komprenis! –

Unuflanke, ĉio *spirita*, pri kio raportis tiu mesaĝo, estis pli kaj pli malligata disde la tero kaj vaporigata, fariĝante nereala *nenio* super nubaltaĵoj, dum aliaflanke oni klopodis kunfandi la *spiriton* kun la *materio* tiugrade, ke fine oni ne plu rimarkis, ke oni tenas en la mano *plu nenion alian ol materion*. – – –

Sed kiu volas *trovi* en si la *spiriton*, tiu ĉiam konsciis, ke li povas trovi ĝin nur *en formo egala* al tiu de

la materio, sed ĝi estas trovebla nek *enprofundiĝinta* en materio, nek *super* ĉio materia, en elrevita, nereala imago!

*

Same: la spirito, dum ĝi ankoraŭ ne estas *unuigita* sin kun la *propra konscio* de l' homo, neniam povas atingi ties konscion aliamaniere ol per tio, ke ĝi kreas la eblon, ke la konscio *ankoraŭ ne* unuigita kun ĝi povu sentante *partopreni* la internan luman vivon de alia homo konscio jam *unuigita* kun la spirito! – –

Tiuj ĉi homoj *plene unuigitaj kun la spirito*, vivantaj sur nia tero, estas la malmultaj viroj, pri kiuj mi parolis, nomante ilin *lumantoj de la Pralumo!*

*

Ne per interkonatiĝo kun unu aŭ ĉiuj el ili oni proksimiĝas al ili, ĉar tiu alproksimiĝo dependas *nek iliaflanke nek niaflanke* de libera *arbitro* aŭ de personaj *deziroj*, – sed nur *la propra interna memteno estigita per agado kaj vivo* decidus, ĉu oni kapablas partopreni ilian vivon de konscio unuigita kun la spirito, aŭ ne!

Sed kiu fariĝis kapabla – eĉ se nur en plej milda eksento – partopreni ĝin, tiun homon eĉ ia dio ne povus malhelpi; kaj ju pli bone li scias *firmigi* tiun sian kapablon, des pli multa *forto* venos al li el la spirita sfero, en kiu baziĝas la *konscio*, unuigita kun la Dia spirito, de tiuj majstroj de ekkonado, kaj des pli multa

helpo estos donata al li el la fluegoj de la spirita, ĉion ampleksanta potenco, en kiuj ilia volo agadas eterne laŭ la leĝo de l' spirito! — — —

*

Kiu tion ekkonis, tiu jam multe progresis sur la vojo kondukanta lin *al la unuiĝo kun la spirito en si mem!*

Estos tiom malproksime de li, rigardi la ‚lumantojn‘ kiel mense malsanajn sektanojn kaj frenezajn entuziasmulojn, kiom li gardos sin supozis, ke ili estas nehomaj duondiaĵoj aŭ vantaj sorĉistoj! — —

Mi nun estas stariginta vin, karaj amikoj, sub la ‚kampon de forto‘ de tiu alta helpo ...

Pli mi ne povas fari, sed pli ne povas fari eĉ unu el tiuj, pri kiuj mi parolis kaj al kiuj mi ŝuldas mian tutan ekkonadon!

De *vi solaj* dependas nun, kiajn fortojn vi scios kvazaŭ *ensorbi* el tiu ‚kampon de forto‘! — — —

Tiam danku al ‚*Dio*‘, kiu *en vi mem* ripozas kvazaŭ enŝlosita en tabernaklo, pro la *graco*, kiu eble doniĝos al vi; sed danku ne al mi, kiu fariĝis nur *impulsilo* por vekti vian volon! —“

*

La rifoj elstarantaj el la maro proksime de ties bordo jam de longe kuŝis en opalkolora delikata nebulo, kaj nur danke al la lasta rebrilo de l' tago estis distingbla sur ili lumo kaj ombro.

Super la kapoj de la tri amikoj jam brilis la unuaj steloj, kiam oni fine decidis forlasi la sanktigitan ejon por reiri la padon kondukantan al la urbeto sur la dorso de la insulo.

Jam regis densa mallumo, kiam la migrantoj atingis la pensionon, kiu nun estis ilia hejmo por la sekvantaj tagoj.

Tie oni nun prenis sian vespermanĝon, sed ĉar oni poste ankoraŭ ne sentis sin sufiĉe dormema, nek volis denove tuŝi la profundajn aferojn hodiaŭ preparolitajn ĉe la groto de Mitrao, oni iris al la malgranda placo, kie la insulanoj kaj iliaj gastoj promenis kvazaŭ en festa halo kaj ĝojis pri la melodioj ludataj de gaje muzikanta orkestreto.

VETURO SURMARA

Kiam la festa ĝojo de la gajaj insulanoj estis cedinta al la ĉiutaga laboro, la tri amikoj trovis sin en dia silento, kiu donis al ili ĉion, kion ili estis venintaj serĉi tie ĉi por siaj nervoj lacigitaj per konstanta rigardado.

Ĉiumatene ili ree ekvidis la vaste brilantan maron, kiu ŝajnis plu apenaŭ povi ampleksi la abundon da radioj fluegantan senĉese malsupren el la lumanta, nemezurebla spaco super ĝi.

Ne mirige, ke en iliaj koroj fine estiĝis la deziro veturi pliafoje sur tiun maron de lumo por cirklumi, en radiantanta suna heleco, la insulon antaŭ ol diri al ĝi adiaŭ por longa tempo.

*

Iun fruan matenon ili migris, sur longaj serpentaj vojoj, malsupren al la marbordo, kie boatistoj jam atendis kun grandspaca boato, kiun oni estis luinta antaŭatage por la veturo.

Tio porvive bezonata dum tiu ĉi tago – en kvanto sufiĉa por la amikoj mem kaj por iliaj remistoj – jam antaŭe estis transportita tien per sendito kaj kuŝis

bone gardita, kaj ŝirmita kontraŭ la venonta varmego de la suno, en la bilĝo de la peza remboato.

Kiam oni nun veturis al la libera maro, impone granda velŝipo estis krozanta antaŭ la insula haveneto, kaj ĝiaj flavaj veloj ŝvelis je la vigla vento matena.

Gigante leviĝis la altaj, ruĝetaj rokokrutaĵoj, kiuj supre portis blankajn vilaojn ĉirkaŭitajn de hela verde, kiuj ŝajnis apenaŭ trovi apogon kaj, de tie ĉi, aspektis kiel ludildomoj de infanoj.

Oni unue ĉirkaŭveturis la rokomurojn laŭ vasta kurbo, por povi ĝui la grandiozan vidaĵon de kelka distanco.

Sed tiam la remistoj pliproksimigis la boaton al la insulo, tiel ke la strukturo de la rokaĵo estis kaptebla per la okuloj plej klare.

Nun oni unue traveturis la ne tro larĝan markolon, kiu apartigis la kontinantan landon disde la insulo.

Tie sur la kontinento etendiĝis malproksimen, en plej nobla ritmo, ĉeno de modere altaj montoj, super kiuj sporade leviĝis pli altaj montopintoj.

La tuta marbordo kontinenta troviĝis ankoraŭ kovrita sub delikatnebula vualo, kiu igis ĝin aspekti briletanta en multaj, mole paŝtelaj nuancoj, de luma rozkoloro ĝis milde hela bluo.

Tie ĉi, al la amikoj sidantaj en la boato la lumante verde blua maro montriĝis tiom mirige klara kaj

travidebla, ke oni povis vidi la fundon kun ĝiaj ŝtonoj kaj diversaj fukokreskaĵoj tiom precize, kvazaŭ oni rigardus en tute malplenan profundon, kaj estis preskaŭ iom malagrabla la sento, ke la boato kvazaŭ ŝvebas en nenio super tiu abismo.

En plej fora malproksimeco, kuŝis super la maro kelkaj pale violaj nubostrietoj, la lastaj signoj de la pasinta nokto, preskaŭ ensorbitaj en la roza lumo matena, kiu supre jam estis transformiĝanta en oran helecon kaj iom post iom, en pli granda alto, unuigis sin al plej luma flava verdo kaj fine al plej brila turkisa bluo.

Tian fruan matenon sur suda maro oni devas sperti mem, por vere ekkapti ĝian belecon! --

*

La boato de la tri amikoj nun veturis konstante proksime de la insula bordo.

Tie alternis altegaj rokbastionoj kaj krutaj ravinoj, kaj kelkloke etendiĝis mallarĝaj valoj, kie maldensaj olivarbaroj kaj citronujĝardenoj, oranĝujaroj ĉirkaŭbaritaj kaj mirtoarbedoj preskaŭ atingis la maron.

La altaj rifoj proksime de la marbordo, kiujn oni antaŭe estis admirinta nur de la insulo, nun formis potencon pordegon, kaj la remistoj insistis, ke la boato estu stirata tra tiu roka volbo.

Oni nun klare ekvidis la ejon de la *groto de Mitrao*, kie, dum tiu vespero, oni estis ricevinta sciigon tiom sekvoriĉan.

Kun certeco oni ankaŭ rekonis la krutan vojeton, sur kiu eble, en antikva tempo, la inicatoj venintaj de la maro ascendis al la sanktejo.

Post kelkaj pliaj rembatoj oni ekvidis, alte super vasta, fekunda valo, sur la montoselo, la helan urbon nun de la alia flanko, dum oni matene estis vidinta ĝin leviĝi super la malgranda haveno. Tie, ĝi ŝajnis kontinue kreski de la havena loĝdomaro supren al la altaĵo, sed rigardate de tie ĉi ĝi kuŝis sur la montoselo kiel pinakla krono, maldekstre protektata de la plej alta montodorso de la insulo, dekstre superstarata de nur moderaj montetoj.

*

Ĝis nun la tri amikoj estis nur donintaj sin al ĉio bela, kion iliaj okuloj favorasorte povis vidi, kaj la remistoj – ne malmulte fieraj pri sia belega hejml-regiono – ne laciĝis doni klarigojn aŭ montri apartajn belaĵojn.

Jam de longe la ŝvito estis gutanta de iliaj fruntoj, kaj oni rimarkis, ke ili volonte iom ripozus, antaŭ ol ĉirkaŭveturi la insulon laŭ la cetera, pli granda parto de ties periferio.

Proksime de la loko, kie oni troviĝis, estis malgranda albordiĝejo por fiŝistoboatoj.

Kelkaj pitoreskaj, malaltaj domoj borderis la golfe-ton, kaj je la marbordo oni vidis retojn elstreĉitajn por sekiĝi en la sunlumo.

Tien la vojaĝantoj nun stirigis la boaton, kaj, surbordiĝinte, ili mem nun ĝojis esti eskapinta portempe el la senmova sidado en la boato kaj povi reuzi siajn membrojn sur firma tero.

Oni ĝojis ankaŭ pri la junularo, kiu tie ĉi havis sian banejon kaj montris plej diversajn artaĵojn de subakviĝo, oni iom observis la fiŝistojn, kiuj ordigis sian ilaron por la venontnoka kaptado, kaj fine oni sin refreŝigis, kune kun la du fratoj remistoj, per kelkaj sukaj fruktoj el la provizo kunportita en la boato.

Sed baldaŭ poste elveturinte de tiu loko, oni nun vidis la fiŝistodomojn jam nur de malproksime, kaj la ondoj, iom post iom pli altiĝantaj, ree portis la glitantan boaton laŭlonge de kolosa rokmuro, kiu nur kelkloke estis interrompata de mallarĝaj fendoj kaj diverskoloraj briletantaj grotoj, en la direkto al la kru-tegaj deklivoj okcidentaj.

Francisko, la pli juna el la du remistoj, sciis, ke sur tiu ĉi flanko de la insulo, kiu nun kuŝis en la ombro de la altaj rokoj kaj de la monto ilin superanta, estas ripozejo, kiu ankaŭ al lia pli maljuna frato certe ne estis nekonata, sed kiun li laŭdegis plej entuziasme, kvazaŭ li mem estus malkovrinta ĝin.

Tie oni volis fari tagmezan ripozon kaj longe restadi, decidante, ke nur kiam la suno estos transpasinta la monton kaj proksima al la maro oni komencos la lastan parton de la veturo kiel vojon hejmen.

*

Sed la remistoj devis fortege peni por kontraŭstari la ondojn, kaj estis necese stiri la boaton for sur la liberan maron, por ke ĝi ne restu tro proksima al la malaltaj rifoj, kiuj ĉi tie ĉirkaŭis la altajn rokmurojn kiel multpinta barilo.

Fine la du fratoj pensis, ke estas veninta la tempo por redirekti la kurson de la boato al la insulo, kaj nun ili tenis la kilon rekte al hela loko, kiun oni vidis sur la malproksima marbordo.

Pliproksimiĝinte oni ekvidis malprofundan golfon, en kiu ne povis estiĝi surfo, kaj super granda, blanke lavigita ŝtona deklivo troviĝis idilia gazonteraso kun mirtoarbedoj, profunde malhela laŭro, eŭkaliptoj kaj olivarboj: do loko forte loganta al restado.

Ne longe poste, ondo lerte utiligita ĵetis la boaton sur la teron, kaj post kiam vojaĝantoj kaj remistoj estis prenintaj sur sin la penon tiri ĝin el la sfero de la maro supren sur la deklivon, oni povis esti certa pri ĝia sekureco kaj ascendi trans la ŝtonaron al la ripozejo.

La du boatanoj alportis la korbojn kun manĝaĵo kaj trinkaĵo, akceptis tion, kio estis kunportita por ili, kaj

iris returne al sia boato, por *tie* manĝi kaj ripozi, kaj la vojaĝantoj unue ne povis kompreni, kial la samaj homoj, kiuj estis gvidintaj ilin al tiu ĉi loko de – laŭ sia propra eldiro – aparta beleco, tamen ne mem volis ĝui ties belecon.

Sed en tio montriĝis nenio alia ol la admirinda *takto*, kiu eĉ la plej simplan filon de l' sudo faras aminda al fremdulo komprenanta lin.

*

Certe, ankaŭ plej malbona kanajlaro troviĝas en la grandaj urboj, sed kie la nobleco de la popolo konserviĝis pura, tie eĉ la plejmalriĉulo portas sian ĉifonan malriĉecon kiel princo, kaj la majesto de lia interna digno fariĝas precipe admirinda, ĉar en ĉiu situacio li sentas, *kio decas al lia pozicio*, kaj malgraŭ la libereco de siaj gestoj li neniam agas kontraŭ la rolo, kiun la sorto destinis al li en la agada moviĝado de tiu ĉi surtera vivo ...

Tiel ankaŭ la du fratoj bone sciis, ke nun la vojaĝantoj certe preferas esti *solaj*, kaj kiom ajn ili mem dezirus etendi sin sur la sama gazono, kion ili certe jam ofte estis farintaj, dum la restado ĉi tie kun siaj edzinoj kaj infanoj je festa tago, hodiaŭ tio ŝajnus al ili kvazaŭ sakrilegio aŭ delikto, kiu ĉiam algluiĝus al ili. –

*

La manĝo gustis bonege, kaj kvankam sur tiu ĉi insulo ekzistis neniu klara fonto, tamen la tero estis doninta delikatajn fruktojn, kiuj taŭgis por kvietigi ankaŭ la soifon post la spica manĝo. Oni ankaŭ trinkis ioman sukcon de la vito kreskanta sur la deklivoj de la insulo, sed tiu vino estas tiom fajra, ke ĝi ne bone povas anstataŭigi akvon. –

Post kiam oni estis longtempe fordoninta sin al la kvieto, la plej juna el la tri ekparolis kaj diris:

„Sur loko tre simila al tiu ĉi nia ripozejo, mi iam ricevis neforgeseblan, altan instruon.

Estis dum la vojaĝo al Oriento, kiun mia patro estis ebliginta al mi antaŭ ol mi eniris en mian novan sferon de laboro.

Kiel tie ĉi, mi troviĝis sur *insulo*; kiel tie ĉi, vid-alvide al la *maro*; kaj kiel tie ĉi, oni ripozis inter mirtoarbedoj kaj laŭro, kvankam la herbo estis multe pli malforta kaj ne montris la abundon da floroj, kiu ĉirkaŭas nin tie ĉi.

Tiutempe mi neatendinte revidis mian guruon, kaj la cirkonstancoj de nia revido estis sufiĉe strangaj.

Sed ĉio ĉi povas esti rakontata ankaŭ *hejme* en vinttra vespero, antaŭ kamena fajro, kiam la vento muĝas kaj vipe ĵetas la neĝon kontraŭ la fenestroj, nun ke ni estas en tiom proksima, harmonia rilato. –

Sed kio ĵus revenis en mian memoron, koncernas la *instruon*, kiun en tiuj tagoj mi ricevis, kaj pri kiu ni

eble povas ankoraŭ paroli, por plenumo fini tion, kio faris nian kunestadon tie ĉi tiom fruktodona.“

*

„Mi ne scias, kion hodiaŭ vi volas prezenti al ni,“ interrompis la plejmaljunulo, „sed mi kredas, ke ni pliaĝuloj el tiu ĉi rondo konsentas, ke ni povas nur gajni per vi, kaj tio, kion vi ankoraŭ havas por diri al ni, trovos aŭskultantojn pretajn akcepti ĝin!“

„Tute certe,“ diris la ‚abato‘, radianta de videble plezuroplena kontenteco, kaj aldonis: „Estas ja ape-naŭ kompreneble, kion vi sciis fari el ni du maljunaj kapoj en tiom mallonga tempo, ekde kiam vi fine ‚levis vian vizieron‘! –

Mi povus preskaŭ ofendiĝi pro tio, ke vi antaŭe estis tiom ofte kuna kun ni kaj tamen ĉiam gardis vian sekreton antaŭ ni ‚profanoj‘!

Ni vere devas esti estintaj, en viaj okuloj, enradi-kiĝintaj ‚skeptikuloj‘, sed vi ja scias, ke *skeptiko* kaj *mistiko* estas en tre proksima *parenca rilato*! –

Kiu ne havas en si ioman *skeptikon*, sentos nenian *bezanon* ekscii, kio okazas *malantaŭ* la kurteno, je kies bildtekstaĵoj li estas admonata kredi...

Kiel vi vidis, ni ‚skeptikuloj‘ tamen ne estis tiom nekorekteblaj, kiom vi eble pensis!

Nia tuta skeptiko ja estis nenio alia ol la kaŝita sopirado povi *kredi*; sed hodiaŭ tiu ‚povo kredi‘ estas terure malfaciligata al oni!

Tamen: se oni tiam – kiel en via kazo – subite ekvidas, ke malantaŭ ĉiu el tiuj kredopostulatoj verdire kaŝiĝas nerefutebla, kvankam mallerte formulita *veraĵo*, oni ekatentas kaj resendas la konkludojn de raciisma pensado en ilian decan sferon! – –

Sed *kiu* do nuntempe *ricevas* tian instruon?!

La plej multaj homoj simple vivas sian vivon tiel, kiel la eksteraj cirkonstancoj tion permesas, interesiĝas pri nenio alia, kaj ĉesas pensi pri tio, kies sekreton ili ne povas solvi.

Kiam oni estas vere enpreninta en sin tion, kion vi donis al ni dum tiu ĉi vojaĝo, oni absolute ne povas kompreni, ke la homaro, kvazaŭ en sovaĝe ekscita dancado, sin turnas ĉirkaŭ sia propra akso kaj neniam suspektas, ke ĝi tenas sin mem fiksita al la sama loko!

Kial niaj *infanoj* ne jam scias pri ĉio ĉi! – – –

Ĉu vere estas necese, ke *ĉiu* nova generacio penu malkovri *denove* por si mem kvazaŭ la „elementojn de l' aritmetiko“??

Sed mi rimarkas, ke mi glitis en paroladon, kaj petas vian pardonon, ĉar mi atendas nenion alian, ol ke nia juna amiko, al kiu doniĝis tiom da *sperto*, instruu nin plue! –“

*

Intertempe la suno estis aperinta el malantaŭ la montodorso, estis pli kaj pli leviĝinta, ĉirkaŭirinta la alian flankon de la insulo, kaj transpasinta sian kul-

minon, kaj nun videble sopiris eniĝi en la maron, kvankam ĝi ankoraŭ staris sufiĉe alte, ke oni ne devis timi, ke la maro ĝin tre baldaŭ englutos.

Tamen ĝiaj radioj jam komencis alpreni la flavon de la frua vespero, kaj iom post iom ankaŭ rozruĝaj tonoj miksiĝis kun ĝia lumo, tiel ke la malproksimo pli kaj pli ardis en luma, tamen mola koloro kaj ankaŭ la proksimo satoriĝis de koloro varma.

La okulo trinkis tiun belecon per longaj glutoj, kaj oni ekmiris, kiel aliatempe oni estas kapabla elteni la grizan ĉiutagecon de pli nordaj latitudoj ...

Tiuj homoj aŭdacintaj elekti al si tiujn krudajn regionojn certe devis esti la *plej kuraĝaj*, se ili ne estis la *plej malriĉaj*, kiuj preferis preni sur sin la rigorecon de someroj ne havantaj multon da suna lumo, ol plue esti servutuloj de la riĉaj homoj, kiuj opiniis, ke la abundo de la sudo estas destinita por kontentigi nur ilian propran ĝuoavidon. — —

*

Eble tiaj pensoj diversaj kruciĝis en la cerboj de la tri amikoj, kiam — post mallonga paŭzo — la plejjunulo ekparolis kaj diris:

„Vidu, karaj amikoj: mi ofte sentas min iom embarasata pro tio, ke mi ĉiam staras nur kiel *instruanto* antaŭ vi, la tiom pli aĝaj. Vi mem nomas min via *juna amiko*, kaj el tio mi ja pensas devi konkludi, ke vi rigardas la jarojn, kiuj min apartigas de vi, kvazaŭ

kiel *pravigon* pri multo, kiu aperas al vi stranga je mia persono, kvankam vi nun scias, ke tiu ŝajna ‚strangeco‘ havas siajn kaŭzojn! –“

Sed decide kaj kvazaŭ per unu voĉo la plimaljunuloj respondis, ke, se la plijunulo sin al ili alkalkulus, ili tion rigardus nur kiel honoron, kaj ke ili devas senti lin tiom pli juna nur tial, ke ili rigardas sin mem preskaŭ *tro maljunaj* por tia ŝanĝo de l’ pensado. –

*

Tiam la plejjunulo reekparolis, kaj lia voĉo estis movata de plej profunda emocio:

„Ho amikoj, kiom relativaj estas la nocioj ‚juneco‘ kaj ‚maljuneco‘, kaj kiom malmulte ili signifas en la regno *spirita!*

Tie, ‚aĝo‘ estas nur *tiu* tempo, kiun la *spirita* homo de la eterno jam trapasis ekde la tago, kiu donis al li *la impulson reiri al sia prahejmlando*.

Multe pli juna ol vi ambaŭ laŭ *teraj jaroj*, mi en la *spirito* supozeble estas la ‚*pli aĝa*‘, alie mi ne estus ricevinta, kion mi ricevis. –

Nun estas mia devo instrui vin, kvankam mi vere ne opinias min meritoplena kiel ‚instruanto‘! – – –

Krome, mi certe ne instruas al vi ion, kio ŝuldas al *mi* pli ol sian *formon*, kaj mi nur transdonas, kion mi ricevis.

Tial mi deziras paroli al vi hodiaŭ pri io, kion mi mem ricevis iam en simila loko, kaj se vi volas aŭs-

kulti min, vi ekscios ion, kion mi ĝis nun ne povis enmeti en paroladon mian.

La aferoj, kiujn ni dum tiu ĉi vojaĝo metas en vortojn, povas ja esti rigardataj el tre diversaj *perspektivoj*, kaj de ĉiu nova vidpunkto prezentiĝas ĉiam nova bildo! – –

Tio, kion mi diros al vi hodiaŭ, tamen estas interligita kun *antaŭe* priparolita afero, kaj servos nur por pli bone klarigi al vi, kion mi al vi jam diris. – –

Mi legos al vi la vortojn, kiujn la majstro mem parolis al mi, kiam mi estis denove renkontinta lin sur suda insulo kaj li volis malkaŝi sin al mia animo...

El mia taglibro mi prenas jenajn vortojn:

*

«Malproksimaj estas de ni ĉi tie la pereigaj kaj senbridaj avidoj de la Okcidenta mondo!

Malproksima restas de ni tio, kion la nepoj de viaj antaŭuloj eble sopiras kiel la bonan farton de sia vivo!–

Sur tiu ĉi insulo, kiu nin portas, nun spiras *sole nur ni du*, ĉar nur ni du spiras *konscie!* –

Ni *solaj* penas konscii pri tio, kion *pli alta* esto povus vidi en ni ...

Do mi demandas vin, – vin, kiun mia animo amas, – kiel vi povas senti vin mem sen ektimi antaŭ la ne-mezurebla vasteco de via animo?! – – –

Sed vi respondas al mi:

«Miaj antaŭuloj, aĥ, certe ne estis diferencaj de mi, kaj ili sciis, pli bone ol multaj el niaj samtempuloj, fariĝi mastroj de l' vivo!

Kial do mi fiere levu min super ĉiuj antaŭuloj kaj min sentu en ia majesto, kia certe ne utilis al mi, se mi hodiaŭ devus forlasi la teron por ĉiam?!»

Sed mi havas *alion* por diri al vi, kaj vi aŭdos min paroli tiele:

Tre malsaĝa montriĝas vi, mia amiko, se vi volas kateni vin en tia pensmaniero!

Tiel parolas nur *koroj malvastaj* kaj animoj *ligitaj al la tero*, sed *vin* mi jam vidis rigardi *pli malproksimen*, kaj *pli forajn malproksimecojn* mi instruis al vi percepti per agla rigardo!

*

Certe, vi estas *animalo* putranta, *kadavro*, kiu povas esti nur sterko al tiu ĉi tero, se vi lasas la senindulgan leĝon de tiu ĉi tero ekregi super via animo!

Sed mi instruos al vi *ion alian*, kaj vi ĵuru al mi, ke vi neniam lasos la malaltajn fortojn influe gvidi vin, kvankam vi *neniam malestimu* la teron, ĉar nur en la surtera korpo vi povas trovi *liberiĝon*, dum vi ankoraŭ devas porti la surteran ekziston! – –

Mi vin instruos ŝanĝi la *teran* veston en *flugilojn de kerubo*; – mi vin instruos levi vin per la forto de la *tero* al la *steloj*! –

Ni paŝadu kune, kaj vi baldaŭ ekvidos, ke mi montras al vi vojojn, kiujn vi certe ne konis *antaŭ* mia instruado, sed mi montros al vi ankaŭ, *kiel* ekiri tiujn vojojn, kaj kiel trairi ilin ĝis la plej alta celo! –

Kial ni interproksimiĝus, se mi ne povus fari al vi tiun aman servon?! – – –

*

Viaj instruantoj diris al vi:

〈Tre saĝa estas la klare lumanta homa *intelekto*, kiu scias lumigi *ĉion*, kio celas kateni la homan konscion en mallumo!〉

Sed jam de longe vi scias, ke via *intelekto* faris vin sklavo de milobla *eraro*, kaj *saĝa* vi komencas fariĝi, kiam vi diras al vi, *ke neniam via intelekto solvos la enigmojn*, kiuj vin ĉirkaŭas en tiu ĉi tera nokto! –

Kiam fine vi ekkonis tion ĉi unuan, mi povas doni al vi pluan helpon, kaj se vi volas *konfidi* al mi, via espero certe ne estos trompata! –

*

Vidu: ĉio, kion donas al vi via intelekta scio, estas ankrita en nur *malgranda* parto de via korpo: en via *cerbo*; sed la scio, kiu estu nutro por vi *eterne*, devas fariĝi *propra al via tuta korpo!*

Tion ni uzu kiel bazon por plua konstruado!

El tio venu al vi la certeco, ke vi *bezonas* vian *korpon*, se vi volas atingi plenan *ekkonon!* – – –

Ne en unu tago tia ekkono estas akirebla, sed kiu el la plej profunda fundo de l' koro ĝin *serĉas*, al tiu ĝi certe doniĝos! –

*

Kiel ĉiu pli profunda ekscito de via *animo* tuj *kunvibrigas* la atomojn de via tuta *korpo*, tiel via korpo devas lerni volonte sin movi, kiam io *spirita* tuŝas vian konscion.

Kio ajn spirita proksimiĝas al vi, vi *vere* ekkonos kaj tute proprigos ĝin al vi *nur*, kiam ĉiu *fibro de via tera korpo* ĝin sopiras kaj ekprenas, por tiam, same kiel du manoj interligiĝas, *lasi sin ekpreni!*

Nur en *tia* stato de <ekpreniteco>, sentata ankaŭ de via tuta *korpo*, tio venanta al vi el la *spirito* povos unuigi sin kun vi; kaj *io vere spirita* neniam estas akirata alie ol per plena *unuigo!* –

*

Pensado pri spiritaj aferoj eble povas certamaniere *progresigi* vin, sed ĝi *ne* kondukos vin al la *celo!*

Tiumaniere vi ja povas akiri kelkan scion apartenantan al tiu ĉi tero, sed kiam vi devas foriri el la tera korpo, tiu scio perdiĝos kaj estos sen iu ajn utilo al vi!

Scio *spirita* estas vere de *alia* speco!

Vi povas ĝin akiri nur, kiam vi estas kapabla *unuigi* vin kun la *objekto* de tiu scio! – – –

Dum scio pereonta ĉiam estas la rezulto nur de komprenado, ekkaptado, malkovro, eltrovo kaj konkludado, la scio spirita, eterne daŭranta estas la rezulto de perfariĝa ekkono en la propra interno! –

Vi povas atingi nenion en la spirita sfero, escepte se vi lasas la spiriton *ŝanĝi* vin mem en via plej interna interno kaj *fariĝas* tio, kion vi volas ekkoni! –

*

Hodiaŭ tio ŝajnas al vi nedireble malfacila, ĉar via pensado ankoraŭ ne lernis *obei* vian volon.

Sed vi ne povos percepti en vi mem ion spiritan, antaŭ ol vi kapablos ordoni *silenton* al via pensado kaj vi estos lerninta kontraŭagi ties enmiksiĝeman fanfaronadon!

Poste, kiam vi estos atinginta *sciiĝon per unuiĝo* en perfariĝa ekkono, vi povos abunde rekompenci vian pensadon pro la memreteno, kiun vi antaŭe devis postuli de ĝi!

Tiam vi povos doni al ĝi *novan* bazon por ĝia agado, sur kiu ĝi povos konstruadi kun la *sama* sekureco kiel sur la fundamento, kiun disponigas al ĝi la *fizika mondo*.

*

La kapablo de pensado estas mistera donaco, tamen ĝi povos doni al vi bonon nur *tie*, kie vi mem donis al ĝi *sekuran bazon*. –

Vi ne devas kredi, ke vi povas *krei* aŭ *trovi* tiun bazon *pere* de via pensado, se vi ne volas venkiĝi de iluzio, kiu, ekde la *plej antikvaj* tempoj de la surtera homaro ĝis la *nuna* tempo, fariĝis la kaŭzo de milobla eraro! — — —

Oni ĉiam denove malsukcesas pro tio, ke oni deziras *elpensi* tion, kio en interna ekkono per unuiĝo povas esti nur *spertata* kaj nur *tiam* povas *fariĝi* materialo por pensado.

Oni kredas ekkoni spiritajn aferojn en sia *pensado*, ne sciante, ke io spirita *neniam* estas kaptebla en *pensoj* antaŭ ol oni ĝin *spertis*, ĉar nur dum *spertado* ĝi estas vere sentebla, en spertado kiu havas *nenion* komunan kun perpenza ekkono. —

*

Transe de ĉiu pensado, bridante la pensojn per firma brido, kiel *reganto* de via pensado, vi lernu percepti en vi mem tion *spirite percepteblan* per enprofundiĝo en via plej interna profundo, — nur *tiam* vi donu liberecon al viaj pensoj, kaj nur *tiam* via pensado povos fari konkludojn *el io spirita al io alia spirita!* — — >>

Tiele finiĝis tiutempe la parolado de l' majstro.

Kaj mi kredas, ke ne estis tute superflue komuniki ĝin al vi!?"

*

„Certe ne,“ respondis la fizikisto, „kaj kiel ĉio alia, tiel vere evidentiĝas al mi ankaŭ tio, ke nia pensado ĉiam estas *kondiĉata* nur de la *premisoj*, de kiuj ĝi eliras!

Se mi bone komprenis, ankaŭ via guroo tute ne dubis pri la ĝusteco de logikaj konkludoj, sed li rekomendis al vi pripensi, ke nia pensado estas kvazaŭ *indiferenta* rilate al la *bazo*, sur kiu ĝi funkcias, tiel ke eĉ la logike plej nerefuteblaj konkludoj fine povas esti *malveraj*, se ili baziĝas sur premisoj kiuj komence ne estis sufiĉe certigataj.

Mi tre bone komprenas ankaŭ, ke, por pensado pri *spiritaj* aferoj, ni same bezonas tian *bazon de sperto*, kian ni efektive posedas por pensado pri *fizikaj* aferoj, kaj ke estas malĝuste, se oni kredas povi iam akiri *per la pensado mem* anstataŭaĵon por tiu sperto.

Pri ĉio ĉi mi ne plu havas iun dubon, sed mi demandas min, kiumaniere *mi mem* nun povus akiri tiun spiritan sperton, kiu devas esti *antaŭa* al ĉiu pensado pri io spirita, kaj tie ĉi mi troviĝas en tiom malsekura tereno, ke mi hezitas konfidi min al ĝi.“

*

Kaj la plijunulo respondis, dirante:

„Pri tio ankoraŭ ne klariĝinta el ĉio, kion mi povis diri al vi, kaj ankaŭ pri la punkto de vi ĵus menciita, mi nun legos al vi la parolojn de la majstro mem, ĉar

ankaŭ mi metis tiun demandon al li, kaj mia taglibro fidele redonas la respondon, kiun mi de li ricevis.

*

Tiele parolis al mi la majstro en tiu tempo:

«Ekde via juneco al kutimiĝinte serĉi finan decidon nur en via *pensado*, vi lasis malkreski en vi la forton, per kiu venu al vi certeco en *interna perfariĝa ekonomo!*

Sed ĉiu certeco, kiun via pensado povos iam doni al vi, estas kvazaŭ nur silueto de tiu *certa scio*, kiu plej interne doniĝos al vi, kiam vi kapablos vin *levi super* via pensado kaj mem *eniri* en tiun regnon, pri kiu sciigi vin via pensado *neniam povos*.

Vi mem devas alporti al via pensado sciigon pri tiu regno, se ĝi ankaŭ tie montru sin taŭga! – –

Sed se vi volas trovi la mallarĝan pordon kondukantan al maldorma spertado, vi devos konscie forlasi ĉiujn vastajn vojojn konstruitajn de tera pensado!

Ankaŭ la saĝo de la *Vedoj* estas en multaj partoj nur malsaĝa elpenaĵo, ne utila por trovi tiun vere mallarĝan pordon!

Sin movas sur vastaj vojoj la *Upaniŝado*, kaj la *Avesto* iras la samajn larĝajn vojojn de trompiĝa pensado, kvankam en *ĉio tio* troviĝas, jen kaj jen, la *spuroj* de tiuj, kiuj *trovis* tiun mallarĝan vojon kondukantan al la pordo de l' vivo. – –

Ankaŭ tio, kion instruis tiu Sidarto, nomata *Budho*, ne kondukos vin al la celo, kvankam tiu instruo entenas ne malmulton da saĝoplenaj ekkonoj, kiuj vere ne estas frukto de *pensado!*

*

Multaj *provis*, de neniuj ekkonite, montri la mallarĝan vojon; sed fariĝis konata de granda parto de la homaro nur *unu*, kiu ne nur *provis*, sed *sukcesis* montri ĝin per *ago kaj vivo ...*

Al vi kristanoj li poste fariĝis „dio“ kaj vi *nomas* vin laŭ li, sed vane mi serĉas inter vi tiujn, kiuj sekvas lian vojospuron. — —

De tempo al tempo, *strangaj malsaĝuloj* kredis esti liaj samvojanoj nur pro tio, ke ili provis *simie imiti* lin laŭ la multe konfuzita raporto pri lia vivo, kaj eĉ hodiaŭ oni povas trovi religiajn troemociulojn, kiuj, trompitaj de iluzio, klopodas egali en sia *eksteraĵo* al lia *bildo*, kaj, sen ia honto, penas servi liajn altajn vortojn al sia memadmira, vanta farado.

La plej frenezaj uloj profanis lian nomon; sed ankaŭ inter tiuj, kiuj volis *honeste sekvi* lin, estis ne malmultaj, kiuj nekonscie lin *blasfemis*, kredante esti konformaj al lia vorto. —

Vere, restas *miraklo*, ke *malgraŭ* ĉiuj kruelegaĵoj kiuj en lia nomo malhonoris la homaron, li ankoraŭ paŝas tra la historio de la homa speco kiel adorinda figuro! — — — —

*

Li estis unu el la ekstreme raraj homoj, kiuj *devas* konfesi sin mem kiel tion, kio ili estas; oni, estante plena de iluzioj, *misinterpretis* lian konfeson kaj faris el li la „dion“; sed el liaj vortoj oni faris instruon miksitan kun antikva instruo pri dioj, sen transpreni ankaŭ la profunde ankritan, sekretan saĝon, kiu el tiu pridia instruo riveligis al la scianto. – –

Ekde la *plej frua tempo* oni tiel kulpiĝis!

Sed li – unu el *ni*, kaj tamen tiom supera al ni ĉiuj, liaj fratoj en la regno de l’ spirito, rilate al *forto de amo* – vere estis la *sola* el ni, kiu *al la tuta homaro* montris la malvastan vojon kondukantan al la mal-larĝa pordo de maldorme konscia, eterna vivo...

Akceptante de *li* la instruon pri tiu vojo, eĉ la plej saĝa homo certe perdos neniom de sia digno! – – –

Sed *li* diris ankaŭ, ke li povas sendi iun portantan la sigelon de tia senditeco, kaj ke *lin* akceptos, kiu akceptos *tiun*, kiun li sendos el la *domo de sia „Patro“*, pri kiu li diris, ke ĝi entenas la loĝejojn de *multaj*

*

Li *montris* la vojon – la malvastan padon – kondukantan al la pordo de l’ vivo, kaj li instruis *malfermi* tiun pordon!

Sed kiu venas *post* li, povas pruve montri sian sigelon nur, se li scias montri la *saman* vojon!

Finfine ekzistas nur tiu *sola* vojo, kaj bone estas al vi, se vi sur ĝi ekpaŝas! – –

Vidu do, kiel ĝin montris la ĉarpentisto, kiu estis, kiel ni, *majstro de la vera vivo!*

Lia *vivo* estis ankaŭ lia *instruo!* Vane vi klopodus, se vi volus malkovri, sub la ruinaĵo de posta falsigado de la antikvaj raportoj pri lia vivo, *pensosagōn* al kiu li eble povus ŝuldi sian ekkonon!

Ne el *Egiptujo* nek el *Hindujo* venis al li lia saĝo, kaj vere *en ĉiu tempo* povas trovi la *saman* saĝon tiu, kiu estas *inda* je ĝi!

Laŭ lia propra parolo la forto kaj la saĝo de lia „*Patro*“ sin revelaciis en li, sed la saĝo de tiu „*Patro*“ estas faraĵo ne de *pensado*, sed de maldorme konscia *estado!* – –

*

Ankaŭ mi, ho kara, ne povas konduki vin al konscia ekkono en via interno, se ne sur la *sama* vojo, kiun la alta majstro de Nazareto instruis ekiri, mem transformiĝinte en „vojon“ kaj prave povante diri, ke li estas „*la vojo kaj la vero kaj la vivo*“. –

Hodiaŭ mi volas *montri* al vi tiun vojon kaj doni al vi luman instruon pri tio, kiel vi plej baldaŭ povos sekvi la *altan vojon*, kiu kondukos vin al la pordo de konscia memspertado en la spirito.

Malfermu vian koron kaj aŭskultu min!

Vi tie ĉi fariĝos kapabla sperti *plej profundan misteron en vi mem!*

Fina sekreto senvualiĝos al vi!

Al viaj plej altaj suproj mi volas vin gvidi, kaj ĉe mia mano vi lernos sendanĝere vidi ĉiujn abismojn sube de vi!

Se vi volas min sekvi, vi vere atingos vian *plej altan alton*, tiun plej altan alton, kiu montros al vi, en la firneca lumo de l' spirito, vian *eternan devenon*, alte super la nebulecaj regionoj, en kiuj moviĝas via surtera vivo laŭ konfuza irejo! — — —

Aŭskultu nun kaj min sekvu, se vi estas *vokita* sekvi min, kaj do sekvi min *kapablas!* — — — — —

*

Sklavo de pratempa falo, vi estis profundiĝinta en plej malluman nokton, el kiu nur dia forto sciis vin liberigi.

Ligite per via propra volo al la potenco de la mastroj de tiu ĉi ekstera fizika kosmo, estante servutulo de la „*princo de tiu ĉi mondo*“, vi fariĝis la predo de viaj *pensoj*, — vi, kiu antaŭe estis *mastro* de ĉiu pensado! —

El tiu servuteco vi malligu vin! — —

Se *tiu*, pri kiu mi parolis, ne estus irinta sur tiu ĉi tero: tiu, kiun ni nomas la *plej granda* el la Amantoj, tiam nur por *malmultaj* estus atingebla la celo, pri kiu mi vin sciigas ...

Sed *li* ŝanĝis la „aŭron“ de tiu ĉi tero tiel, ke *ĉiuj*, kiuj havas la „*bonan volon*“ eniri en la lumon, ricevas ankaŭ la *forton*, per kiu *plenumiĝos* la sopiro de ilia volo. – –

Tial hodiaŭ tre multaj homoj povas trovi sian „*liberriĝon*“, kiuj *sen* lia ago de amo sur Golgoto devus fariĝi viktimoj de neniĝo, – aŭ almenaŭ la predo de eonolongaj turmentoj, antaŭ ol ili povus trovi liberigon kaj savon. – – –

Danke al li, estas nun *facile* por vi malligi vin mem, se vi volas vin *liberigi!* –

*

Forlasu ĉiun saĝon elpensitan, eĉ se ĝi ŝajnas al vi „*dia vorto*“, por trovi *tiun* saĝon el *ago* kaj *vivo*, kies fundon eĉ la altaj instruoj de la plejsaĝuloj de tiu ĉi tero ne povas atingi, ĉar ĝi estas ankrita en profundoj, *kiujn neniu pensado iam povos mezuri!*

Penu atingi en vi la *simplecon de infano*, per kiu vi kapablos malligi vin el via *multoble* kurba malvasto, en kiu vin tenas *ligita* tio, kio estas *ne vi mem!* – –

Vere, estas pli facile por kamelo, aŭ eĉ nur por ŝnurego el ties haroj, iri tra trueton de kudrilo, ol por „*riĉulo*“ – homo „*riĉa*“ je spiriteco direktita al surteraĵoj – eniri en la regnon de Dio!!

*

Tio signifas: kiam oni volas trovi en si mem la *spiriton de l' vivo*, ĉiu saĝo *intelekta* fariĝas *malsaĝo!* –

Tie ĉi ekzistas neniu „trejnado“, neniu disĉipla ekzerco, kiuj povus konduki al sukceso, kaj povas doni garantion certan nenio alia ol *agado* kaj maldorme konscia, agopreta *vivo!* –

Nur per konscia *agado* la strebanto povas tie ĉi progresi, kaj nur *tiel* senvualiĝas al li *sekreto*, kiun li *vane* provas esplori, dum li ankoraŭ klopodas pri ĝi *en pensado!* – – –

Ekkoninte tion, pri kio temas, li ridetante memoros sian malsaĝon, kiu ŝajnis al li, ke estas atingebla per homa *elpensado* tio, kio nun montriĝas atingebla nur per alta *graco*. –

Tiel ĝin atingis la antikvuloj, kaj ne aliamaniere oni povos en tiu ĉi tempo atingi tion, kio ĉiam restos *mistero*, eĉ se miloj iam ĝin atingos ...

*

Ne per strebado al strangaj *fortoj* oni proksimiĝas al tiu *mistero*; sed kiu ĝin atingis, al tiu doniĝas, *sen* lia kunago, vere *miraklaj* fortoj – *al ĉiu aliaj* –, tiaj, kiaj povas servi al li por lia plej alta formiĝo. –

Ĉi tie ne ekzistas ia arbitro, kaj *nur tiel*, kiel la spirito mem *povas* doni siajn donojn laŭ eterne imanta leĝo, ili estas akireblaj por la homo. –

Sed al kiu la *donoj* de l' spirito estas pli gravaj ol la *feliĉo de l' unuiĝo*, kiu estas necesa kondiĉo por tiaj donoj, tiu certe atingos *nek* tion, *nek* tion ĉi, sed falos en trompiĝadon eonlongan. – –

La feliĉo de l' *unuiĝo* estas la *fina celo*, kaj la *donoj* de l' spirito, kiuj tiam povas doniĝi al vi, estas la sekvo de l' *atingo* de tiu fina celo.

*

La *komenco* de via vojo estas trovebla *ĉi tie sur la tero, meze de la ĉiutaga vivo*; ĉiuj *vojostacioj* estas ankoraŭ en sfero *surtera*; – nur kiam vi estos sukcesa atingi ilin laŭvice, vi povos vere *malligi* vin disde la tero kaj eniri en la *regon de la spirito*, kie la *fina celo* vin atendas – – –

Aĥ, kvankam multaj havas la plej ardan *deziron* atingi la finan celon, ili ne povas levi sin al la ekkono, ke tiu fina celo estas atingebla nur, se oni serĉas la komencon de l' vojo *meze de la ĉiutaga vivo*, kaj tiam direktas siajn okulojn *al la sekvanta vojostacio* kiel unua intercelo, ĝis oni estas atinginta ĝin, kaj poste celas la tiam sekvantan! –

Anstataŭe oni kredas, ke oni povas trovi la *komencon* de l' vojo nur per tio, ke oni *fugas* el la ĉiutaga vivo kaj formas al si per la *fantazio* mondon, kiu ŝuldas sian ekziston nur al la *povo de imago*! –

De tie oni jam rigardas al la *fina celo* kaj opinias ĝin atingebla *sen* interceloj, tiel ke fine oni fariĝas la predo de la propraj iluzioj kaj reve estigas al si la supozitan regnon de la spirito *el la nenio de la imago*, tute same kiel antaŭe oni sukcesis krei al si la iluzion, ke oni estas jam tre malproksima de la tera vivo ĉiu-

taga kaj jam antaŭ longe ekpaŝis sur la vojo al la spirito ...

Oni ne scias *disciplini* sin por trapasi la *vojon de la vivo* kun *persisteco*, sed plej volonte atingus la celon jam morgaŭ, kaj tiel *mem* kreas al si iluzion, al kiu oni tiam subfalas en trompa sento de feliĉego, kiu finiĝas, kiam la tera korpo ne plu nutras la fortojn, el kiuj oni formis sian ŝajnan mondon. — —

*

Vere, multe pli bone kaj ĝuste agas eĉ tiuj, kiuj, ekkoninte tiun iluzion, montras al ĝi nur malestimon, kvankam ili ne suspektas, ke ili povas trovi en si mem, malproksime de ĉia iluzio, la *vojon de la vero*, kiu estas *vojo de la vivo!* —

Sed *vi* estu egala nek al *tiuj* nek al *tiuj ĉi*, kaj sekvu mian instruon, ekpaŝante de la komenco sur la vojo de la *vivo*, la vojo de konscia *agado*, kaj trapasante ĝin de intercelo al intercelo ĝis la *fina celo*, ne demandante, *kiam* la finan celon vi atingos!

Se ne estas donate al vi atingi ĝin jam *tie ĉi*, *dum via tera vivo*, vi tamen kun certeco ekposedos ĝin tre baldaŭ, eĉ se vi devus forpasi *sen* esti atinginta ĝin, ĉar tiam oni povos prezenti al vi helpon, kiu estas ekkaptebla por neniuj, kiu ne jam *tie ĉi* dum sia tera vivo ekpaŝis sur la *vojo de vivo kaj ago!* — —

*

Tie ĉi, meze de via vivo ĉiutaga, meze de la vivo de via profesio kaj de viaj teraj devoj, vi trovu la komencon! – – –

Tiu „komenco“ estas nenio alia ol la ekkono, ke ankaŭ sian vivon *ĉiutagan* oni povas rigardi kaj vivi el la vidpunkto de vivo *eterna*. –

La unua *tasko* nun estas: lerni rigardi sian ĉiutagan vivon kiel parton de la propra vivo *eterna*, kaj kun *fera persisteco* plenumi ĉiujn devojn de la ĉiutaga vivo tiumaniere, ke oni rajtas kredi esti *certa*, ke neniam en la eterneco oni devas penti ion, kion oni faras aŭ ne faras en sia ĉiutaga vivo.

La *unua survoja celo* atingenda konsistas en tio, ke oni akiru tiun *sekuran trankvilon de l' konscienco*, kiu pli aŭ malpli frue, sed *kun plena certeco* devas rezulti el tiu persista *plenumado* de la ĉiutagaj devoj.

*

Kiam tiu *unua survoja celo* estas atingita, montriĝas per si mem la *dua*, konsistanta en tio, ke oni ekkonas *super* la devoj ĉiutagaj ankoraŭ *aliajn*, kiuj en la ĉiutaga vivo *ne* estas rigardataj kiel „devoj“, tamen estas tiam *sentataj* kiel devoj. –

Nun la tasko estas, plenumi *tiujn ĉi* devojn *samaniere*, *sen* neglekti la devojn ĉiutagajn! – –

Kion tiuj ĉi devoj *ordonas*, tion vi scios tuj kiam vi vere atingis la *unuan celon* survojan!

Por ĉiu unuopa homo tiuj ĉi pliaj devoj montriĝas en *alia* formo, kaj tial estus *neeble*, indiki ilin al vi detale. –

Sed, *atinginte* la unuan intercelon, vi *neniam* povos *ekdubi*, en kio konsistas *por vi* tiuj ĉi novaj devoj, kaj kion ili postulas de vi!

*

Se vi estas *plenuminta* dum sufiĉe longa tempo ankaŭ *ĉi tiujn* devojn tiom fidele kaj persiste kiom la devojn ĉiutagajn, la *tria* survoja celo per si mem montriĝos al vi atingita, per tio, ke vi sentos la saman *sekuran trankvilon de l' konscienco*, kiu doniĝis al vi post tuta plenumado de la *ĉiutagaj devoj*, nun ankaŭ rilate al tiuj ĉi devoj *pli altaj*. –

*

Tiam al vi tuj aperos nova survoja celo, kaj vi ekvidos, ke ĝi postulas de vi nenion alian, ol ke vi nun penu efikigi ankaŭ por *aliuloj* tion, kio progresigis *vin mem*.

Oni tie ĉi *ne* postulas de vi, ke vi, en malsaĝa konvertada fervoro, persvadu ĉiun homon, kiu krucas vian vojon, akcepti tion, kio kondukis vin al via memcerteco; sed oni volas, ke ankaŭ vi disponigu vin al la sama agado, kiu jam donis al vi komencan liberigon, kaj ke vi penu agi samdirekte per via *ekzemplo*. –

Ankaŭ tiu ĉi *kvara* celo survoja konfirmas sian atingitecon per la menciita *trankvilo de l' konscienco*, kiu indikas al vi, ke vi atingis ĝin ne per parolado kaj disputado, sed per *vivo, faro kaj ago!*

*

Kaj tuj vi ekvidos antaŭ vi la *kvinan* celon survojan, kiu postulas de vi, ke vi elmontru vian kapablon de *kreado!*

Vi nun devos iumaniere interveni *produktive* en la vivon de via medio, *ne* per tio, ke vi provas tie *forigi malbonajn statojn*, sed per tio, ke vi penas *krei* en via medio ion, kio estas *progresiga* laŭsence de la ekkono de vi jam akirita. — — —

Kiam, post plenumado ankaŭ de ĉi tiu tasko, ekestas la sekura *trankvilo de l' konscienco*, jam plurfoje sentita kun certeco, ĝi nun montriĝos en vi ligita al nova *ekkono*, kaj tio ĉi estas la *sesa* survoja stacio, la sesa ŝtupo de via vojo, kiu en la *sepa* konduku vin al la *unuiĝo* kun via spirita pra-fundo! —

*

Tiu nova ekkono diros al vi, ke nun estas veninta la tempo por provi kaj *ĉiam denove* provi, ĉu vi povas, per via tuta strebado kaj aspirado, *sen forlasi la teron*, tamen spirite *malligi vin el ĝia interplekto de moviĝado kaj agado* tiom, kiom estas necese por lasi la regnon de l' spirito estigi la *unuigon*, per kiu via tera

konscio kapabliĝas aŭdi en vi mem la sanktan *vorton* de via *vivanta Dio*, sen iam plu subfali al trompiĝo.

*

Ne pli frue vi provu malligi vin el tiu fariĝinta tera interplektaĵo, ol kiam vi estas *tute certa*, ke vi estas konscie tramigrinta *ĉiujn* antaŭajn vojostaciojn!

Se vi provus fari tion *pli frue*, vi devus neeviteble fariĝi la predo de *trompantaj fortoj*, kaj vi ekkonus nur *post* la tempo de via surtera vivo, kun terurego, kiom oni trompis vin!

Vi tiukaze similus al homo, kiu en sonĝo kredas esti *fluganta* kaj ĝojas pri tiu kapablo, sed vekiginte vidas, ke kiel antaŭe li ne povas ekmaŝtri la graviton, kiu katenas lin al la tero.

*

Kiom ajn simpla eble ŝajnas al vi la migrado tra tiuj vojostacioj antaŭaj, kaj kiom ajn forte la tento logas vin kredi, ke vi jam de longe *estas* tramigrinta ilin, tiom serioze mi devas averti vin, ke vi ne fordonu vin al *memtrompo!*

Vi ne nur endanĝerigas la sukceson de via tuta strebado, sed kun krima senzorgeco elmetas vin al la danĝero perdi por eonoj la vojon, kiu estis kondukanta vin al la lumo, se vi tro frue provas atingi la spiritan malligon el tiu surtera interplektaĵo de agada moviĝado.

Sed se vi vere kaj honeste tramigris vian vojon supre indikitan kaj konscias, ke vi *neniun* el ĝiaj interceloj *preterlasis*, via malligo komenciĝu per tio, ke vi provas trovi la nudan *homon* en vi!

Tio ne ŝajnas al vi tro malfacila, kaj tamen estas multe pli malfacila ol kiom vi povas imagi! — —

*

Ĝis nun vi kutimis senti vin kiel idon de difinita *familio*, kiel filon de difinita *popolo*, kiel anon de difinita *rondo*, — kaj tio kun plena praveco.

Ĝis nun vi ja *ne devis* senti vin malligita el tiu *ligiteco*, se vi volis havi la esperon iam atingi vian celon.

Sed *nun* vi devas lerni juĝi la valoron de *ĉia* tia ligiteco el la vidpunkto de la *eterneco*, ĉar la eterna spirito sin donas ne al „Medo“ nek al „Perso“, ne al „Greko“ aŭ „Romano“, — ne al ido el tiu aŭ tiu ĉi honorinda domo, kaj ne al membro de tiu aŭ tiu ĉi kasto, sed nur: — al la nuda

HOMO! — — —

Sole tiun „nudan“, kosme ekzistantan *homon* vi nun devas senti en vi, kaj ĉion, kio eble aparte difinis lin en tera rilato, vi tiam devas rigardi kiel sen-esencan kaj paseman!

Sed vi tute misinterpretus miajn parolojn, se vi kredus, ke ankaŭ en via *ĉiutaga vivo* tio ekkonita kiel

„sen-esenca“ kaj „pasema“ devus esti rigardata de vi kiel *senvalora!*

*

En la *ordon de via ĉiutaga vivo* ĝi enmetiĝas *plenrajte* kaj tie *devas* esti konservata, se vi ne volas perturbi la kosman ordon; sed same vi *perturbus* tiun ĉi ordon en krima maniero, se en *via ĉiutaga vivo* vi donus al tiuj ĉi faktoroj, difinantaj kaj per sia difiniteco apartigantaj, *pli grandan* valoron ol kiom atribuiĝas al ili sole surbaze de ilia laŭnatura ekzisto! – –

Se vi *amante* ĉirkaŭprenos tiun limigitecon – ĉu ĝi estas nomata *familiario* aŭ *kasto*, *popolo* aŭ *nacio* – vi ĉiam agos *ĝuste*, kaj scios *ami* ankaŭ la limigitecon de *aliuloj*; sed tuj kiam vi celas aparte *akcenti* tion, kio tiumaniere difinas vin kiel membron de la homaro, vi fariĝas *perturbanto de la kosma ordo*, same kiel muzikisto en granda orkestro perturbus la muzikan verkon, se li sonigus *sian* instrumenton pli laŭte ol kiom postulas la parto, kiun la komponisto al li asignis! – –

*

Alveninte ankaŭ al tiu ĉi *lasta* tera vojostacio, de kie vi estas baldaŭ enironta en la regnon de l' spirito, vi ne devas opinii, ke vi povas *neglekti* eĉ nur *unu solan* el tiuj antaŭe ekkonitaj devoj!

Tial en la vivo *ĉiutaga* vi ĉiam devas lasi al ĉio *ĉiutaga* ĝian *rajton*, kaj malgraŭ tio vi devas porti en vi

tiun *pli altan* senton, kiu igas vin rigardi kiel „sen-esencan“ kaj „paseman“ tion, kio *tamen* en la vivo ĉiutaga havas sian *ĉiutagan valoron!* — — —

*

Se nun en la plej alta regiono de via sentada vivo ne plu troviĝas io alia ol la nuda, kosme ekzistanta *HOMO*, kiu volas unuigi sin kun la *DIECO*, tiam vi unue devos lerni ami *vin mem*, devos pli kaj pli senti *vin mem* sole nur kiel *AMON*, ĝis *plu nenio estas en vi*, kio estus io alia ol *FAJRO DE AMO*. — — —

Tiel konsumiĝinte en *amo*, en tiu regiono purigita de ardo vi estiĝos vazo de *DIA* amo, kaj en via plej interna „*mi*“ sin unuigos kun vi via „*VIVANTA DIO*“...

*

Tie ĉi vi estos atinginta la *finan celon* de via alta vojo, sed vi tre baldaŭ *perdus* tion atingitan, se vi — kiu apartenas, kiel ido de la tero, ankaŭ al via vivo ĉiutaga — opinius vin *liberigita de viaj ĉiutagaj devoj!* — — —

La *vojo* nun estos *en vi*, kaj sur ĝi vi povos, en ĉiu tempo, kaj en la momento mem en kiu vi tion ekdeziras, levi vin al via plej alta alto en la regno de l' spirito, al *via unueco kun via vivanta Dio*; kaj de tiu plej alta alto ankaŭ via vivo ĉiutaga ricevos *lumon*, —

lumon, kiu *ne* estas el tiu ĉi mondo, kaj *ne* submetita al tera leĝo! – – –

Tiam vi eble povos ekkompreni tion, kion instruis tiu granda Amanto, dirante, ke la regno de la ĉielo estas „proksima“, kaj ke oni ne povas diri: jen tie ĉi, aŭ: jen tie! aŭ ke ĝi venas kun observado, ĉar:

„*La regno de Dio estas en vi!*“»

*

En alta entuziasmo tiuj skribitaj vortoj estis voĉe legitaj, kaj la du pli maljunaj viroj aŭskultintaj sian pli junan amikon estis profunde tuŝitaj de tio aŭdita.

Post tempo de silento la plej maljuna el la tri sin levis kaj diris:

„Vere, altan instruon ni hodiaŭ ricevis, kaj la sekreto de vera vivo nun senvualiĝis al ni!

Kiom da enigmoj trovas sian solvon en tiu instruo!

En kiom alia maniero oni rigardas la ekzistadon de l' homo sur tiu ĉi tero, kiam oni tion aŭdis!

Nun en mi ĉiu demando estas mortinta, kaj mi vidas antaŭ mi en plena klareco la vojon, kiu min atendas!“

*

Kaj ankaŭ la alia de la tri amikoj – kiu, dum la maljunulo parolis, estis levinta sin kune kun la plejjunulo – esprimis sin en sama maniero, kaj liaj paroloj finiĝis per la konfeso:

„Okazis al ni io granda dum nia vojaĝo, kaj ni revenos hejmen kvazaŭ aliaj homoj, kiam morgaŭ proksimiĝos la tempo por diri adiaŭ al tiu ĉi insulo!

Nun ankaŭ nia *vivo ĉiutaga*, kiun ni tre ofte sentis griza kaj senenhava, akiros *koloron* kaj *enhavon*; kaj se tie ĉi en antikvaj tempoj oni honoris la *sunon* kiel simbolon de la dieco, mi povas diri, ke ankaŭ *mi* nun estas doninta min al tiu sunoservo; sed mi portas tiun sunon *en mi mem*, kaj mi kredas jam senti ĝiajn radi-ojn! — — —

Mi estis esperinta multon belan de nia vojaĝo, sed neniam mi estus atendinta, ke mi revenus tiom riĉigita je *ekkono* serĉita dum mia tuta vivo. — —

Vere, *pli altaj potencoj* devas esti tenantaj siajn ma-nojn super ni! —

Kaj kvankam ni du pli maljunaj eble inklinas bedaŭri, ke la ekkono nun al ni prezentiĝanta venis al ni nur en tiom malfruaj jaroj, ni tamen devas konfesi, ke ĝi antaŭe estus veninta tro frue kaj evidente sciis elekti al si la ĝustan tempon. — —“

*

La du remistoj estis jam antaŭ longe tirintaj la boaton malsupren al la maro, kiu nun, glata kiel spegulo kaj aspektanta kiel likva lumo, estis preta enpreni en sin la sunan diskon.

Maro kaj ĉielo ŝajnis unuigitaj en ora ardo.

La amikoj fine rimarkis, ke iliaj remistoj supozeble estis jam de longe atendintaj ilin, kaj ili do malascendis al la marbordo, dum la pli juna el la du fratoj, ekvidinte ilian ekiron, rapidege iris renkonte al ili por reporti la korbojn kaj vazojn al la boato.

*

Post malmultaj minutoj la boato jam estis en granda distanco de la loko, kie oni tiom longe estis ripozinta; sed nun ne plu estis necese stiri al la libera maro, kaj oni povis sendanĝere veturi, tra inter la marbordaj klifoj, laŭlonge kaj tre proksime de la altaj rokmuroj de la insulo.

En mirakle riĉa koloro ardis la rokaĵo sub la abundo da radioj de la suno subiĝanta lume en la maron.

*

Ĉe tiu ĉi flanko de la insulo estis nur malmultaj verdaj ravinoj kaj pli larĝaj valoj plenaj de olivarboj.

Preskaŭ seninterrompa serio da altaj rokmuroj leviĝis el la maro, kiu multloke estis subkaviginta ilin, tiel ke oni povis rigardi en vastajn, misterajn grotojn.

Ĉar la tri vojaĝantoj montris grandan intereson je ĉio, kion oni tiel povis vidi de tute proksime, la du remistoj kun ĝojo deviis de la plej mallonga vojo returna kaj veturis laŭ la tuta periferio de ĉiu el la malgrandaj golfoj, de tempo al tempo iom restante en aparte belaj lokoj.

Tiel estis iom post iom fariĝinta nokto, – nokto kun ĉiam pli multiĝanta stela pompo, – kaj oni vidis, el la direkto de la kontinenta lando, jam nur la treme brilantan linion da lumoj de la ne tro malproksima granda havenurbo.

La insulo mem nun faris la impreson, ke neniuj loĝas sur ĝi, ĉar oni estis ankoraŭ tre distanca de la loko, de kie oni povus ekvidi unue la lumojn de ĝia surmonteta urbo.

*

En la profunda, nigra ombro de rokmuro glitadis la boato, nun akcelita de pli forta remado.

Sennombraj lumantaj bestetoj faris, ke la remoj, ektuŝinte la akvon, kvazaŭ eligis el la profundo brilan, bluite fosforeskan lumon.

Kiel vosto de raketo la kilspuro de la boato longe postlumis.

Ĉar tie ĉi la fiŝoj estas kaptataj nur dumnokte ĉe torĉa lumo, oni kelkafoje renkontis boaton, kiu, vualita de mallumo fantomeca, nun veturis al sia kaptejo.

Gajaj paroloj de saluto estis interŝanĝataj, kaj tuj poste oni perdis sin reciproke el la okuloj en la profunda nokto.

De tempo al tempo, kaj precipe kiam ili sciis, ke bona eĥo estos favora al ilia arto, la du fratoj sonigis kantojn de ilia hejmlando per plena pulma forto, sed

kvankam iliaj voĉoj ne posedis multon de la melodia belsoneco de la famaj kantistoj de ilia lando, la tri vojaĝantoj, sciantaj la tekston, volonte aŭskultis, sed poste ŝatis tiom pli la profundan vesperan kvietecon, kiu pro la brueto de la ritmaj rembatoj prezentiĝis al ilia sento eĉ pli impresive.

*

Fine oni vidis, veturinte ĉirkaŭ la lasta alta rok-elstaraĵo, la unuajn lumojn el la direkto de la insulo, kaj baldaŭ oni atingis la malgrandan insulhavenon, kie la antaŭe venigita koĉero kun sia kaleŝo estis atendinta, dum pluraj horoj, la revenon de la boato; nun li veturigis la fremdulojn malrapide laŭ la serpentanta ŝoseo supren al la urbeto, kie dum tiu nokto la de ili ekamita albergo estis gastigonta ilin je la lasta fojo.

Preninte tie sian vespermanĝon, la amikoj ankoraŭ mallonge promenis sub la cedroj kaj palmoj de la nokta ĝardeno kaj ĝojis pri la surmara trembrilado, rezultanta el la torĉoj de la sennombraj boatoj, en kiuj oni nun praktikis la fiŝkaptadon.

*

Sed, volante forvojaĝi la sekvantan tagon, oni baldaŭ trovis konsilinde reiri por ĝui la noktan ripozon; antaŭe oni estis interkonsentinta uzi por la veturo

hejmen, kiom eble, la transmaran vojon deloke de la proksima havenurbo sur la kontinento.

Dum tiumaniera vojaĝo oni estis certe havonta plej favoran oportunon por kontempli denove, en anima koncentriĝo, ĉion kio estis priparolita dum la pasintaj semajnoj, por lerni ekkapti funde, kiom diferenca nun montriĝis la surtera ekzistado, nun ke estis senvualigita ĝia benoplena sekreto. – –

*

*

*

POSTPAROLO

La leganto, kiu konas miajn aliajn librojn, certe jam antaŭ longe rimarkis, ke tie ĉi por mi vere ne temas pri ‚rakonto‘. –

Tial mi ne bezonas diri al li, ke la rakonta *formo* de tiu ĉi libro devis esti elektata nur por alporti la instruon, konigatan de mia cetera verkaro, ankaŭ al tiuj homoj, kiuj facile perdas la kuraĝon kaj, laciĝinte, ĉesas legi, kiam ili trovas en iu libro nur *abstraktan* instruon kaj krome sciiĝas el ĝi preskaŭ nur pri aferoj eble tro malproksimaj de ilia ĉiutaga vivo.

Ke tamen ĉiu vorto de tiu ĉi libro estas bazita sur *fakta travivado*, tio estu eksplicite akcentata.

La tri viroj de la libro fariĝis por la aŭtoro nur *portantoj* de tiu travivado, ebligante al li krei bildon, en kiun li povis enmeti kelkajn kolorojn, kiuj ne estus bone uzeblaj, se li volus provi desegni nur la realan prabildon de tiu travivado.

Tamen ankaŭ tion ĉi li efektive faris en multaj partoj de la libro, kvankam kaj la *loka fono*, kaj la *konturoj* de la parolantaj personoj estis ŝanĝataj, ĉar nur la rezigno pri ‚realisma desegnado‘ permesis al la aŭtoro doni esprimon al tio travivita.

Nek ŝajnis al li necese karakterizi la tri parolantojn de tiu ĉi libro pli ol skize, ĉar la celo estis doni ne *priskribon de homoj*, sed *bildon de la instruo*.

*

Kiu *kapablas* kaj *volas* enpreni en sin tiun *instruon*, tiu scios facile malligi ĝin el la ĉirkaŭvolvaĵo, kaj al iu aŭ alia ĝi eble fariĝos plene *viva* nur en la tie ĉi elektita interplekto. — —

Miloj jam trovis ĝin multamaniere *konfirmita*, sed ekzistas ankoraŭ *multaj miloj* en ĉiuj landoj de la mondo, kiuj soifas la „*veron*“, la solvon de la finaj enigmoj, kaj vagas de iu vojo malĝusta al alia, fine ekvidonte kun rezignacio, ke *neniu* kondukis ilin al la *fonto de ekkono*. —

Ĉiuj ĉi serĉantoj ricevu el tiu ĉi libro la *firman konfidon*, ke ili tamen *povas* atingi sian celon, se ili volas sekvi tiujn homojn sur tiu ĉi tero, kiuj *solaj* havas la *rajton* instrui en tiu sfero; — kiuj ne sciigas pri siaj propraj supozoj, konkludoj kaj opinioj, sed instruas, kiel la „*Patro*“, kiun *ili solaj* konas, al ili ordonas instrui. — — —

*

Ĉiu tempo postulas alian *formon* de la instruo, kaj la eterna saĝo bone scias decidi, kiel devas agi tiuj, kiuj fariĝis ĝiaj instrumentoj. —

Ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi libro neniom agas laŭ sia propra juĝo, servigante *la presitan vorton* al la instruo.

Kien la *parolita vorto* penetri neniam povas, tie nunatempe la *presita libro* estas atingebla, kaj ĝi prezentas al la serĉantoj ĉiam denove la instruon, kiu, en nia epoko tiom sklavigita al rapido kaj hasto, tre baldaŭ estus kvazaŭ forblovata de la vento, se ĝi estus konigata de tempo al tempo nur per la voĉo. –

Oni evitu la formiĝon de „*komunumoj*“ por tiu ĉi instruo kaj ne faru dogmon *antaŭe* akceptendan el tio, kies verecon kaj realecon povas pruvi nur la *sperto de l' koro*. – – –

*

Estas neniom malaprobinde, se tie kaj tie ĉi rondo da serĉantoj metas al si la taskon vivadi laŭ la instruo; sed, kvankam kelkaj serĉantoj de la vero, laŭ sia naturo, kredas trovi progresigon nur en *komuneca* strebado, neniu – se li ne volas *falsi* la instruon – rigardu tiun progresigon kiel *ligitan* al tiu komuneca strebado! – –

Ankaŭ en tiu *komuneco* de serĉado, la instruo povas malkaŝi sian lumantan *profundon* ĉiam nur al la *individuo*, kaj finfine nur *terhoma, persona inklino* decidigas la serĉanton deziri al si akompanantojn aŭ esti kontenta iradi *sola*. – – –

Sur tiu *vojo alta*, al kiu la instruo kondukas, ĉiu, kiu volas sekvi la instruon, estas ĉiuokaze *sola*, ĉu li scias pri aliuloj ekpaŝintaj sur la sama vojo, aŭ ne!

*

Ĉiu povas resti memdone fidela al *tiu kultanaro*, kiu ekde lia frua juneco prezentis al li la gvidilon, per kiu li esperis trovi sian vojon al la spirito; kaj kiam li ĝin vere *trovos* per *vivo* laŭ la instruo tie ĉi perita, li tiam scios *pliprofundigi* la dogmon de sia juneca kredo tiom, ke li povos helpi ankaŭ *aliajn homojn*, kiuj jam antaŭ longe malesperis pri la instruoj de sia juneca kredo, pro tio, ke eĉ la *instruantoj* de tiu kredo portis en si siajn dubojn kaj tial *ne* sciis helpi, ĉar ili *mem* treege *bezonis* helpon. — —

*

Do ankaŭ tiu ĉi libro alportu *liberigon* kaj *klarecon*, kaj montru la *vojon al la lumo* al ĉiuj ĝin trovi *volantaj!*

Ĉiuj havantaj la *honestan volon* ricevu el tiu ĉi libro la *unuan impulson* atingi la *spiritan altaĵon*, de kie vidate la *fina celo* de ilia ekzisto ne restos por ili „*sekreto*“! — —

FINO

Esperanto-tradukoj de aliaj libroj de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena interreta adreso:
<http://boyin-ra.org/esperanto/>